



@vangeliaj kajeroj 9-10



ETIKO



internacia kristana revuo en Esperanto

La aŭtoroj respondecas pri la enhavo de la propra artikolo.

[illegible][illegible]

Imprimé par : Copie Service, place des Templiers, 86000 Poitiers,
France.

En tiu esploro, oni konstatas, ke foje la moderna etiko mistrafis ion gravan, nome liberecon. Alia grava niatempa eco, la serĉo pri „progreso” kaj efikeco premas kaj elfetas multajn homojn. Sed la

Bibliaj indikoj pri la fremdulo kaj la akceptado pri li, la postulo bone pritrakti lin, kongruas kun nuntempaj valoroj.

Per la teksto *Centesimus Annus*, la romkatolika eklezio prezentis sian socian doktrinon, kiun grupo studis.

Ni esperantistoj ofte parolas pri la „interna ideo“. Kiuj valoroj troviĝas en ĝi? Ĉu ili foras de la kristanaj? Ĉu ilin aplikis la samideanoj en la iamaj socialistaj landoj?

Aĥ! La milito, la militoj. Ni prezentas du tekstojn, unu el antaŭ la unua mondmilito, kaj alia el antaŭ la Dezert-ŝtormo en Irako. Militoj kaŭzis multajn vundojn, kiujn Poloj kaj Germanoj volas reciproke pardoni.

Ekster la kristana referencaro, kiel eblus fondi socian etikon? Ĉu sur la feliĉo? Kaj ĉu literaturon oni submetu al moralo? Ĉu krom arto ekzistas reguloj al literaturo?

Niaj aŭtoroj kompreneble ne nur lasas al vi demandojn, sed ankaŭ proponas respondojn. Vi nun bone meditu, esploru kiujn valorojn vi volas preni por vi mem, eble serioze rigardante la Biblion, Kriston.

Philippe COUSSON

EDITORIAL

Après cinq ans d'interruption, voici un nouveau numéro de *Evangeliaj Kajeroj* (*Cahiers Evangéliques*), et il s'agit d'un numéro double. Je vous souhaite donc une bonne lecture, stimulante et agréable.

Ces cinq années (même déjà avant) ont vu la mort des idéologies. Depuis les années 1960 et 1970 les diverses églises ont de même perdu beaucoup d'influence. Notre monde voit maintenant de plus en plus de problèmes sociaux, de plus en plus de pauvres, de plus en plus de chômeurs, de plus en plus de sans-abri, de plus en plus de déracinés, c'est à dire de plus en plus d'hommes sans plus d'espérance.

Notre monde vit maintenant sans valeurs fixées, communes. On cherche des valeurs, soit pour l'individu, soit pour les collectivités. Quelques uns réussissent à proposer des valeurs regrettables, comme la propre nation (séparée des autres), comme une religion pure (elle seulement a le droit d'exister et de diriger).

Cependant parmi les hommes sincères et humanistes, il reste quelques valeurs, comme par exemple la solidarité, l'honnêteté, la tolérance.

Les chrétiens dans leur variété cherchent aussi des valeurs, des valeurs pour eux-mêmes, individuellement et communautairement, pour les chrétiens dans la société et aussi des valeurs pour la société.

Quelques unes parmi ce paquet de questions reçoivent un commencement de réponse dans ce numéro. En fait, je l'ai organisé en partant de Dieu et de la Bible vers le monde, les hommes et la société.

L'homme (chrétien) se trouve face à la volonté de Dieu. Quel chemin

doit-il choisir? Au lieu de choisir une espérance de ce monde, une vie de ce monde, qu'il choisisse la vie éternelle, car il a reçu la loi de Dieu, qu'il a à comprendre. Comprendre la volonté de Dieu signifie en fait mettre toujours Christ au centre de sa vie. Alors il sera possible de construire une éthique basée sur la foi chrétienne, alors il sera possible de chercher précisément les valeurs pour la vie chrétienne.

Au cours de cette recherche, on constate que parfois l'éthique moderne manque quelque chose d'important, la liberté. Un autre élément important de notre époque, la recherche du „progrès“ et de l'efficacité, opprime et rejette beaucoup d'hommes. Mais les indications bibliques sur l'étranger et l'accueil de l'étranger, l'exigence de bien le traiter, correspondent avec des valeurs contemporaines.

Par le texte *Centesimus Annus*, l'église catholique romaine a présenté sa doctrine sociale, qu'un groupe a étudié.

Nous, esperantistes, parlons souvent de l'„idée interne“. Quelles valeurs s'y trouvent? Sont-elles éloignées des valeurs chrétiennes? Les esperantistes des pays ex-socialistes les ont-elles appliquées?

Ah! La guerre, les guerres. Nous présentons deux textes, un date d'avant la première guerre mondiale, et l'autre d'avant la Tempête du désert en Iraq. Les guerres causent de nombreuses blessures, qu'Allemands et Polonais veulent se pardonner.

Hors du référentiel chrétien, comment serait-il possible de fonder une éthique sociale? Serait-ce sur le bonheur? Et la littérature a-t-elle à se soumettre à la morale? En dehors de l'art, existe-t-il des règles à la littérature?

Bien sûr, nos auteurs ne vous laissent pas seulement des questions,

mais ils proposent aussi des réponses. Maintenant, méditez bien, cherchez quelles valeurs vous voulez prendre pour vous mêmes, peut-être en

regardant sérieusement la Bible, le Christ.

Philippe COUSSON

LEADING ARTICLE

Here after a five year gap is a new number of *Evangeliaj Kajeroj* (*Gospel Notebooks*), and it is a double number. So I wish you a good, stimulating and pleasant read.

These five years (and some years beforehand) have seen ideologies passing away. After the sixties and seventies the churches have similarly lost much of their influence. Our world now sees more and more social problems, more and more poor people, more and more people out of work, more and more people homeless, more and more people uprooted, in other words more and more people who have lost hope.

Our world now lives without fixed communal values. People are looking for values, whether for the individual or for groups. Some succeed in proposing values which are to be deplored, such as their own nation (as opposed to others), or a religion so pure that it must be supreme. However there remain among sincere, loving people a few values such as solidarity, honesty and tolerance.

Christians, in spite of their variety are also searching for values, values for themselves as individuals and as a community, values for Christians as members of society, and also values for society itself.

Some of these important questions have the beginnings of an answer in this notebook. I have deliberately designed

it to start with God and the Bible, and to go on the world, mankind and society.

A Christian finds himself faced with the will of God. Which way should he choose? Instead of choosing this world's aims and this world's life-style, he should choose eternal life, for he has received a law from God, which he should understand. Understanding the will of God means in practice putting Christ in the center of our life. Then we shall be able to construct a code of ethics based on the Christian faith, and search out correctly the values by which the Christians should live.

In this search, we notice that sometimes modern ethics has missed out something important such as freedom. Another serious tendency, the search for „progress“ and efficiency oppresses and discards many people. Nevertheless the Bible's sayings about the stranger, and his acceptance, and the demand that he should be treated well, are in keeping with today's values.

In its publication *Centesimus Annus*, the Roman Catholic Church has set out its social teaching, and a group has been studying this.

We esperantists often talk about the „inner idea“. What values are included in it? Are they far from Christian values? Did esperantists put them into practice in erstwhile Socialist countries?

Then there's war, or the wars. We

include two articles, one from before the first world war, and the other before „Desert Storm“ in Iraq. Wars have resulted in many wounds, for which Poles and Germans want to forgive one another.

Outside the Christian context, how would it be possible to found out social ethics? Could they be based on happiness? And should literature be judged from a moral stand-point? Is it

only the rules for art that apply to literature?

Our contributors understandably do not merely leave you with questions, they also suggest answers. They challenge you to think deeply, and to examine which values you want to accept, possibly looking seriously at the Bible and at Christ.

Philippe COUSSON

LEITARTIKEL

Nach fünfjähriger Unterbrechung liegt nun wieder eine neue Ausgabe der *Evangeliaj Kajeroj* (*Evangelische Hefte*) vor, sogar eine Doppelnummer. Ich wünsche Ihnen dazu anregende und angenehme Lektüre.

In diesen fünf Jahren (und auch schon ein wenig früher) erlebten wir das Hinschwinden von Ideologien. Seit den Sechziger- und Siebzigerjahren haben aber auch die Kirchen viel an Einfluss verloren. Unsere Welt steht nun vor immer größeren sozialen Problemen, mehr Armen, mehr Arbeitslosen, immer mehr Obdachlosen, immer mehr Entwurzelten, und das heißt doch, immer mehr Menschen, die keine Hoffnung mehr haben.

Unsre Welt lebt heute ohne feste gemeinsame Werte. Man ist auf der Suche nach Werten, sei es für den Einzelnen, sei es für das Kollektiv. Manchen gelingt es, Werte anzupreisen, die man nur bedauern kann, wie etwa die eigene Nation, losgelöst von allen andern, als einer reinen Religion, die alleiniges Existenz- und Herrschaftrecht beansprucht.

Dennoch gibt es unter ehrlichen und

menschenfreundlichen Menschen noch einige Werte wie zum Beispiel Solidarität, Ehrlichkeit, Toleranz.

Auch die Christen in ihrer Vielfalt suchen nach Werten, für sich persönlich und in der Gemeinschaft, für die Christen in der Gesellschaft, und auch Werte für die Gesellschaft selbst.

Auf einige aus diesem Bündel von wichtigen Fragen wird in dieser Nummer der Ansatz einer Antwort versucht. Ich habe sie so angeordnet, daß sie von Gott und der Bibel ausgehend sich der Welt, den Menschen und der Gesellschaft zuwenden.


Der Christenmensch sieht sich dem Willen Gottes gegenüber. Welchen Weg soll er einschlagen? Statt eine diesseitige Hoffnung und ein diesseitiges Leben zu wählen, denn er hat von Gott ein Gesetz empfangen, das er begreifen soll. Den Willen Gottes begreifen heißt nichts anderes als Christus stets die Mitte seines Lebens sein zu lassen. Dann läßt sich auch eine auf den christlichen Glauben gegründete Ethik aufbauen, dann kann man sich auf die Suche nach eben diesen Werten für das christliche Leben machen.

Bei dieser Untersuchung stellt man fest, daß die moderne Ethik zuweilen etwas Wichtiges verfehlt hat, nämlich die Freiheit. Ein weiteres wichtiges Kennzeichen unsrer Zeit, der Drang nach Fortschritt und Leistung, bedrängt viele Menschen und wirft sie aus der Bahn. Doch die biblischen Angaben über den Fremdling und seine Annahme und die Forderung, ihn gut zu behandeln, stimmt mit heutigen Werten überein.

Mit dem Text *Centesimus Annus* hat die römisch-katholische Kirche ihre Soziallehre dargestellt, um einige von uns haben sich damit befaßt.

Wir Esperanto-Leute sprechen oft von der „Inneren Idee“. Welche Werte stehen dahinter? Sind sie mit den christlichen vereinbar? Wurden sie von den Esperanto-Freunden in den einstigen sozialistischen Ländern angewandt?

Zu Krieg und Kriegen bringen wir



ARTÍCULO DE TAPA

He aquí, luego de cinco años de interrupción, un nuevo número de *Evangeliaj Kajeroj* (*Cuadernos Evangélicos*), y se trata de un número doble. Por lo tanto les deseo una buena, inspiradora y agradable lectura.

Estos cinco años (y también algún tiempo antes) presenciaron la muerte de las ideologías. Luego de los años sesenta y setenta también las diversas Iglesias perdieron mucho de su influencia. Nuestro mundo ve ahora más y más problemas sociales, más y más pobres, más y más desocupados, más y más personas sin hogar, más y más desarraigados, es decir, más y más

zwei Texte, einen aus der Zeit vor dem Ersten Weltkrieg und einen andern vor dem Wüstensturm im Irak. Kriege haben viele Wunden geschlagen; Polen und Deutsche wollen sich gegenseitig vergeben.

Wie ließe sich außerhalb des christlichen Bezugsrahmens eine Sozialethik begründen? Auf dem Glück? Und sollte man die Literatur der Moral unterwerfen? Gibt es außer der Kunst für die Literatur noch andere Regeln?

Unsre Autoren werfen natürlich nicht nur Fragen auf, sondern schlagen auch Antworten vor. Denken Sie nun gut darüber nach, erforschen Sie, welche Werte Sie für sich übernehmen wollen, vielleicht mit dem ernsthaften Blick in Richtung Bibel, Christus.

Philippe COUSSON

personas sin esperanza.

Nuestro mundo vive ahora sin valores fijos y comunes. Se buscan valores, ya sea para el individuo, ya sea para las comunidades. Algunos logran proponer valores lamentables, como la propia nación (con exclusión de las otras), como la religión más pura (sólo la verdadera puede reinar, o incluso existir). También quedan entre las personas sinceras y humanitarias, algunos valores, como por ejemplo la solidaridad, la honestidad, la tolerancia.

Los cristianos en su variedad también buscan valores, valores para sí mismos, individualmente y comunitariamente, para los cristianos

dentro de la sociedad, y también valores para la sociedad.

Parte de este conjunto de importantes preguntas reciben un comienzo de respuesta en este número. De hecho, lo organicé partiendo de Dios y la Biblia, hacia el mundo, las personas y la sociedad.

La persona (cristiana) se encuentra ante la voluntad de Dios. ¿Qué camino elegirá? En lugar de elegir la esperanza de este mundo, la vida de este mundo, debe elegir la vida eterna, ya que ha recibido la ley de Dios, que debe comprender. Comprender la voluntad de Dios de hecho significa poner siempre a Cristo en el centro de su vida. Entonces será posible construir una ética basada sobre la fe cristiana, entonces será posible buscar correctamente los valores para la vida cristiana.

En esta búsqueda, se constata que a veces la ética moderna ha perdido de vista algo grave: la libertad. Otra grave característica actual, la búsqueda de „progreso“ y eficiencia, presiona y expulsa a muchas personas. Pero las indicaciones bíblicas sobre el extranjero y su aceptación, la exigencia de tratarlo bien, son congruentes con valores actuales.

Mediante el texto *Centesimus Annus*, la Iglesia Católica Romana ha

presentado su doctrina social, que ha sido objeto de estudio por parte de un grupo.


Nosotros los esperantistas frecuentemente hablamos de la „idea interna“. ¿Qué valores se encuentran en ella? ¿Son ajenos a los valores cristianos? ¿Fueron aplicados por los colegas esperantistas en los países ex-socialistas?

Ahí La guerra, las guerras. Presentamos dos textos, uno de antes de la primera guerra mundial, y otro de antes de la Tormenta del Desierto en Iraq. Las guerras causaron muchas heridas, que los polacos y alemanes desean perdonarse mutuamente.

¿Fuera del cuerpo de referencia cristiano, cómo podría fundarse una ética social? ¿Sobre la felicidad? ¿Debería someterse la literatura a la moral? ¿Existen, aparte del arte, normas para la literatura?

Por supuesto, nuestros autores no les dejan solamente preguntas, sino también proponen respuestas. Ahora ustedes mediten bien, exploren qué valores desean tomar para sí mismos, quizás contemplando seriamente la Biblia y a Cristo.

Philippe COUSSON



EDITORIALE

Ecco, dopo cinque anni di interruzione, un nuovo numero di *Evangeliaj Kajeroj* (*Quaderni Evangelici*) e si tratta di un numero doppio. Vi auguro una buona, stimolante e piacevole lettura.

Questi ultimi 5 anni (anche da un po'

prima) hanno visto la caduta delle ideologie. A partire dagli anni '60 e '70 hanno perduto molta della loro influenza anche le diverse Chiese. Il nostro mondo conosce adesso problemi sociali sempre più grandi, ha sempre più poveri, sempre più dei disoccupati, sempre più persone senza tetto, sempre più persone sradicate, cioè sempre più persone senza

speranza.

Il nostro mondo vive adesso senza valori base, senza valori comuni. Si è alla ricerca di valori, sia per il singolo che per il gruppo. Alcuni riescono a proporre valori spiacevoli, come la nazione (unica dalle altre), come la religione assolutamente più pura (solo quella vera ha diritto di esistenza e di guida).

Però qualche valore rimane tra gli uomini sinceri e umanitari, come, ad esempio, la solidarietà, l'onestà, la tolleranza.

Anche i cristiani, nella loro varietà, sono alla ricerca di valori, valori per sé stessi, singolarmente e comunitariamente, per i cristiani all'interno della società e anche valori per la società.

Alcune fra queste importanti domande hanno un inizio di risposta in questo numero. Le ho organizzate infatti a partire da Dio e la Bibbia al mondo, all'uomo e alla società.

L'uomo (cristiano) si trova di fronte alla volontà di Dio. Quale strada deve scegliere? Invece di scegliere la speranza di questo mondo, la vita di questo mondo, egli scelga la vita eterna, poiché egli ha ricevuto la Legge di Dio, che deve comprendere. Comprendere la volontà di Dio vuol dire di fatto mettere sempre Cristo al centro della propria vita. Sarà allora possibile costruire un'etica basata sulla fede cristiana, sarà allora possibile cercare proprio i valori per la vita cristiana.

In questa ricerca ci si rende conto che qualche volta l'etica moderna non oglie qualcosa di importante, ossia la

libertà. Un altro elemento importante quale la ricerca del „progresso“ e dell'efficienza preme su molti uomini e li esclude. Ma ciò che dice la Bibbia su chi è straniero e sulla sua accoglienza, l'esigenza di trattarlo bene, è conforme con i valori odierni.

Con il testo *Centesimus Annus* la Chiesa cattolica romana ha presentato la sua dottrina sociale che un gruppo ha studiato.

Noi esperantisti parliamo spesso dell'„idea interna“. Che valori ci sono in essa? Sono distanti da quelli cristiani? Gli esperantisti li hanno applicati negli ex paesi socialisti?

Ha, la guerra, le guerre. Vi presentiamo due testi: uno precedente alla prima guerra mondiale e l'altro di prima dell'operazione „Tempesta nel deserto“ in Iraq. Le guerre hanno provocato molte ferite, che i polacchi e i tedeschi vogliono perdonarsi a vicenda.

Al di là dei riferimenti cristiani, come è possibile fondare un'etica sociale? Sulla felicità? E la letteratura deve sottostare alla morale? Oltre a quelle per l'arte, esistono delle regole per la letteratura?

I nostri autori non vi danno ovviamente solo delle domande, ma propongono altresì delle risposte. Adesso meditate bene, cercate i valori che volete per voi stessi, forse guardando seriamente alla Bibbia, a Cristo.

A presto

Philippe COUSSON

VOLO KAJ VOJO

Por nia 41-a internacia KELI-kongreso en Jönköping, Svedio, 1991, ja estas la ĝenerala temo „vojoj“, sed ankaŭ temas pri el-elekto kaj volo, tiu ĉi de homo(j) kaj de Dio. La Dia volo kaj ago ĉiam estas bona, kaj lial Li estas ĉiam laŭdenda.


«Inda Vi estas, ho nia Sinjoro kaj nia Dio, ricevi la gloron kaj la honoron kaj la potencon; ĉar vi kreis ĉion, kaj pro Via volo ĉio ekzistis kaj kreiĝis.» (Apo 4:11).

Al la mirinda kreitaro kaj al la mirinda(j) kreita(j) ankaŭ ni esperantistoj apartenas, kaj nia Di-donita lingvo.

Lau la bildo de Dio

Dio estis kreinta ĉion, kaj Dio vidis, ke ĝi estas bona, sed ankoraŭ neniun estaĵon, kun kiu Li povus paroli kaj al kiu Li povus montri Sian amon, kiel al libera, memstara, amoplana amiko.

«Kaj Dio diris: Ni kreu homon lau Nia bildo, similan al Ni; kaj ili regu



- ▣ VOLO DE DIO, HOMO
- ▣ VOLONTÉ DE DIEU, HOMME
- ▣ GOD'S WILL, MAN
- ▣ GOTTES WILLE, MENSCH
- ▣ VOLUNTAD DE DIOS, HOMBRE
- ▣ VOLONTÀ DI DIO, UOMO

super la fiŝoj de la maro kaj super la birdoj de la ĉielo kaj super la brutoj, kaj super ĉiuj rampaĵoj, kiuj rampas sur la tero. Kaj Dio kreis la homon laŭ Sia bildo, laŭ la bildo de Dio Lin kreis lin ; en formo de viro kaj virino Li kreis ilin » (Gen 1:26-27).

Ho, kiel mirinde, ke Dio kreis nin „laŭ Sia bildo, laŭ la bildo de Dio“ ! Ho, vi homo, ĉu vi scias, ke vi havas Dian belon kaj valoron ? Kaj ĉu vi ankaŭ scias, ke estas la Triunua Dio, kiu faris tion ? « Ke ni kreu homon ! Ni, la Patro, la Filo kaj la Sankta Spirito. »


En la Sinjoro

Kaj venis la tago de la falo. Centre de la Ĝardeno en Eden estis kaj la „arbo de sciado pri bono kaj malbono“ kaj la „arbo de vivo“. Jesuo Kristo estas la arbo de vivo :

« Mi estas la vera vinberarbo, kaj mia Patro estas la kultivisto, » diras Jesuo (Joh 15:1).

« Sinjoro, ni ne scias, kien vi iras ; kie/ ni konas la vojon ? Jesuo diris al li [Tomaso] : Mi estas la vojo kaj la vero kaj la vivo ; neniu venas al la Patro krom per mi » (Joh 14:6).

Mi kredas, eĉ mi scias, ke se la homo estis unue iranta al la arbo de la vivo, li-ŝi baldaŭ poste ekhavis la vokon ankaŭ iri al la arbo de sciado pri bono kaj malbono. Se ni unue manĝus de la „Arbo de la vivo“, ni



feliĉe manĝus ankaŭ de la „Arbo de scio pri bono kaj malbono.“

« Kaj la virino vidis, ke la arbo estas bona por manĝi kaj ĝi estas ĉarma por la okuloj, kaj la arbo estas dezirinda por saĝiĝi » (Gen 3:6).

Ĉu ne manĝo, ĉarmo kaj saĝo estas bonaj por kristano ? Jes, tio estas bona, eĉ kiam oni volas ge-edziĝi :

« Edzino estas ligita tiel longe, kiel vivas ŝia edzo ; sed se la edzo mortis, ŝi estas libera edziĝi kun iu, kun kiu ŝi volas ; nur en la Sinjoro » (1 Kor 7:39).

Do, se estas farite en la Sinjoro, estas permesate viziti la „Arbon de sciado“.


Al kiu la gloro ?

Ankaŭ la estonteco de nia kara lingvo, Esperanto, dependas de la maniero uzi ĝin, ĉu al nia gloro, ĉu al la Dia Gloro :

« Sur la tuta tero estis unu lingvo kaj unu parolmaniero [...] Kaj ili diris : Venu, ni konstruu al ni urbon kaj turon, kies supro atingos la ĉielon, kaj ni akiru al ni gloron, antaŭ ol ni disiĝos sur la suprejo de la tuta tero » (Gen 11:1,4).

Kia unueco, kia kapablo, kia talento, kiaj eblecoj !

« Kaj Kiu naskigis Nimrodon, kiu komencis esti potenca sur la tero. Li estis potenca ĉasisto antaŭ la Eter-



nulo ; tial oni diras : Kiel Nimrod potenca ĉasisto antaŭ la Eternulo » (Gen 10:8-9).

Oni volas gardi la unuecon kaj krei kontaktojn super la tuta tero, sed al sia propra gloro, ne al la Gloro de Dio.

« Kaj la Eternulo diris : Jen estas unu popolo, kaj unu lingvon ili ĉiuj havas ; kaj jen, kion ili komencis fari, kaj ili ne estos malhelpataj en ĉio, kion ili decidis fari. »

Dio vidis la danĝeron de tia povo en la pekemaj manoj de homoj. Li *« konfuzis tie ilian lingvon »*, kaj Li *« disigis ilin de tie sur la supraĵon de la tuta tero, kaj ili ĉesis konstrui la urbon »* (Gen 11:6-8).

Pro la malboneco de la homo la plano(j) de Dio fiaskis fojon post fojo, sed Sian bonan celon Li ne penti :

« Kaj la potenculo de Izrael ne ŝanĝos Sian decidon kaj ne pentos ; ĉar Li ne estas homo, ke Li pentu » (1 Sam 15:29).

Kiam Dio venigis la akvan diluvon sur la teron por ekstermi ĉiun karnon, havantan en si spiriton de vivo sub la ĉielo, tiam Li

« ne indulgis la mondon antikvan, sed gardis Noan kun sep aliaj, predikanton de justeco, kiam Li sendis diluvon sur la mondon de malpiuloj » (Gen 7 ; 2 Pet 2:5).

« Kaj cindriginte la urbojn Sodom kaj Gomora [...] [Li] savis justan Loton,

ĉagrenegatan de la senbrida konduto de la malvirtuloj » (2 Pet 2:6-7).

La Diaj volo kaj vojo

Dio ĉiam havas kaj volon kaj vojon, sed ankaŭ la homo akceptu la Dian volon kaj vojon ! Ni ĉiuj aŭdis pri la granda ofero de Abraham kaj pri la vortoj de la anĝelo de la Eternulo (kiu ja estas Jesuo) :

« Mi ĵuras per Mi, diras la Eternulo, ke ĉar vi faris tiun aferon kaj ne indulgis vian filon, la solan ; tial Mi benos vin kaj Mi multigos vian idaron simile al la steloj de la ĉielo kaj al la sablo sur la bordo de la maro ; kaj via idaro posedos la pordegojn de siaj malami-kaj » (Gen 22:15-17).

Per la kredo al Jesuo ankaŭ ni, KELI-anoj, estas gefiloj de Abraham, kaj ni estos multegaj !

Sed eĉ male, kiel kiam la reĝo David estis falinta en grandan pekon, tiam ankoraŭ estas savo kaj eliro :

« Koron puran kreu al mi, ho Dio, kaj spiriton fidelan novigu en mi. Ne forpuŝu min de Via vizaĝo, kaj Vian sanktan spiriton ne forpenu de mi. Redonu al mi la ĝojon de Via helpo ; kaj spirito bonfara fortiku min. [Tiam] Mi instruos al la krimuloj Vian vojon ; kaj pekuloj revenos al Vi » (Psa 51:10-13).

La efektoj de savo

Kaj ni ankaŭ kun ĝojo memoras, kiel kristana menso povas ŝanĝi malbonon en bonon :

« Sed Jozef diris al ili [siaj fratoj] : Ne timu ; ĉar ĉu mi estas anstataŭ Dio ? Vi intencis fari al mi malbonon ; sed Dio aranĝis de tio bonon, por fari tiel, kiel nun estas, por konservi la vivon de multe da homoj » (Gen 50:19-20).

Kaj kiel mirinda ne estas la vivo de la profeto Daniel ? Li eĉ konvertis la grandegan reĝon Nebukadnecar de Babel, kiu diras tiele pri sia konvertiĝo :

« En tiu tempo revenis al mi mia prudento, kaj mi ricevis denove mian reĝan honoron [...] Nun mi, Nebukadnecar, laŭdas, altigas, kaj gloras la Reĝon de la ĉielo, kies ĉiuj faroj estas veraj kaj kies vojoj estas ĝustaj » (Dan 4:36-37).

Jam la Malnova Testamento estas plena de Dia volo kaj Dia vojo por la homaro, kaj ĝi finiĝas per la mirinda profetaĵo pri la reveno de Elija :

« Jen Mi sendos al vi la profeton Elija, antaŭ ol venos la granda kaj timinda tago de la Eternulo ; kaj li returnos la koron de la patroj al la infanoj, kaj la koron de la infanoj al iliaj patroj [...] » (Mal 4:5-6).

Kaj Jesuo mem en la Nova Testamento diras :

« Ĉar ĉiuj profetoj kaj la lego profetis ĝis Johano. Kaj se vi volas tion ricevi, tiu estas Elija, kiu estis venonta » (Mat 11:13).

En la Nova Testamento plenumiĝas la pensoj de Dio. Ni feliĉe akceptu la Dian volon :


« Li [Jesuo] venis al siaj propraj, kaj la propruloj lin ne akceptis. Sed al ĉiuj, kiuj lin akceptis, li donis la raŝton fariĝi filoj de Dio al la kredantoj al lia nomo, kiuj naskiĝis nek el sango, nek el volo de karno, nek el volo de homo, sed el Dio » (Joh 1:11-13).

Observu ke temas pri tri volo, volo de karno, volo de homo kaj volo de Dio ! La apostolo Paŭlo skribas pri sia propra volo :

« Ĉar mi ne havas certecon [= mi ne komprenas] pri tio, kion mi faradas ; ĉar mi ne agas laŭ tio, kion mi volas ; sed kion mi malamas, tion mi faras [...] Ho ve, mi malfeliĉulo ! kiu min liberigos el la korpo de ĉi tiu morto ? Danko estu al Dio, per Jesuo Kristo, nia Sinjoro » (Rom 7:15,24-25).

Kaj ni ĉiuj konas la triumfan elkrion de Paŭlo :

« Ĉar mi konvinkiĝis, ke nek morto, nek vivo, nek anĝeloj, nek aŭtoritatoj, nek estantaĵoj, nek estontaĵoj, nek potenco, nek alteco, nek profundeco, nek iu alia kreitaĵo povos apartigi min de la amo de Dio, kiu estas en Kristo



Jesuo, nia Sinjoro » (Rom 8:38-39).

Ankaŭ al mi persone venis la voko de Jesuo, kiel al la Evangeliiisto Mateo, kaj de mia junaĝo mi volas sekvi Jesuon :

« Kaj Jesuo, forpasante de tie, vidis viron nomatan Mateo, sidantan ĉe la impostejo ; kaj li diris al li : Sekvu min. Kaj li stariĝis, kaj sekvis lin » (Mat 9:9).


Pri tio mi volas citi poemon de la amata poeto Bo SETTERLIND, en *Den Svenska psalmboken 1986* (la Sveda himnaro), himno 303:1,3, en mia propra traduko.

Jes, estas voj' al la ĉiel',
jes, al Jeruzalem' de Di',
la vojo jen la sankta fid',
al la Dia Fil', Jesuo Krist'.

Ĉu ne por vi la sama voj',
ĉu ne la vort' kun fid' ankoraŭ,
la dubo for, nur ek al kred',
jes, estas pont' de kred' al pac'.

Gustav STENHOLM†

1991/06/26



Gustav STENHOLM, mortinta en 1995, sveda KELI-ano kontribuis en *Dia Regno*. Lia ĉefa verko estas *Min egen svenska diktsamling* : Mia propra sveda poemaro, broŝuro de pli ol 150 paĝoj, kie li trairas, tradukas kaj komentas la svedan poezion.

LA LEGOJ DE LA ETERNA VIVO


La kredantoj bone scias, ke la lasta malamiko estas morto. Ankaŭ oni scias, ke ili ricevos la eternan vivon, kondiĉe ke ili plenumu la volon de la Patro, nome : ekvidu la Filon kaj kredu lin ! La vorto de la Evangelio estas por ili vivo kaj spirito.

Paco kaj leĝo de amo

La Sankta Skribo instruas, ke la Vivanto portas la pacon nur al la homoj, kiuj Lin amas. Grande eraras tiuj, kiuj komprenas la amon, kiel kontentigon de karnaj deziroj, aŭ idealisman ekzaltecon de ili. La evangelia kompreno de amo estas kontraŭa, humileco. Se homo pretendas je amo al la Vivanto, tiam li devas rifuzi esti la propra sinjoro, kaj devas en ĉio celi la Regnon de Dio. Pro ĉi tia amo, la Venkanto respondos per amo.

Sed por malamiko al la Vivanto, ne estas kompato, kaj pri tio ni povas legi ĉie en la Biblio :

« Ne supozu, ke mi venis, por enkonduki pacon sur la teron ; mi venis, por



- LEGO, VOLO DE DIO, ETERNA VIVO
- LOI, VOLONTÉ DE DIEU, VIE ETERNELLE
- LAW, GOD'S WILL, ETERNAL LIFE
- GESETZ, GOTTES WILLE, EWIGES LEBEN
- LEY, VOLUNTAD DE DIOS, VIDA ETERNA
- LEGGE, VOLONTÀ DI DIO, VITA ETERNA

enkonduki ne pacon, sed glavon. »
(Mat 10:34)

« Ĉu vi supozas, ke mi alvenis, por doni pacon sur la tero ? Mi diras al vi : Ne ; sed pli vere disigon. » (Luko 12:51)

Sekve, kiu volas saviĝi, tiu devas demonstri amon al la Vivanto, humilecon. Emo de la homoj al tia amo estas evidenta.

Leĝoj laŭ homa volo

Nur malgranda parto de la homoj pretendas esti sinjoroj. Ili fiere pri si mem uzas la vorton demokratoj, multe babilas pri la homaj rajtoj, pri juraj ŝtatoj, pri konstitucioj. Sed ili volas, ke la loĝantaro vivu laŭ leĝoj de ilia volo. Satano, la princo de la mondo, kies leĝoj regas en la socio, estas kontraŭulo al Dio kaj malamiko de la homoj. Ĉiu sekvanto de la leĝoj de la propraj deziroj estas mortintoj por la Regno de Dio. Nur la volo de la Vivanto povas fariĝi la ĝusta leĝo.

Leĝoj de nova vivo

Legu ankoraŭfoje la vortojn de apostolo Paŭlo :

« Nia burĝarito estas en la ĉielo, de kie ni atendas Savanton, la Sinjoron Jesuo Kristo. » (Fil 3:20)

Por ricevi la eternan vivon, anstataŭ submetiĝi al la leĝo de profito, estas necese malkovri sin al la Vivanto, kaj akcepti tion, kion li donacas. Tian kunulecon kun la

Vivanto, nek morto, nek pereco povas rompi ĝin. La fido estas realigo de la esperataĵoj, provado de aferoj ne vidataj (Heb 11:1), kaj daŭras eĉ post foriĝo de sur la tero.

La vivado en Esperantujo, en la ĉiela lando, trans la limoj de la tera burĝarito, enhavas radikalajn ŝanĝojn en la ekzistado, ĝi enhavas alian kvaliton kaj sencon, kies naturo ne povas pereci. En ĉi tiu enestas dieca kaj eterna vivo. La beatecon oni komprenas, kiel eblecon pensi pri la eterna vivo, kiel tempo plilongigita, kaj promesita al ni. De kiam ni transpaŝos la limon de morto, t. e. de la tera burĝarito, antaŭ ni aperos alia parto de la mondo, kiu donos eternan **nunon**, en la ĉiela Esperantujo. Nur tie homoj povas vivi laŭ la dimensioj de la releviĝo, kaj ne plu en la malvastajo de la tempo. Tien ili povas foriri se ili sukcesos kunligi sian vivon kun la leĝoj de la lando, kiu ne havas limojn. En tiu ĝardeno la homo estas destinita por servi kiel salo de la tero kaj lumo por ĉio en la domo. Tial ĉiu laboranto en ĝi povas vidi bonajn farojn kaj glori la Patron, vivanta en la ĉielo.

La releviĝo de homo estas por li ŝanĝita vivo, daŭranta en eternecon, koncernanta la tutan homon, ne nur animo, spirito aŭ korpo. Tute ne temas pri abstrakta restaĵo de spirito aŭ duone reala ombrospekulaĵo de okultistoj pri korpo kaj animo.

La eterna vivo ne dependas de la eco de la homo, sed tute kaj plene ĝi estas suverena farado de la Vivanto. Pro tio ni



havas la miraklon de la mirakloj, la releviĝon de Jesuo, kiel fundamenton por la kristana certeco pri eterna vivo.

Venu Sinjoro Jesuo !

Ciu homo aŭdis, ke la Vivanto posedas energion sufiĉan por submeti al si ĉion (Fil 3:21). Tamen multaj el inter ni atentis al surteraĵoj. Sed necesas atenti al aferoj ĉielaj kaj serĉi la Savanton. Estus eraro limigi kristanan esperon al la liberigo de la individuo el la tiraneco. Prudento de releviĝo estas asimili la leĝojn de la ĉielo, kaj komenci realigi ilin sur la tero.

Sur la tero estis kaj restas nur unu sola Sinjoro, al kiu povas alvoki ĉiu kredanto : Venu, Sinjoro Jesuo !

Vladimir STAROSTIN

Koncizigita artikolo



EN LA CENTRO DE LA BILDO

Sammaniere kiel Leonardo da Vinci metis Kriston en la centro de sia pentraĵo, ni devas zorge elekti kion ni metas en la centro de la bildo en nia vivo.

Mi petas vian indulgon pro tio, ke mi elektas paroli pri nekutima temo. Sed mi esperas, ke tio, kion mi diros al vi estos interesa kaj donos iun moralinstruon. Tio estas mia pravigo.

Kiam mi ĉeestas Diservon en ĉi tiu kapelo, mi ne povas ne rigardi al la bildo, kiu pendas super la altaro. Jen mia temo. Mi volas paroli pri tiu bildo, aŭ pli ĝuste, pri la originala pentraĵo.

La originalo estas, kompreneble, tiu fama art-trezoro el la pasinteco, la murpentraĵo de Leonardo da Vinci, *la lasta vespermanĝo*.

Leonardo vivis dum unu el la plej ekscitaj periodoj en la historio de Eŭropo, Renesanco, vorto kiu signifas „renaskiĝo“. Kaj efektive „renaskiĝo“ ĝi vere estis. Jus finiĝis mezepoko, tiu tempo de fizikaj kaj intelektaj limoj. La tagiĝo de tiu nova epoko,



- LEONARDO DA VINCI, KRISTANA VIVO.
- LEONARDO DA VINCI, VIE CHRÉTIENNE.
- LEONARDO DA VINCI, CHRISTIAN LIFE.
- LEONARDO DA VINCI, CHRISTLICHES LEBEN.
- LEONARDO DA VINCI, VIDA CRISTIANA.
- LEONARDO DA VINCI, VITA CRISTIANA.

kiun la historiistoj nomas la „moderna epoko“, ekmontriĝas sur la horizonto. Renesanco kaj reformacio kune signis la finiĝon de la tutmonda superregado de la mezepoka eklezio. La malnova ordo ŝanĝiĝis. La homa spirito liberiĝis. Kiel ĉiu revolucia periodo, ĉi tiu nova epoko estis tempo de grandaj homoj kaj grandaj movadoj. Oni povas mallonge difini la etoson de tiu epoko, kiel la „serĉado al la Vero kaj al la Belo“. Tial ĝi estis interesa periodo, kiu produktis multe da geniuloj : artistoj, literaturistoj, filozofoj, esploristoj, k.a.

... serĉado al la Vero kaj al la Belo ...

Inter tiuj geniuloj Leonardo da Vinci estis unu el la plej eminentaj. Leonardo naskiĝis en la norditala urbeto Vinci, en la jaro 1452, kaj mortis en Francujo en 1519. Dum sia vivo li distingiĝis sin en multaj fakoj de homa agado, kiel pentristo, skulptisto, inĝeniero (civila kaj milita) kaj ankaŭ arkitekto. Li studis preskaŭ ĉiun fakon de la tiutempa scienco kaj filozofio : astronomion, kosmologion, geologion, anatomion, ktp. Vere, li estis multflanka geniulo.

Li estis homo de granda pacienco, kaj homo, kiu strebis al perfekteco en tio, kion li faris. Li estis kombinaĵo de praktikulo kaj idealisto. Por li, ĉio, eĉ la plej malnobla objekto en la Naturo, havas signifon. Neniu, kaj nenio, estas malŝatinda. Li skribis :

« Amo fontas el granda scio pri la objekto amata. »



« Amo estas filino de scio, kaj amo estas tiel profunda, kiel certa estas scio. »

« Amo venkas ĉion. »

Amo venkas ĉion.

Strange estas, ke ĉi tia homo, kiu tiumaniere laŭdas amon, povis kun ŝajna aplombo elpensi la plej kruelajn kaj detruajn militmaŝinojn. Ĉi tio tute ne akordiĝas kun liaj humanaj sentoj, kiuj kaŭzis, ke li sentu naŭzon pri la militado, kaj inspiris lin difini la bataladon kiel la « plej bruteca frenezo. » Stranga kombinaĵo de kontrastaj escoj !

Li ne estis pia, laŭ la eklezia dogmo de tiu tempo. Tamen, certe estas, ke li havis religian senton, kaj ke li kredis je la ekzisto de homa animo, de Dio, kaj al la interrilatiĝo de la du.

La originalo de lia majstra verko *La lasta vespermanĝo* estis pentrita sur la mallarĝa norda muro de ĉambro, kiu estis la manĝejo de la dominikana monaĥejo de S. Maria delle Grazie en Milano.

La bildo estis pentrita tiel, ke ĝi prezentis la iluzion de plilongigo de la manĝoĉambro. La muroj estas reproduktajo de la muroj en la ĉambro mem, kaj la pejzaĝo, kiun oni vidas tra la fenestroj, estas tipa de la pejzaĝo de la tiutempa Lombardio, ĝuste tia, kian povis vidi la monaĥoj tra la fenestroj en la monaĥejo. La celo estis doni la impreson, ke Kristo ĉeestas la manĝon, kaj oficas en la plej



alta loko (Mi flanke diru, ke la pentraĵo estas longa 9-m kaj alta 4 -m, sufiĉe granda kaj impresa).

Tamen, la sorto estis malbona al la pentraĵo, kaj dum la jaroj ĝi multe difektiĝis. Tio, kion oni nun vidas, estas nur ombro de la originala majstraĵo.

Pluraj faktoroj kontribuis al la malboniĝo. La situo kaj la naturo de la muro sur kiu ĝi estis pentrita, forte kontribuis. La muro prezentas sian eksteran flankon al nordo, de kie venas la severa vetero. La ŝtonoj, el kiuj oni konstruis la muron, enhavas grandan proporcion da salpetro aŭ nitrato. Tiaj ŝtonoj facile absorbas la malsekon, kiu frue atakis la pentraĵon de malantaŭe. Krom tio, de tempo al tempo okazis inundoj. Almenaŭ unufoje la tuta verkaĵo subakviĝis. Ankaŭ la materialo, kiun uzis Leonardo, nome la oleaj koloriloj, ne estis taŭgaj en tiuj cirkonstancoj.

Jam frue la verkaĵo fariĝis pala kaj malklara. Sed la plej grandaj kaŭzoj de la malboniĝo estas la nescio, la neglekto, kaj la detruemo de postaj generacioj.

... **nescio, neglekto, detruemo** ...

En la jaro 1652 la monaĥoj konstruigis pordon tra tiu parto de la bildo sube de la figuro de Kristo. Ili devus scii pli bone, sed la deziro plifaciligi vojon al kaj de la kuirejo estis pli forta ol ilia artisma sento. La rezulto estas, ke tiu faro tute detruis la piedojn de la Savanto kaj difektis la tutan bildon (Oni povas

vidi la supran parton de frontono en la [ĉi-preĝeja] reproduktaĵo). Iam poste, oni najlis imperian blazon-ŝildon sur tiun bildon. Ĉi tio kovris almenaŭ grandan parton, se ne la tuton, de la figuro de Kristo.

Dum la milito kontraŭ Francujo en 1796, la invadantaj francoj uzis la ĉambron unue kiel ĉevalejon, poste tenejon, kaj laste kiel malliberejon. La lasta mondmilito ankaŭ aldonis al la difektado, kaŭze de bombatakoj.

Feliĉe la malbonuzo jam ĉesiĝis. Tamen, por akiri bonan komprenon pri la formo kaj brilo de la originalo, ni devas nin turni al la multaj kopioj kaj gravuraĵoj, kiujn faris aliaj artistoj ek de la tempo de Leonardo mem.

En la tempo, kiam Leonardo laboris super sia majstraĵo, venas al ni amuza anekdoto.

Oni diras, ke la pentristo kutimis stari eĉ duontagon antaŭ sia verko, perdita en la meditado, kaj eĉ ne eklevi la penikon. Al la prioro de la monaĥejo, ĉi tiu neagemo ŝajnis esti malŝparo de tempo, kaj li multe ĉagreniĝis. Li protestis al Leonardo, sed tiu ne respondis. Fine la prioro iris al Duko Ludoviko, la patrono de Leonardo, kaj plendis pri la „mallaborema” pentristo. La duko admonis Leonardon, samtempe certigante al li, ke li tion faras, nur por kontentigi la prioron. Leonardo koleris. Li klarigis al la duko, ke grandaj mensoj faras des pli multe, ju malpli ili ŝajne laboras, ĉar iliaj intelektoj elpensas





ideojn, kiujn iliaj manoj nur poste ellaboras en konkreta formo. La duko estis prudenta, inteligenta homo, kaj bone komprenis. Plue la artisto anoncis, ke li ankoraŭ serĉas modelojn por du vizaĝoj, kiujn li ankoraŭ devas pentri sur la bildo. Unu estas tiu de Kristo, por kiu li ne povis trovi taŭgan modelon sur la tuta tero. La alia estas tiu de Judas. Por reprezenti ĉi tiun li ne povis elpensi vizaĝon sufiĉe malnoblan por prezenti tiun kanajlon, kiu tiel hontinde perfidis sian Sinjoron. Sed nun li ne plu serĉas : se ne baldaŭ prosperos al li trovi tian modelon, li povos uzi kiel modelon la vizaĝon de la prioro mem. La duko ridis. La prioro ne plu plendis, ĉar li tute ne volis, ke la estontaj generacioj konu lian vizaĝon kiel tiun de Judas.

... grandaj mensoj faras des pli multe, ju malpli ili ŝajne laboras ...

La bildo prezentas la scenon ĉe la lasta vespermanĝo, post kiam Jesuo diris, « Vere, vere, mi diras al vi, ke unu el vi min perfidos. » Leonardo montras al ni la reakciojn de la disĉiploj, kiam ili aŭdis ĉi tiun frapantan frazon. Ĉiu disĉiplo esprimas sian temperameton, sian karakteron, sian plej profundan senton. Kolero, abomeno, scivolo, protesto, indigno, ĉi ĉi reflektiĝas sur la vizaĝoj de la dek du.

Kaj ne nur la vizaĝoj, sed la tutaj korpoj partoprenas en la esprimado de la emocioj. Jen unu ekstaras, alia sin retiras pro kolero, alia juras al la ĉielo pri sia senkulpeco, alia

protestas kun la mano ĉe la brusto, kaj tiel plu.

La komponado de la bildo rivelas la genion de la pentristo. Iu kritikisto difinas ĝin per la vortoj « egalpezo de simetrio kun vario. » Estas vario en la gestoj de la disĉiploj. Eĉ ne unu ripetiĝas. Samtempe la simetrio enestas. La disĉiploj aranĝiĝis en grupoj po tri figuroj, egale ambaŭflanke de la Savanto. La perspektivo servas por tiri nian atenton al la centra figuro de Kristo. La flankaj muroj inklinas al la muro en la fono, tiel kvazaŭ kunpremante nian rigardon al la centro de la bildo.

... egalpezo de simetrio kun vario ...

La du flankaj fenestroj emfazas la pli larĝan mezan fenestron, kiu kadumas la kapon de Kristo. Ĉio, la traboj de la plafono, la efiko de la kvazaŭ leviĝantaj kaj malleviĝantaj linioj de la disĉiploj, ĉio altiras niajn okulojn al la figuro de Kristo, tiu en la centro de la bildo. Tiel li sidas kvazaŭ prilumita de hela ĉiela lumo, kvazaŭ kun nimbo post la kapo. Tie li sidas, en la ĉefa loko, **en la centro de la bildo.**

... en la centro de la bildo ...

Nun mi venas al la kerno de mia parolo, „en la centro de la bildo“. En tio mi vidas parabolon. Ĉiu homo estas artisto. Lia vivo estas la bildo, kiun li pentras. Ne ĉiu homo estas tiel genia en la arto, kiel estis

Leonardo en la arto de pentrado. Ne ĉiu povas krei majstraĵon. La Naturo ne donas egalvaloran materialon al ĉiuj. Unuj komencas la vivon kun korpaj difektoj, ili ne ricevas bonan „kanvason”. Al aliaj mankas bonaj penikoj aŭ koloriloj, tio estas la talentoj. Ne ĉiu havas la saman oportunecon, povoscion aŭ gvidajn principojn. Tamen, ĉiu el ni, vole-ne-vole laboras super la verkado de sia vivo. Ne ĉiuj povas verki majstraĵon, sed kio gravas, estas tio, kion ni havas „en la centro de la bildo”.

« Kia la penso, tia la homo. » La celo, kiun ni havas en la vivo influas la vivon mem. Rigardu homon. Kio estas la celo, la idealo, kiun li havas „en la centro de la bildo” ? Homoj eminentaj kaj ne- eminentaj postlasas sian influon laŭ tio, kion ili elektas por esti „en la centro de la bildo”.

...Kia la penso, tia la homo...

Se ni konsideras tiujn, kiuj lasis sian markon sur la homa historio, ni povas tuj kompreni, kio estas tio, kion ili havis „en la centro de la bildo”. Ni povas pensi pri la sciencistoj, artistoj, reformistoj, filantropoj, religiuloj kaj similaj. Louis PASTEUR, kiu laŭ sia propra aserto elektis kiel sian celon la deziron « aldoni etan kvanton al la neforta kaj necerta konstruaĵo de nia scio pri la profundaj misteroj de la Vivo kaj de la Morto. » Marie CURIE, kiu en siaj propraj vortoj dediĉis sian vivon al la « bonstato de la homaro. » Patro Damien (Joseph DE VEUSTER) kiu oferis

sian vivon en servado al lepruloj. Elizabeth FRY, kiu laboris por plibonigi la sorton de la mizeruloj. John WESLEY, kiu celis doni la evangelion al la homamasoj. George MULLER, el Bristol, kiu fidante al sia Sinjoro, fariĝis patro al centoj da georfoj. Nia propra Doktoro ZAMENHOF, kiu revis pri tutmonda paco kaj laboris ĉe la kreado de nia „kara lingvo” por tiu celo. Kaj en niaj nunaj tempoj, la fama sed humila Doktoro SCHWEITZER, kun sia servo al niaj negraj gefratoj kaj la alta doktrino de „respekto al la vivo”. Jen kelkaj — troviĝas ja multaj aliaj — kaj ni bone scias pri tio, kio estis „en la centro de la bildo” de iliaj vivoj.

Ni ankaŭ povas pensi pri aliaj, kiuj ne elektis altajn noblajn celojn por esti „en la centro de la bildo” por ili. Homoj kiuj ne hezitis apelacii al la glavo „sangan soifanta”, por antaŭenigi sian ambicion. Homoj, kiuj dediĉis sian vivon al la akirado de riĉo, de famo. Sed sufiĉas. Oni povas daŭrigi la liston de homoj, kies vivoj kreis bonon aŭ malbonon laŭ tiu idealo, kiun ili elektis. La instruo estas simpla. Nia vivo, la rezulto de tiu vivo, dependas de tio, kion ni havas „en la centro de la bildo”. Leonardo metis Kristo „en la centro de la bildo”. Pli bonan idealon ni, kiel kristanoj, ne povas elekti. Sed al ĉiuj, ĉu kristanoj, ĉu ne-kristanoj, mi volas lasi ĉi tiun lastan penson. La regulo por atingi feliĉon kaj sukcesan vivobildon estas simpla : celu al la bono kaj feliĉo de aliaj. Metu tiun dealon „en la centro de la bildo”, kaj vi ne estos



malproksima de la Regno de la Ĉielo.

Celu al la bono kaj feliĉo de aliaj.

prediko, 1967/11/26,
(Bristol ?)

Dio benu vin. ☛

Albert V. KING†

Albert Victor KING (1910-1992), muzeo-kuratoro, UEA-membro, KELI-ano esperantistiĝis en la fruaj jaroj 1920. [...] Distinge li servis en la bristola Esperanto-societo, prelegante, prezidante, instruante. [...] Memorindaj restos liaj predikoj en la bristolaj Diservoj. Rimarkinda estis lia amo por ĉiu formo de vivo. C.C.P.



LA FONTO DE ETIKO

Filozofia/scienca aŭ kristana etiko

Etiko estas scienca teorio, teoria sistemo, filozofia teorio. Ĝi estas materia teorio pri la konduto de homoj. Estas kristana teorio pri la vivo ĝenerale de la gefiduloj.

La termino etiko devenas el la greka vorto *ἠθικη*, kaj tiel superregis preskaŭ al ĉiuj lingvoj, kvankam kelkaj scienculoj, kiuj ne akceptas la ekziston de Dio, interpretis aŭ tradukis la grekan terminon per la vorto *morale* (franca) kaj *Sittenlehre* (germana), kiujn produktis la vortoj *mos* (latina) kaj *Sitte* (germana), kiuj signifas nur ion eksteran de la manieroj de konduto de homo. Ankoraŭ ili uzas la terminojn : *practical philosophy* (praktika filozofio, angla). Cicerono uzis la terminon *philosophia moralis* tradukante la grekan vorton *ἠθικη*.

La unua kiu kaptis la sencon de etiko estas la filozofo Aristotelo el la urbo Stajera, en norda Grekujo. Laŭ li, etiko signifas ion internan, la pensadon, la karakteron, la firman

- ▣ ETIKO, KRISTANA FIDO
- ▣ ÉTHIQUE, FOI CHRÉTIENNE
- ▣ ETHICS, CHRISTIAN FAITH
- ▣ ETHIK, CHRISTLICHER GLAUBE
- ▣ ÉTICA, FE CRISTIANA
- ▣ ETICA, FEDE CRISTIANA



manieron fari. Ankoraŭ ĝi signifas la sumon de la virtoj, kaj la traktaton pri etikaj aferoj. Finafine, ĝenerale firmiĝis la terminoj : filozofia kaj scienca etiko kaj kristana etiko.

La filozofia kaj scienca etiko prezentiĝas sub tiom da formoj, kiom estas la amaso da filozofoj kaj scienculoj, kiuj volas fiksi ĝian enhavon, bazataj sur la eksteraj kriterioj de la homaj agoj/faroj. Sekve ne ekzistas objektiva indo, ke oni povu kompari la homajn agojn/farojn, ĉu ili estas bonaj aŭ malbonaj.

La kristana etiko estas objektiva sistemo kaj teorio, kiu baziĝas sur la Evangelia virto, pri kiu neniue libere pensanta homo povas dubi.

Ambaŭ estas praktikaj sciencoj kaj traktas la etikan vivon de homo. La filozofia kaj scienca etiko pretekstas nur la naturon de homo, dum la teologia kristana etiko ekzamenigas la etikaj aferojn de la etika vivo de la gefiduloj, kiel ĝi kreskas sur kristana tero. La etikaj instruoj de la filozofia kaj scienca etiko estas simplaj pretendoj. La teologia kristana etiko estas la sola, kiu elĉerpas el la fido al Dio por plenumi la etikajn regulojn, kiuj estas aŭtentikaj kiel donitaj el Dio mem.

La anoj de la filozofia kaj scienca etiko povas malkonsenti inter si mem, ĉar ĉiu havas sian opinion pri la etika vivo de la homo, kaj ne akceptas la opinion de aliaj. Sed la anoj de la teologia kristana etiko ne povas malkonsenti, ĉar la etikaj reguloj/ordonoj estas la ordonoj de Dio, sekve ili

akceptas, ke la bono estas la esprimo de la Dia volo. Ĉi tie ni povas memori la vortojn de nia Sinjoro Jesuo Kristo, kiu diris :

« Cetere mi diras al vi, ke se du el vi konsentos sur la tero pri la pripetota afero, ĝi estos farita al ili de mia Patro, kiu estas en la ĉielo. Ĉar kie du aŭ tri kunvenas en mia nomo, tie mi estas meze de ili. » (Mat 18:19-20)

Kompreneble tio farliĝas per korvarma preĝo, kaj per firma certeco, kiel ni legas en la Evangelio laŭ Marko :

« Kion ajn vi petos, preĝante, kredu, ke vi tion jam ricevis, kaj vi ĝin havos. » (Mar 11:24)

La apostolo Jakobo en sia ĝenerala epistolo skribas :

« Sed se al iu el vi mankas saĝeco, li petu Dion, kiu donacas al ĉiuj malavare kaj ne riproĉas, kaj ĝi estos al li donata ; sed li petu en fido, neniel dubante ; ĉar la dubanto similas ondon de la maro, ventopelatan kaj skuatan [...] duoblanima homo, ŝanceliĝa en ĉiuj siaj vojoj. » (Jak 1:5-8)

Tiaj ŝanceliĝaj homoj estas la anoj de la filozofia kaj scienca etiko, kiu estas ekster la ĉiopova Dio. La objektive pensantaj personoj, laŭ mia opinio, ne dubos pri tio.

La interna certeco de la gefiduloj baziĝas en la ĉiama prezento de la Patro, kiu *« vidas en sekreto »* (Mat 6:4,18). Tie ĉi ni devas akcepti, ke nia Sinjoro Jesuo kristo *« estas la vojo kaj la vero kaj la vivo ; neniu*

venas al la Patro krom per mi » (Joh 14:6). Ne nur li instruis la bezonecon de preĝo, sed li vivigis ĝin kiel estas en la epistolo al la Hebreoj :

« En siaj karnaj tagoj, preĝojn kaj petegojn oferinte, kun forta kriado kaj larmoj, al Tiu, Kiu povis lin savi el morto, kaj aŭdinte pro sia pia timo, tiu kvankam li estis Fido, tamen lernis obeon per tio, kion li suferis ; kaj perfektigite, la fariĝis la fonto de eterna savo al ĉiuj al li obeantaj. » (Heb 5:7-9)

La kristana etiko estas energia kaj donadas al popoloj la harmonian vivon kaj la trankvilecon en iliaj rilatoj. Ĝi malproksimigas la militojn kaj grandigas la arbon de la multdezirata Paco per la Graco de la Sankta Spirito, sub kies ombro ĉiuj gefiduloj povas labori la Dian bonon. Sekve « [...] ni amu (konduku) ne laŭ vorto nek laŭ lango, sed laŭ faro kaj vero. » (1 Joh 3:18) Tiamaniere la teologia kristana etiko, kiam realiĝos, donos la solvon al ĉiu persona, socia kaj monda seneliro, kie troviĝas hodiaŭ la homaro. Tion sukcesigas la teologia kristana etiko, ĉar ĝi metas kiel fundamento de la mondo nian Sinjoron Jesuon Kriston. Pri li la Skriboj diras :

« Stono, kiun malŝatis la konstruantoj, fariĝis ŝtono bazangula : de la Eternulo ĉi tio fariĝis, kaj ĝi estas miraklo en niaj okuloj ! » (Mat 21:42 ; Mar 12:10 ; Luko 20:17 ; Jak 2:7)



Per tia bazangula ŝtono, t. e. nia Sinjoro Jesuo Kristo, kiun la teologia kristana etiko proponas, la homaro povas konstrui novan konstruaĵon, novan mondon, se ĝi certe volas feliĉi kaj ne provas la teruran venontan katastrofon pro niaj ĉiutagaj pekoj. Sekve laŭ la teologia kristana etiko, ni metu kiel unikan fundamenton, kiu estas, kiel ni diris antaŭe, nia Sinjoro Jesuo Kristo, en nian pensadon, en nian ĉiutagan vivon, kaj en niajn farojn. Ĉar nur li plenigas nian veran vivon, kaj sanktigas ĝin, donante la Sankta Spiriton el la ĉielo al la gefiduloj, fontinte sian Unu Sanktan Katolikan/Universalan kaj Apostolan Eklezion, unuiginte la ĉielon kun la tero, la Diecon kun hompersoneco.

Ankaŭ ni devas kredi, ke per la teologia kristana etiko, la homaro devas fariĝi Eklezio en Kristo, kiu daŭrigos la marŝadon. Ni faru ĝin vivanta ago/faro. ☐

Joannis KOTITSAS



ĈU (KIEL) EBLAS KRISTANA ETIKO ?

La nuna epoko estas senetika epoko, eĉ kontraŭ-etika, ĉar la pensmaniero laŭ kiu ĉio estas permesita, kaj ĉiu mem decidas proprajn agojn kaj pensmanierojn, do liberalismo, kontraŭdiras al ĉiu etiko.

En la koncepto de etiko devas enesti ia limo, barilo, ricevita de iu, kaj akceptita de grupo de homoj ; por mi mem, mi ne donas normojn sed mi akceptas normojn. La kristana etiko signifas la normojn donitajn de Kristo, kaj akceptitajn de la kredantoj.

La radiko de tiuj normoj estas en la Malnovtestamenta Dekalogo, kaj ties fundamento troveblas en la homaj konsento kaj kondutoj. La esploroj prezentas, ke jam antaŭ la Dekalogo estis normoj : pri la rilato inter gepatroj kaj gefiloj, aŭ kion signifas : *mia, via, lia, ŝia*.

La apostolo Paŭlo skribas :

... kiuj elmontras la faradon de la leĝo



- ▣ ETIKO, VALORO, KRISTANA VIVO
- ▣ ÉTHIQUE, VALEUR, VIE CHRÉTIENNE
- ▣ ETHICS, VALUE, CHRISTIAN LIFE
- ▣ ETHIK, WERT, CHRISTLICHES LEBEN
- ▣ ÉTICA, VALOR, VIDAD CRISTIANA
- ▣ ETICA, VALORE, VITA CRISTIANA

skribita en iliaj koroj, kiam ilia konscienco kunatestas, kaj iliaj rezonadoj inter si akuzas aŭ defendas ilin. (Rom 2:15)

La kristana etiko do estas tiu pluso, kiun Kristo por tio donis, ke tiel li faru la homon pli nobla en konduto persona kaj komuna, kaj faris tiun etikon akceptebla pro tio, ke per la savo li donis la eblecon elleviĝi el la malbono, el la senetiko, kaj aldonas kiel rekompencan, premion, ke la homa vivo konstruita je la kristana etiko akiras en la eterna vivo sencon kaj premion.

Tiu pluso estas konstruita sur la Dekalogo, kaj ĝi estas tio kion Kristo prezentis per sia vivo, per vortoj, per instruoj :

« Estis dirite al la antikvuloj : ne mortigu, sed mi diras al vi... ne adultu, sed mi diras al vi... okulon pro okulo, sed mi diras al vi... amu vian proksimumon kaj malamu vian malamikon, sed mi diras al vi... Amu ĉiujn, helpu al ĉiuj, via amo estu kiel la mia al vi. Se iu batas vian dekstran vangon, turnu ankaŭ la alian. Ne nur ataku unu la alian, sed kondutu sufiĉe por esti mi. »

Do la normaro de la kristana etiko estas klara, nur nun, en la nunaj tempoj, ne estas videbla, ĉar ne iradas inter ni kristoj, kiuj prezentus ĝin, kiel Li faris. Kio do estas la kaŭzo ?

Ni anoncas ĝin precize : la teologiaj kaj etikaj libroj estas plenplenaj... ni povas ĝin

legi... sed ni ne vidas !

13-jara knabo, okaze de religia instruado, kiam mi parolis pri sanktuloj kaj ekzempluloj, diris al mi :

— Ne parolu pri la sanktuloj, sed diru, vi ja bone konas la vilaĝon, kiu estas tiu homo, pri kiu vi povas diri : Jen tiel vi estu bonaj kristanoj !

Kaj tiam mi ekpensis, ke mi rajtus diri nur unu respondon :

— Estu tiel bonaj kristanoj kiel via patro, kiel via patrino.

La problemo estas, ke ni ne povas tion diri.

Sed se estus eble tion diri, tiam la daŭro de ties vero estus jene : estu vi, kiel viaj pastroj, viaj episkopoj, viaj estroj, gvidantoj.

La etikaj normoj havas specialan proprecon : ne tio efikas kiu estas skribita, kiu estas dirita, sed kiu estas montrita. Kaj ankoraŭ : ne sufiĉas, se estas montrita (sed desube ne sufiĉe estas videbla), nur tiu estas efika, kiu desupre montras sin mem, kaj montras sin mem altiranta.

La alia kaŭzo de la nune senetika situacio estas, ke eĉ la sanktuloj ne povas sufiĉe efiki, ĉar perdiĝis ilia aŭtoritato, perdiĝis ĉiuspeca aŭtoritato. Ekzistas la kondiĉo de disvastigo de la kristana etiko, ke la mondo vidu la belon kaj bonon, sed anstataŭ ĝi oni surgenuiĝas antaŭ kiaj aŭtoritatoj ? Antaŭ la bonaj futbalistoj, kantistoj, dancistoj, bona kamarado, eĉ se tiu estas sen homaj





valoroj.

Kvankam ni miras la heroojn, Patrino Tereza, Martin Luther KING, Albert SCHWEITZER, kaj estas ankoraŭ pluraj, eĉ dum iom da tempo ni entuziasmiĝas pri ili, eble vekigas bonaj intencoj, sed nian vivon kaj vivmanieron multe pli difinas la ĉiutagaj zorgoj ol ilia ekzemplo.

La kaŭzo de ĉi tio

1.

Mi instruas la valorojn, kiel katolika pastro, kaj eble per la sama entuziasmo sed en alia koncepto faras ankaŭ alia kristana pastoro. Ni prezentas belajn ekzemplojn, sed laŭ unu, tri, dek konceptoj. Sed kiu pravas ? Ĉiu aludas al Kristo, eĉ multon ni ankaŭ efektivigas, sed se la eklezioj povas elektadi inter la valoroj laŭ siaj prijuĝoj, ja ankaŭ tiu elektados kiu aŭskultas aŭ vidas nin. Kaj se la kristana etiko povas esti diversa, tiam jam ne ekzistas kristana etiko, ĉar ja estas nur unu Eklezio !

2.

Bedaŭrinde la eklezioj ne pretendas konsekvence de siaj kredantoj la etikan konduton, kaj tiel videblas kvazaŭ ili nur proponus la kristanajn kondutojn, kaj lasas je ĉies bonplaĉo, ne nur ĉu li volas esti kristano, sed ankaŭ kiel li volas esti kristano. Ni priforgesis tiun averton de Kristo :

... kaj se li ankaŭ rifuzos aŭskulti la eklezion, li estu por vi kiel fremdulo kaj impostisto (ellimigita el la komunumo).

La reto kolektas ĉiuspecajn fiŝojn, sed la fiŝkaptistoj ne selektas la fuŝajn. Pardonu la vorton ! Kun fuŝa varo oni ne povas iri al la foiro ! Kaj ni devus stari antaŭ la tuta mondo por proponi la plej sanktan varon.

3.

...Kaj la varo ne estas sankta ! La konduto de multaj kristanoj, laŭ vidpunkto de kristaneco, simple dirite estas : karikaturo. Kaj ni mezuras, laŭ la liberalismo de ni sanktigita, sammaniere la vere bonajn kristanojn kaj tiujn kiuj estas kristanoj nur laŭ la matrikulo. Ankaŭ ni akceptas la normon anoncatan de multaj : „bona homo”. Sed „esti bona kristano” ne estas normo. Apokalipso 3:15-16 avertas :

Tial, ĉar vi estas varmeta, kaj nek malvarma, nek varmega, mi elsputos vin el mia buŝo.

Ĉiu komunumo devas havi ian speciale propran etikon. Universala etiko ne ekzistas ! Sed se iu komunumo, eĉ simple humana, aŭ eklezioj akceptas homojn, kiuj ne akceptas ilian etikon, per tiu ago ne nur la neceson de la etiko ĝi demandigas, sed ankaŭ la membrojn sencertigas, kaj oni eĉ la universalan homan konduton forjetos. Ili iĝas senfundamentaj. Kaj se ni iĝis tiel senkristanaj, tiam ni jam ne povas paroli pri etiko ; kaj kie ne ekzistas etiko, tie jam ne ekzistas ankaŭ

komunumo, kaj mankas eĉ nobla humaneco. Ne estas, eĉ se baptita !

Tiel ni iĝas tiaj, kiaj tiuj pri kiuj parolis Jesuo en sia vivo senĉese kaj batalis mal-mole, la fariseoj. Ili ĝuste pro tio estis riproĉataj de Jesuo, ĉar ili ja havis etikon, regulojn, sed ilia konduto estis senetika.

Estas klare, ke ne nur eblas etiko, sed multe pli necesas, ke ni estu vere tiuj, kiuj etike vivas. Kvankam ekzistas multaj specoj de etiko, kristana etiko eblas nur se ĝi estas la etiko de Kristo. Do oni denove bezonas Kriston, se oni denove volas konstrui belan homan mondon. Jesuo demonstris, ke belan mondon sen li oni ne povas konstrui. Se la neceson de ofte severa etiko devigas la sektoj, multe pli bezonas ni.

Se mi bone memoras Mahatmo GANDHI diris :

Se la kristanoj vivus laŭ la volo de Kristo, oni multe pli mirus ilin, ol tiujn kiuj faras miraklojn.

Do, ekzistas kristana etiko, kaj ni kristanoj devus vivi laŭ tiu etiko. ■

KóBOR Lajos



KóBOR Lajos, hungaro, katolika pastro, vic-prezidanto de IKUE.

RAJTOJ, LIBERO KAJ AMO

Kial la Sankta Skribo ne parolas pri „homaj rajtoj” ?

Temaro de „homaj rajtoj” eksplodis en homa historio dufoje : en la tempo de Usona kaj Franca revolucioj, kiam oni uzis kombinon de certa prihoma filozofio kaj de revolucia perforto por ŝanĝi la sociajn cirkonstancojn, deciditajn de la privilegia aristokrata klaso, kaj en la epoko de komunismaj kaj faŝismaj totalecaj sistemoj, kiu ĵus adiaŭas el historia scenejo antaŭ niaj okuloj.

En publikado oni kutime miksas du ideojn inter si, kiuj sin ĝuste ekskludas, kiel mi provas montri en tiu ĉi kontribuo. Oni opinias samsencaj la nociojn : **libero** kaj **homaj rajtoj**.

Libero estas atributo de homa estaĵo, kiu ne dependas de ies ekkono, rekono, permeso aŭ malpermeso. Libero estas homa maniero etike ekzisti. Libero estas la sola principe neelektebla kategorio. Oni povas principe elekti pri ĉio, sed oni ne povas elekti pri libero. Je libero oni estas „kondamnita”,



- BIBLIO, HOMAJ RAJTOJ, LIBERECO
- BIBLE, DROITS DE L'HOMME, LIBERTÉ
- BIBLE, HUMAN RIGHTS, FREEDOM
- BIBEL, MENSCHENRECHTE, FREIHEIT
- BIBLIA, DERECHOS DEL HOMBRE, LIBERTAD
- BIBBIA, DIRITTI DELL'UOMO, LIBERTÀ

tiel sin esprimas ekzistencialistoj.

Alie pri homaj rajtoj. Oni citas la Britan dokumenton *Magna Charta Libertatum* el la jaro 1215 kiel la unuan oficialan liston de homaj rajtoj en homa historio, kiu atingis sian plej gravan komplementon en la *Deklaracio pri homaj rajtoj*, akceptitan de UN en la jaro 1948-a. Filozofie fundamentis la homajn rajtojn Brita filozofo John LOCKE (1663-1704). Li eliras el la „natura stato” de homo, kiu estas stato de egaleco, de libero, de samproporcia politika rajto :

« [...] stato de plena libero de homoj aranĝi sian agadon kaj disponi pri siaj havaĵoj kaj sia persono laŭ propra plaĉo kaj konveno enkadre de la natura leĝo, sen ke oni devus peti permeson ĉe iu alia aŭ esti dependa de iu alia. [...] stato de egaleco, en kiu la plena povo kaj jurisdikcio reciprokas kaj neniu havas pli da povo ol iu alia [...] »¹

La ideoj de LOCKE, kiu jam parolis pri divido de povo, trovis reŝion en Francujo, ĉe MONTESQUIEU kaj ROUSSEAU kaj lia *Contrat social* (socia kontrakto). Tamen ankaŭ ĉi tie efektive temas pri politikaj kaj civitanaj aplikoj de principa homa libero. Oni ankoraŭ ne parolas pri homaj rajtoj en nia hodiaŭa senco. Oni deduktas tiun liberon aŭ de naturo aŭ de Dio, kiu kreis homojn egalrajtajn :

« Ni opinias, ke estas memkomprenebla, ke la homoj estas kreitaj egalaj, ke ilia Kreinto donis al ili kelkajn neforpre-

neblajn rajtojn, inter kiuj troviĝas vivo, libero kaj tendenco al feliĉo. Por protekti tiujn rajtojn homoj kreas registarojn, kies justa povo eliras el la interkonsento de tiuj, al kiuj tiu povo regas. »²

2. Declaration of the independence.

Eĉ la plej fama dokumento *La déclaration des droits de l'homme et du citoyen* el la jaro 1789 ne parolas pri rajtoj en vera senco, sed pri natura stato, pri kiu la dokumento nur memorigas la regantojn. La ideologoj de la Franca revolucio konsciis pri la origineco kaj universaleco de rajtoj, kiujn homo povas nek inventi nek limigi al certa grupo aŭ eĉ unuopulo.

Tamen la origino kutime baldaŭ forgesiĝas. Iom post iom perdiĝis la sento, ke temas pri libero. Iom post iom kreskis la sento, ke temas pri rajtoj. Max WEBER difinis rajtojn tiel :

« La portanto de rajto havas eblecon voki helpon ĉe „deviga aparato” por la efektivigo de siaj idealaj aŭ materialaj interesoj, kiu ĝuste por tiu celo disponiĝas. »

Rajto do estas povo devigi iun alian je certa ago aŭ konduto. En tiu senco ĝi certe ne estas ekvivalento de libero. Alia senco de rajto estas permeso. Sed, nek povo de devigo, nek permeso havas ion komunan kun libero. Se rajto eliras de mi mem kontraŭ iu alia, permeso eliras de iu alia je bono de mi. En ambaŭ kazoj temas pri rilato dependa, do pri rilato nelibera.



1. J. LOCKE. - *Essays on the law of nature.* - Leyden. - p. 198

La elirpunkto de **homaj rajtoj** estas strukture supera povo ekster la homoj, kiujn tiuj rajtoj koncernas. Tiu povo aŭ permesas ilian agadon aŭ devigas reciprokajn partnerojn plenumi certajn agojn. La elirpunkto efektive estas **mallibero**, kiu korektiĝas kaj mildiĝas per certaj **rajtoj**. Rajtoj ĉiam supozas aŭtoritaton, kiu ilin deklaras kaj garantias. En ekstrema esprimo oni povas difini: **homaj rajtoj** apartenas al malliberaj homoj, al sklavoj.

Tute alia estas la situacio, se la elirpunkto estas **libero**. Libera homo povas fari kion ajn li volas, inkluzive malbonon. Tiun eblecon riskis Dio mem, kreinte homon kiel estaĵon kun libera konscienco kaj decidpovo. Se li povas fari ion ajn, iuj ajn **rajtoj** estas superflujaj kaj sensencaj. Sed pro etikaj celoj, el motivoj de amo, solidareco, karitato kaj respekto de aliaj, liberaj homoj povas interkonsenti kaj interkontrakti certajn **limigojn**, certajn **regulojn** de interpersona kaj intergrupa konduto. Eĉ se la tiel interkonsentitaj limigoj kaj reguloj estas pli rigoraj ol la sklava stato de „homoj kun rajtoj”, ilia baza stato tamen estas libero.

La ekvacio libera homo havas regulojn — sklavoj havas rajtojn, ne estas harfenda spritaĵo, kiu volus amuzi. Temas pri la elirpunkto, eĉ se momente la konsekvencoj estas samaj. Ĉu ni komprenas homan estaĵon kiel liberan personon, kiu kun la aliaj interkonsentas pri limigoj kaj reguloj, aŭ ĉu ni komprenas homon kiel sklavon aŭ serviston, kiu pro

filantropaj motivoj ricevas kelkajn rajtojn kaj permesojn de aŭtoritato, staranta super unuopaj homoj. Kaj ĉi tie okazas paradokso: ju pli da **rajtoj** homo ricevas, des pli dependa li fariĝas, des pli li restas sklavoj. Kaj inverse: ju pli da reguloj kaj limigoj estas interkonsentataj el motivoj de etike gvidata komuna vivo, des pli libera homo efektive estas. Libero plej forte manifestiĝas en la ŝajna paradokso: ĉion rajti — pri multo rezigni.

En tiu senco oni eble pli facile komprenas, kial la Malnova kaj la Nova Testamento ne uzas la nocion „rajtoj”, sed atentigas al libero. La Malnova Testamento troviĝas en la signo de granda historia liberigo de la Hebreoj el la Egipta sklaveco. Faraonoj liveris kelkajn rajtojn, sed Dio donas liberon. Tiu fenomeno kulminas en la Nova Testamento, kie Jesuo mem deklaras la homan esencan liberon. Jesuo ne deklaris nur la homan principan liberon, li liberigis la homon ankaŭ de liaj pekoj, li liberigis lin por la eskatologia Dia regno.

Sankta Aŭgusteno diris tion ĉi plej komprime kaj trafte:

« Amu, kaj faru kion vi volas ! »

Sistemo de **rajtoj**, ankaŭ de **homaj rajtoj** devas sin ĉiam pli defendi kaj sekurigi per komplikaj juraj, policaj kaj militaj sistemoj. Leĝoj plimultiĝas kaj nerekoneble komplikiĝas, friponoj kaj kanajloj pli kaj pli ruze kaj profesie enketas la truojn kaj truetojn en tiuj defendsistemoj kaj relative sukcese trovas vojon tra ili. Sistemo de **homaj rajtoj**, kiu



deiras de la homo, imagita kiel sklavo, kiel nelibera estaĵo, detruas sin mem. Ĝi baziĝas sur negativa aspekto, ĝi estas konstanta batalo inter la ruzo de gardistoj kaj la ruzo de friponoj.

Homo konceptata per libero, bezonas unu solan instrumenton, kiu baras antaŭ la superpovo de malbono : amon. Komplemento de libero estas amo. Libero bezonas amon por ne koruptiĝi al kaprico, eĉ al malica kaprico. Kaj amo bezonas liberon, ĉar ĝi okazas en cirkonstancoj de spontana altiro kaj ne en cirkonstancoj de perforta kunpuŝo. Dum konstitucioj en nedemokratiaj landoj pli kaj pli dikiĝas kaj malkompreniĝas, la konstitucioj de relative demokratiaj landoj malampleksas (vidu la Usonan !), kaj vere bona lando ĝin tute ne bezonus. La konstitucio de vere bona lando tekstus : Libero por amo — amo en libero...

Vinko OSLAK



DISIGO PLIRIĈIGA

La Rakonto pri la Babel-turo instruas apertiĝi al la fremdo kaj ne vane sekuriĝi el la fremdo.


Prediko pri Genezo 11:1-9 por la Ĉefia-Germana Esperanto-Kongreso en Karlovy Vary, je Pentekosto 1993

Karaj geamikoj ĉefiaj, germanaj kaj alilandaj,

longe mi preparis min kaj ankaŭ vin por la nuna ekumena Diservo. Krom la presita papero, kiun vi nun tenas en viaj manoj, mi esperis alporti ankaŭ mian voĉon. Sed homo proponas, Dio disponas, aŭ por citi pli draste el la sama proverbaro de Zamenhof : *homo pafas, Dio trafas*. Trafis min, same kiel mian edzinon, banala somera infekto gripeca, kiu tamen sufiĉis por malebligi mian alvenon.

Mi neniam kapablis skribi fiksi predikon antaŭ la momento, kiam mi vidis la homojn antaŭ mi. Tamen mi nun faras la provon almenaŭ skizi, kion mi, proksimume,

- ▣ SEKURECO, AKCEPTO, GENEZO 11:1-9
- ▣ SÉCURITÉ, ACCUEIL, GENÈSE 11:1-9
- ▣ SECURITY, RECEPTION, GENESIS 11:1-9
- ▣ SICHERHEIT, ANNAHME, GENESIS 11:1-9
- ▣ SEGURIDAD, ACOGIDA, GÉNESIS 11:1-9
- ▣ SICUREZZA, ACCOGLIENZA, GENESI 11:1-9




intencis diri al vi surbaze de Biblia teksto elektita ne specife por internacia Esperanto-kongreso, sed simple por sekvi la liturgian kalendaron de mia eklezio luterana, kiu por Pentekosto proponas la antikvan historion pri la Babela turo.

Mi ĉiam evitis fari senperan paralelon inter Pentekosto kaj Esperanto. Iasence ni ja spertas pentekostan miraklon, kiam ni libere povas interparoli. Tion mi ne volas kontesti. Tamen mi kredas, ke Pentekosto iras multe pli profunden ol nur al lingvaj signoj. Mi ja amare spertas, en la iama Jugoslavio, ke reciproke komprenebla lingvo ne savas el plej terura sindetruo. Kaj kvardek jarojn la sama germana lingvo ne sukcesis kunligi la du Germaniojn. Kiam la Pentekosta spirito forigas murojn kaj konstruas pontojn inter koroj kaj mensoj, ne temas nur pri lingvistiko. Simile, mi hezitas tro rekte rilatigi tiun praan rakonton el la Biblio al la problemo, kiun ni atakas per Esperanto. Tro ofte oni jam uzis kaj, verŝajne, misuzis tiun dek-unuan ĉapitron el la unua libro de la Biblio por defendi aŭ kondamni la provojn de Volapük ĝis Esperanto kaj Interlingua. Nu, mi mem ofte diris, ke la kontrasta paro ne estas Babelo kaj Esperanto, sed pli vere Babelo kaj Pentekosto. Serĉante la profundan sencon religian de la Babela rakonto, oni alvenas al tre aktuala averto kontraŭ tiu plej fatala eraro de homa sin-takso, fine kondukanta al mizerigo kaj detruo.

Hodiaŭ mi tamen invitas vin sekvi alian

penso-fadenon. Ĝi montras, kiel profunda estas la saĝo ĝuste de tiuj unuaj dek-unu ĉapitroj de la Malnova Testamento, ŝajne tiel simplaj kaj naivaj, travideblaj kaj eble nekredeblaj. Ĝi montru, ke tiaj tekstoj eltenas pli ol unu interpreton, kaj ĝuste pro tio ili estas pli ol simple veraj. Laŭ tiu nekutima interpreto, kiun mi nun prezentas, varianto kiun mi dankas al kolego kaj amiko en mia eklezio, Pentekosto ne estas la kontrasto kaj malo de Babel, sed ties daŭrigo kaj pliprofundigo — vastigo de la horizontoj kultura, nacia kaj religia. Por ke neniu miskomprenu : jen unu ankaŭ alia interpreto, varianto kiu ne klopodas refuti la tradiciajn interpretojn, sed tamen rigardanta la aferon el tute alia vidpunkto. Do, eĉ se vi ne konsentas, klopodu, por kelkaj minutoj, sekvi la penso-fadenon de juda bibliisto. Jen :


La Babelanoj timis perdiĝi sur la vasta terglobo. Ili neniel deziris konkuri la ĉielon. Ili ne deziris enpenetri en la sidejon de la dioj. Ili simple deziris esti sekuraj. Tial ili komencis konstrui sian gigantan urbon kun la giganta turo, por teni ĉiujn kune. Ilia horizonto ne iras pli foren ol la ombro de la turo. Konstrui la turon, tio garantiis, ke ĉiuj restu sur unu loko. Ĝi garantiis, ke nenio nova enpenetru aŭ elkresku. La fremduloj restu ekstere. Ilia idealo estas la ferma socio. Timeme ili retiriĝas al si mem. Sian minus-komplekson ili klopodas kompensi per des pli strikta kunteniĝo. Disiri, esplori la teron, pleniĝi ĝin laŭ la komiso de la kreinto, tio ŝajnas tro



danĝera. Sekureco, eĉ se ĝi estas sterila, ŝajnas preferinda.

La Biblia rakonto diras, ke la Eternulo venis kaj konfuzis la lingvon, tiel ke ili devis ĉesigi la konstruadon, kaj fine ili disjeliĝis en ĉiujn direktojn. Kutime oni vidas en tiu interveno de Dio agon de kolero kaj de puno. Ĉu prave? La konstruantoj de la giganta urbo kun la giganta turo estas puŝataj al tute novaj horizontoj. Ili devas dis-iri. Tio estas ilia tasko. Dio malfermas novan landon al Abraham. Lia persono servos kiel modelo por tiu ekiro al freŝaj horizontoj. Ili devas lerni akcepti nekonatajn situaciojn kaj homojn, esti apertaj al fremdulo. Ilia nomo grandiĝos kiam ili transdonas la benon prefere ol time reteni ĝin por si mem. Ili mem riĉiĝos dividante la talentojn, sciojn kaj spertojn kun aliaj, prefere ol avare enfermi sin en la propran konkon. la interveno de Dio do ne punas; ĝi zorgas por tio, ke liaj homoj plenumu lian intencon. Transpaŝi limojn, lerni kaj kompreni neniel rezultigas malsekuron. Tute inverse, tio ja helpas kompreni sin mem pli bone. El tiu vidpunkto, eĉ la multeco de la lingvoj ne povas esti nur malbeno, sed ankaŭ viva dokumento de riĉo kaj belo.

Kaj nun ni estas meze en tio, kion la uzantoj de la internacia lingvo volas kaj praktikas. Utilas distingi unuflanke inter uniformita unueca lingvo kiu fakte estas instrumento de superregado monopolisma, kaj aliflanke tiu komuna ponto de interkompreno, kiun aludas la unua linio de nia Biblia teksto:



estis unu lingvo kaj unu parolmaniero. Dum estas tiu simpla komuna lingva ponto, la potenculo ne povas uzi sian lingvon kontraŭ la malfortaj. Pri la misuzo de la lingvo ni havas abundajn atestojn tra la jarcentoj. Nun ne estas loko aŭ horo por detale pripensi tiun aspekton. Sed se vi volas, vi tuj povas fari malgrandan paŝeton: prenu krajonon kaj korektu la unuan vorton de la enkonduka kanto, sub numero tri: skribu „homoj” anstataŭ la seksisma „fratoj”. Kaj same faru en la antaŭlasta linio!

Jen do, kion ni hodiaŭ aŭdis el tiu praa rakonto ne fikse lokebla en la homa historio, tamen tre precize priskribanta la homan situacion ĝenerale:

La Dio de la vivo, al kiu plaĉas ĉiu paŝo de interkompreno kaj reciproka pliriĝo, protestas kontraŭ la vana penado de egoismaj homoj, kiuj strebas sekurigi sin kontraŭ ĉio fremda. Ne temas pri ĉiopova kolera cinikulo, al kiu malplaĉus la teknika progreso de la homoj, sed pri amanta Dio, kiu ebligas al homoj forlasi sian memfaritan fortreson kaj malkovri la vaston kaj varion de renkontiĝoj. Temas pri tiu Dio, kiu ĝojas pri ĉiu sperto de sukcesa ekumena komuneco. Estas mia deziro al vi en la kongreso de Karlovy Vary, ke vi feliĉige spertu, kion konfesas la psalmo (31:8): *Vi starigis miajn piedojn sur vasta loko.*

Amen. 

Adolf BURKHARDT

Adolf BURKHARDT, germano (1929), studis teologion, sociologion kaj la anglan lingvon 1951-1957 en Usono kaj en la universitatoj de Tübingen kaj Bonn. Emerita pastoro (1957-) de la Evangelia-Luterana Eklezio de Würtemberg. Ankaŭ de temp' al tempo simultana interpretisto. Edzo, patro de tri infanoj. Prezidanto de KELI.

FRUKTO PERFEKTA AŬ MALPERMESITA ?

La etiko de banano : Indianaj legendo kaj fakto, Edenaj ĝardeno kaj sekvo.

La banano apartenas al la plej prae kultivitaj fruktoj, kiujn nia mondo konas. La sud-orientan parton de Azio oni konsideras ĝia naskiĝloko, sed ankaŭ la Inkaoj manĝis bananojn, kaj eĉ antaŭ la veno de Kolumbo. Ĉar la banano estis ŝatata nutraĵo de la hindaj filozofoj, oni baptis ĝin *Musa Paradisiaca Sapientium*, i.e. Paradiza Frukto de la Saĝuloj. Ĉu tiu nomo aludas la malpermesitan frukton laŭ la Geneza rakonto, ne certas sed verŝajnas.

Kiel ajn estu la rilato inter banano kaj paradizo, en Meza Ameriko cirkulas popolrakonto parolanta pri la kreiĝo de banano. La rakonto nin kondukas al idiliaĵo, kiu pensigas pri la paradiza ĝardeno.



- ▣ EFIKECO, PROGRESO, ETIKO
- ▣ EFFICACITÉ, PROGRÈS, ÉTHIQUE
- ▣ EFFECTIVENESS, PROGRESS, ETHICS
- ▣ WIRKSAMKEIT, FORTSCHRITT, ETHIK
- ▣ EFICACIA, PROGRESO, ÉTICA
- ▣ EFFICACIA, PROGRESSO, ETICA

Bela legendo

Kelke da homoj ripozadis ĉe la bordoj de plaŭdetanta rivereto sub ombroriĉa foliaro de arbego kaj ĝuadis, parolante pri vetero kaj cetero, la bonfaran silentadon de la verda mondo. Subite Dio, tagmezpromenante tra la ĝardeno, aliĝis al ili. Estis sabato, tuj post la kreiĝo de la mondo. Tial la Kreanto de tempo al tempo ankoraŭ vidigis sin inter la homoj por renkonti ilin kaj paroli kun ili. Laŭ la rakonto la mondo kreita ankoraŭ ne estis kompleta, sekve perfektigebla. Tial Dio petis al la homoj, ĉu ili eble havas dezirojn rilate al kreaĵoj. Post mallonga momento de interkonsiliĝo la langoj komencis moviĝi.

Ciuj samopiniis pri tio, ke nepre temu pri frukto. Frukto bonkvalita kaj senerara. Ili, konsekvence, decidis peti frukton perfektan. Dio konsentis kaj volis ekscii kia do ĝi aspektu. Unu post la alia donis sian opinion. Unualoke Diego la Sendentulo:

— Donu, ho Sinjoro, frukton facile maĉeblan, por ke homoj sendentaj ĝin povu manĝi !
Sekvis Pedro la Maldiligentulo :

— Donu, ho Sinjoro, frukton senpene elŝeli-geblan, por ke homoj maldiligentaj ĝin povu manĝi !

Aliaj diris, ke la frukto, pri kiu ili revis, estu nutra, tute manĝebla, facile digestebla, nefibreca, nerapide putrebla, ne tro dolĉa nek tro acida, ne tro harda nek tro mola, manĝebla por infanoj kaj plenkreskuloj, rikoltebla dum la tuta jaro. Kiam ili nenion plu povis pripensi, okazis momenta silentado. Tiam Dio parolis :

— Perfektaĵoj ne apartenas al ĉi tiu mondo. Ciam al Mi plaĉas, se homoj kapablas plibonigi ilin. Se la malo estus vero, la mondo ege monotonus ! Ĉikaze, tamen, ĉar temas pri decido unuanima, Mi respektos la voĉon de la popolo kaj faros escepton. Sed sole nur por hodiaŭ.
Tiam Dio kreis la bananon.

**Frukto amara**

Depost la tempo, pri kiu parolas ĉi tiu rakonto, multo ŝanĝiĝis en la mondo de la banano. La idilia „ĝardeno” jam longe malaperis. Ĝin anstataŭis en Latin-Ameriko vastaj banankulturejoj polvaj kaj stereotipaj. La sola planto tie kreskanta estis la bananpalmo. La kristala akvo en la rivereto malklariĝis pro amaso da disŝprucitaj kemiaĵoj kaj sterko artefarita uzataj por draste plialtigi la produktadon de la flava berfrukto. Fiŝoj ne plu naĝas en la tisa akvo mortinta. La popola buŝo komencis prave paroli pri „kemia frukto”.

Ankaŭ la harmonia unuanimeco inter la homoj en la „ĝardeno” estas malhelpita. Ĝin anstataŭis humiligaj rilatoj flanke de mastroj kaj terure amaraj laborkondiĉoj. Al tiu fakto la banano ŝuldas ĝian alian kromnomon „amara frukto”: gedungitoj devas sklave fari laboron pezan kaj malpuran sen ia jura pozicio. Fiksita laborkontraktoj maloftas, kaj la fi-peruloj en tiaj necertaj cirkonstancoj volonte plenigas siajn poŝojn. Homoj kaptantaj kaj enpakantaj bananojn ĝenerale ricevas tro mizeran salajron, dum multnaciaj bananentre-

prenoj enkasigas gigantajn profitojn. Sindikatojn oni repuŝas, malhelpas kaj kontraŭlaboras. Ofte sindikatoj devas plenumi siajn taskojn sub duon-neleĝaj cirkonstancoj danĝerplenaj. La perfekta frukto dekomenca amariĝis kaj kemiiĝis.

Frukto malpermesita

Ankaŭ en la Geneza rakonto estas parolo pri ĝardeno plena de arboj fruktojn portantaj. Ĉi tiaj arboj simbolas la plenecon de ĉio kreita, de kiu dono la homo abunde vivu.

Jen Mi donis al vi ĉiujn herbojn, kiuj semas semon, kiuj troviĝas sur la tuta tero, kaj ĉiujn arbojn, kiuj havas en sia arban frukton, kiu semas semon; tio estu por vi manĝaĵo (1:29).

De ĉiu arbo de la ĝardeno vi manĝu (2:16).

Ĉiu kreskaĵo semon portanta, ĉiu arbaĵo, kies branĉoj donas semon produktantajn fruktojn, ĉiuj arboj en la ĝardeno ; tiel la rakontanto emfazas la plenecon. Kaj pri ĉiuj arboj en la ĝardeno la rakonto diras, ke ili estas bonaj por manĝi kaj ĉarmaj por la okuloj. Tute certe la verkisto intencas substreki, ke estas tre bone loĝi sub la arboj en la ĝardeno de Dio kreita. La oferto Liaflanke malavaregas ! Sed same kiel en la Elira rakonto la oran donon de libereco kaj abundo (lando fluiganta lakton kaj mielon) sekvas ordono :

Sed de la arbo de sciado pri bono kaj



malbono vi ne manĝu, ĉar en la tago, en kiu vi manĝos de ĝi, vi mortos (2:17).

Nenio sen celo

Rimarku, ke „vi manĝu” (hebree: manĝu, manĝu) kontrastas kun „vi mortos” (hebree: mortos, mortos). La etiko (temas ĉi tie ja pri bono kaj malbono) enestas en la nemanĝado ; etiko kontraŭstaranta la tenton esplori ĉion eblan.

Georgo BATESON, biologo kaj antropologo, disvolvis la koncepton pri „la neniliganta efiko de celtrafeco” kiel ŝlosilon kritikantan la okcidentan kulturon. Per tio li indikas la inklinton devig-impulse daŭrigi sur la elektita vojo, se ĝi ŝajnas sukcesplena. Laŭ lia opinio per tiu linila celtrafeco oni neeviteble konfliktigos kun la ciklaj procesoj regulantaj la naturon. Por ekspliki la iradon de pensoj BATESON rakontas sian propran varianton.

Iam estis Ĝardeno. En tiu Ĝardeno, versajne subtropike situinta, vivis multaj centoj da kreitaĵoj; mankis en ĝi nek ekvilibro, nek fekundeco, nek homo nek kio ajn. En la Ĝardeno vivis ankaŭ du antropoidoj, kiuj estis pli inteligentaj ol la aliaj bestoj. Sur tre alta branĉo de unu el la arboj pendis frukto, kiun la du simioj ne kapablis atingi. Ili sekve komencis pensi. Kaj tio estis granda eraro ! Ili komencis pensi celtrafe. La vira simio, kiu nomiĝis Adamo, iom poste foriris por sufiĉe rapide reveni

kun malplena kasto. Li metis la kaston sub la arbon, grimpis sur ĝin, sed rimarkis ke li ankoraŭ ne povas tuŝi la frukton. Li do serĉis duan kaston, kiun li starigis sur la unuan. Tiam li grimpis sur la pinton de la duetaĝa kastokonstruaĵo kaj fine kaptis la pomon. Adamo kaj Eva preskaŭ ebriĝis de abunda gaŭjo kaj pura entuziasmo. Jen la maniero por plej efike agi ! Faru planon laŭ ABC-vojo kaj la rezulto nepras : De tiam ili komencis specializiĝi en tio kiel agi laŭ planita maniero... Post kiam ili estis forpelintaj Dion el la Gardeno, ili sisteme kaj konsekvence ekis metode agi cel-trafe, kaj rapide malaperis la sekunda supera grundo. Poste pluraj plantospacoj fariĝis „neutilaj herboj“ kaj kelkaj bestoj fariĝis „veraj plagoj“, kaj Adamo spertis, ke ĝardenumado estas multe pli peza laboro. En la ŝvito de la vizaĝo li devis perlabori sian panon, kaj li diris: — Li montriĝas vengema Dio. Ho, ke mi neniam estu manĝinta tiun pomon !

En ĉi tiu rakonto la prapekon estigas celtrafa ekspluatado de la tero. Ankaŭ laŭ BATESON la ne-manĝado ŝajnas esti decida elekto povanta bridigi la senbremsan ekspansion. Ĉi tiu vidmaniero jetas interesan lumon sur la etikan demandon, kiu en nia tempo pli kaj pli postulas respondon : Ĉu ĉio ebla ĉiam estas permesita ? Ĉi tiun demandon oni povas starigi al la progreso kaj kresko, kiujn

oni konsideras necesaj ene de la hodiaŭa teknologie ekonomia kulturo. Produktado kaj konsumado estas artefarite suprenpuŝataj per ĉiaj rimedoj eblaj kaj neeblaj. La sekvoj por homo kaj medio estas laŭaj. La etika momento ŝajnas enesti en la konscio pri tio, ke oni devas meti limon. En la jesa aŭ nea manĝado de la frukto malpermesita montriĝas nia etika konscio. Ĉi tiu etika kompreno kreas la kondiĉon bremsi la senbremsan ekspluatadon de homo kaj medio, kiel ĉi tio okazas i.a. en la kultivado de bananoj. La flavkolora banano kiel kemia kaj amara produkto de suprenpuŝita maniero de produktado, alegorias la frukton malpermesitan. Apartenas al ni ataki la provokon kunlabori por ke reiru la frukto perfekta ! ■



el artikolo kaj prelego de Ab KERSSIES

prilaboris Jacques TUINDER

ESTI OAZO EN MONDO MALSANA KAJ FRENEZIGA...

Kiel Jesuo rolas sav-terapeŭte

Kiam mi antaŭ nelonge, dum ekumena liturgio, devis paroli pri la temo *Evangelio kaj psikiatrio*, en la serio sub la titolo *Inter solfo kaj oazo*, mi komencis, dirante ke ne estas tasko ekstreme malfacila prelegi pri mia faktereno, sed ke prediki estas afero tute alla ! Kiel predikisto, vokita por aŭdigi la Vorton de Dio, mi preĝante esperis, ke la Bona Spirito min gvidos, parolontan pri malpuraj, danĝeraj kaj malbonaj spiritoj, kaj pri homoj mense malsanaj, frenezaj, skizofreniaj, deprimitaj, k.s. Mia espero estis, ke la promesplena mesaĝo de la Evangelio vere kapablos kontraŭstari ĉiujn demonojn, kiuj nin ĉiufanke kaj ĉiumomente minacas kaj daŭre emas nin posede kaj obsede ekokupi. Kaj mian preĝadon sinceran mi povis resumi per la konata peto : « Patro nia, liberigu nin de la

- ▣ EKSKLUDO, HANDIKAPULO, MARGENULO, AKCEPTADO, MARKO 5:1-20
- ▣ EXCLUSION, HANDICAPÉ, MARGINAL, ACCUEIL, MARC 5:1-20
- ▣ EXCLUSION, DISABLED, FRINGE, RECEPTION, MARK 5:1-20
- ▣ AUSSCHLUB, BEHINDERTE, AUSSENSEITER, ANNAHME, MARKUS 5:1-20
- ▣ EXCLUSIÓN, IMPEDIDO, MARGINAL, ACOGIDA, MARCOS 5:1-20
- ▣ ESCLUSIONE, SVANTAGGIATO, MARGINALE, ACCOGLIENZA, MARCO 5:1-20



malbon(ul)o ! »

Kio estas normala ?

Antaŭ kelke da jaroj en nia lando oni povis legi en multe da lokoj, ekzemple en atendejoj de kuracistoj, la interesan tekston : « Ĉu vi iam renkontis homon normalan ? Kaj ĉu plaĉis al vi ? » Nu, la plej stranga aspekto de frenezeco miaopinie estas, ke oni apenaŭ povas kondukti kaj agi normale... Sed for ĉiun ŝercon ! Kio estas normala kaj kio flankeniĝas de la normo, se ĝi entute ekzistas ? Ĉiokaze ni ĉiuj vivas en mondo, kiun ni pli ofte inklinas epiteti freneza, sed kiu samtempe estas freneziga ! Kiom da tute neklariĝeblaj vulkaneksplozaj eventoj kaj ŝokaj situacioj ni prave nomas patologiaj ? Mi ekzemple menciu la intencan kaj sisteman ekstermadon de milionoj da homoj ; la feliĉe preskaŭ elfetitan politikon de aparteco en Sud-Afriko ; la plej ekstreman arogantecon, per kiu blanko kaj mastro alte sin levas super nigro kaj sklavo ; absolute senperspektivan militon intercivitanan sekve de la fakto, ke popoloj ne toleras unu la alian en ŝtata kadro kaj ne hontas neimageble barbari kaj diable buĉadi. Ĉu la pura raso estas la normo ? La nemiksita sango ? Difinita haŭtkoloro ? La grundo sur kiu ni staras kaj iras ? Aŭ ĉu, eble, la vizaĝo de la alia (la alia estas mezurilo, normo, kriterio, kiel profunde sence pensas la filozofo Emmanuel LÉVINAS) ? Ĉu li ne instruas, ke la homa vizaĝo de la alia nin invitas kaj admonas ? « Guste pro tio ke

antaŭ mi aperas la vizaĝo de la alia, klare eksonas la voko : — Haltu !, kiun bone komprenu mia senlima libereco. Alfronti la alian dum momento, en kiu mia kondutado estas trarompata, en kiu li apelacias al mi kiel unika estulo kaj al neniu alia, jen la plej radikala vero, kiu ekzistas por mi ! »

Spinalongo

Tiuj inter vi, kiuj iam vizitis la insulon Kreto, sendube rememoras la perŝipan ekskurson al Spinalongo (ĝi estas ĝuste la malo de oazo !) tiu senkonsola mare ĉirkaŭita ekzilejo, kie lepruloj eĉ ĝis en la kvindekaj jaroj (ĉar malpuraj) „entombiĝis“, kvankam ankoraŭ ne (tute) mortintaj. Lepron oni en tiuj tagoj konsideris puno de Dio, kaj ĝin ili povus plej bone akcepti kaj trapasi en kompleta izoleco. Nehumana elpuŝado kaj dumviva elpelado estis la logika konsekvenco.

Biblio kaj handikapo

Konsultante la hereditajn skribaĵojn de Izraelo kaj de la juna eklezia komunumo, ni sur ĉiu paĝo renkontas la handikapitan kunhomon en kiuj ajn kategorioj kaj gradoj : mi menciu homojn lamajn, blindajn, surdajn, kriplajn, leprajn, ktp. Kaj al tiu malriĉa „provinco“ de Biblia lando apartenas ankaŭ la vidvino, la orfo kaj la fremdulo. Kaj tiam mi ankoraŭ ne eksplicite tuŝis tiun senbordan procesion de mensmalsanuloj, kiun ni konas ankaŭ en nia tempo kiel problemgrupon ; ili nomiĝas frenezuloj, skizofreniuloj, epilepsiu-

loj, melankoliuloj, ktp. Resume, temas pri la vasta heterogena proletaro de senŝancaj kaj malbonprognostaj soci-periferiuloj, kiuj neniel kapablas doni formon kaj direkton al sia vivo...

Kion ni heredis ?

Multaj inter ni ekkreskis kun la nune pli kaj pli eluziĝon spertanta koncepto „origina peko“, speco de „makulo“ enbakita, kiun ni prae heredis de niaj paradizaj protogepatroj. Pri tiu teologia ĉapitro ne estos parolo ĉikadre. Mi hodiaŭ intencas preni kaj diagnozi la grupon de pacientoj kiel eble plej vaste, asertante ke ni ĉiuj, senescepte, estas herede markitaj aŭ alivorte genotipe stigmatizitaj... Ni ĉiuj portas kun ni, en nia plejinterno, la vivhistorion de ĉiuj niaj pragepatroj ĝis Adam kaj Eva inkluzive ; kaj tiuj lastaj iusence estas ni mem. En ni ĉiuj enestas io Habela kaj Kaina, Esava kaj Jakoba, Saraa kaj Rebekaa, Rafiaba kaj Susannaa. Ĉiu el ni havas fibreton komune kun figuroj kiel HITLER, STALIN, HOXHA, PINOCHET, aŭ kun edzinoj de CEAU-CESCU, MARCOS, MAŬ kaj aliaj... Antaŭ kelke da tagoj mi legis en mia ĵurnalo pri la ĵus mortinta GAMSARURDIA, ke li estis paranoidea kaj suferanta eĉ de Mesio-komplekso. Kaj kion suprenvokas en timeman koron la nomo Vladimir JIRINOVSKI kun lia legio de blindiĝintaj kaj fanatikaj disĉiploj ?

Eble preferindas asertadi, ke nenio homa, nenio freneza fremdas al ni. La poeto OOSTERHUIS tre povus kantigi nin, ke skizofre-

nio kvazaŭ « ĉifone kaj almozpete de domo al domo laŭvojas. » Dum mi preparas ĉi tiun artikolon, en pluraj lokoj de nia lando riveroj ne plu obeas al siaj bordoj. Kaj kiel novaĵon mi legas diklitere : « PLI DA PSIKAJ PROBLEMOJ LEVIGAS SEKVE DE SUBAKVIGOJ. » Konklude : oni bezonas nur iome „inundiĝi“ por psike malekvilibriĝi. Kelkfoje mi havas la troigan impreson, ke la nuna situacio estas preskaŭ tia, ke duono de Amsterdam simple receptas pilolojn kontraŭ deprimiteco dum la cetero senproteste mutas kaj rezignacie ĉion glutas. La amaso da difektitaj homoj, vagantaj gejunuloj, sentegmentuloj, alkoholuloj, droguloj kaj krimuloj, kiun kalkuli neniuj kapablas, ŝajnas ade kaj ade kreski, paralele kun ĉiaj tipoj de hejmoj, flegejoj kaj loĝaranĝoj. Parenteze : dum la lastaj jaroj en nia lando aktualas la tendenco fortransporti pacientojn el iliaj verdaj apudmaraj „oazoj“ al monotona kaj monumentaj blokoj en grizaj kvartaloj de niaj grandaj urboj. La kostoj de flegado/zorgado estus pli malaltaj kaj la sekvo atendata : integriĝo !

Legio renkontas Jesuon

Leginte la Evangelion laŭ Marko (5:1-20) ni sekvu Jesuon al Gerasa suburbo de Dekapolis. Klara li forlasis la ŝipeton, lin tuj sekvas iu. Anonima homo, sennomulo en la potenco de malpura spirito, sovaĝulo, kiu brue kaj brute manifestiĝas kiel viro freneza. Atentu lian timoplenan fizionomion, rigardu liajn povrajn vestaĵojn kaj atiskultu liajn kao-



sajn parolojn ! Li restadas sur loko, kiu havas sian evidentan analogion kun Spinalongo : enterigejo, loko de tomboj kaj monumentoj, en kiu tiom ofte laŭte kaj larĝe ekkariĝas, kio malsankta kaj malbonaŭgura prezentiĝas en la socio, en la interhoma kunvivado. Antaŭ la okuloj de mia menso nun aperas perforte detruitaj, fisimbole makulitaj kaj „ideologie“ tekstitaj tomboŝtonoj.

Jesuo, kiu ŝatas aŭdi nomon, ekstaras vizaĝon kontraŭ vizaĝo kun la en tomboj loĝanta kaj ofte katenita viro, kies nomo montriĝas esti Legio. Intervidiĝo evidente naskas inter ili renkontiĝon. La vizaĝo, la mieno de psikiatria paciento, fariĝas normo, t.e. kriterio por tio, kio estas donata al la Alia kiel tasko. La suferantaj trajtoj de lia vizaĝo vokas Jesuon al nova ordo de agado, apelacias Lin. Komence aŭdiĝas realisme flanke de la demonhavinto :

— Kio estas inter mi kaj vi ? Kion komunan ni havas ? Vi ja estas Jesuo, Filo de la Plejaltulo (kia kredkonfeso de frenezulo !), dum mi... ! Ne, ne, la Savanto nepre ne venas al li kiel aliaj homoj, nome por turmenti lin. Nia impulse diktita inklino estas kapti, dresi kaj kateni danĝeran frenezulon, plejrapide ĉenante lian senbridan sovaĝecon. Tiel ŝajnas rakonti sankta Marko.

Sed tute malas la savanta kaj sanprudenta alpaŝo de Jesuo. Legion kaose regas senharmonia multeco (legio = amaso) da voĉoj kaj ordonoj, pensoj kaj sentoj, piŝoj kaj tiroj, inklinoj kaj strebadoj. La Sanktaj Libroj,

Inspiritaj de Spirito amanta ĉiun homon kaj konanta ĉiun nomon emas indiki ĉion per nomoj ; do, atentu, gelegantoj (aŭ pli bone : geaŭdantoj) sciu ke estas demonoj, kiuj malraras kaj kutime deziras armee ekposedi nin. Tiam nia konduto fariĝas diabla, satana, demona. Vidu, kiel ni perdas la veston de nia homa digno, nenie povas trovi pacon kaj kriegante/detruante altrudas al aliaj nian blindan volon. Tion ni vidas, malminiature, kiam ni direktas niajn okulojn al eksa Jugoslavio, kiu jam survojas estiĝi freneza amasenterigejo. Jus mi aŭdis, kiel kaj kiom la pola prezidento Lech WAŁĘSA ĝemis, konfesante : « Ni gardu nin eldormigi la demonojn ! » Jesuo, tamen, elpelas kaj ekzilas ilin, sed tion li faras videble aperiginte ilin en nia enigma ekzistado ; per unu vorto « ili estas kompleta fi porkaro ! » Do senkompate forigu !! La Paŝtisto de la ŝafaro, kies normoj restas samaj hieraŭ, hodiaŭ kaj morgaŭ, klare ne toleras bestojn, kiuj intencas nenligi lian laboron...

Demonoj en preĝejo

Homoj povas simili al porkoj demondirektitaj. Tio en mian memoron revokas leginda intervjuo, kiun mi hazarde legis antaŭ nelonge. Journalisto parolis kun bonkora, engaĝita pastoro, kiu jam dum jaroj noble malfermadas sian preĝejon por bonvenigi, subtegmentigi kaj helpi multege da homoj sociperiferiaj. Nepre ne ĉiuj liaj ŝafoj aprobas tiun manieron de paŝtado ! Li diris : — Kelk-



foje la rilatoj inter la vizitantoj de la Paŭlo-preĝejo estas tiel malamikaj, tiom perfortaj, ke demono ŝajnas tie ĉirkaŭvagadi. Tiumomente mi evakuas la lokon per la vortoj : « Rapide pafu vin for, knabaro ! Prefere prenu hodiaŭ liberan tagon ! Ĝis alia fojo ! »

Legio konvertiĝas

Kiel la enterigejaj eventoj konkrete evoluis en tiuj tagoj, tion mi ne sukcesos al vi ekspliki, sed la atente aŭskultanta publiko povas facile konstati, ke la ekstrenezulo rericevis sian veran, aŭtentan vizaĝesprimon kaj sian homan indon, ekis celebri sabaton kaj konsekriĝis eĉ predikisto. Akre atentu liajn mienon, kostumon kaj paroladon !

— Iru hejmen kaj heroldu tion, kion La Vivanto per Sia kompatemo faris kun vi ! La mirefika terapio senkateniganta, kiun Jesuo aplikis, resumiĝas nuksoŝele per tri verboj : ekrimarki, alrigardi kaj renkontiĝi.

Konvertito estu mesaĝisto

Kaj post sia kuraciĝo nia ĵusa paciento forlasas sian ege strangan loĝlokon inter la tomboj montare situantaj, kie li „vivis” meze de la signoj ŝtone konkretaj kaj signifantaj : danku kaj memoru ! Eble en liaj oreloj dolĉe sonas la himno, kiun poste sankta Paŭlo registris en sia letero al la Efezanoj (5:14) :

Vekiĝu vi, dormanto, kaj releviĝu el la mortintoj, kaj Kristo vin prilumos !

Ciukaze li reiras al siaj parencoj, kiuj travivis

kun li nepriskribeble teruran tempon, verŝajne infersimilan. Li repilgrimas al la Granda Urbo, freneze giganta metropolo, konsistanta el deko da urboj : Dekapolis. La karakterizaj problemoj kaj bezonoj de tiuj tagoj sendube nur malmulte diferencis de la niatempaj ; ili ja abundas en plurforma kaj diverskultura kunvivado. Fone de siaj spertoj, kiujn instruis al li vivado sur la „agro de mortintoj”, Legio povas nun prediki en la koro de la mondo : — Ni troviĝas meze en la morto, kaj jen : ni vivas !

Kaj li vekvoĉe vokos la komunumon, ke ĝi ne haltu ĉe la pasinteco nek prokrastu la momenton de konvertiĝo al la prilumanta Kristo kaj veran lumon serĉanta proksimumo. Ke ni neniam plu returniĝu al la ŝtoniĝintaj kaj mutiĝintaj monumentoj, kiujn ni definitive lasu malantaŭ ni ! Eĉ ne tiam, kiam tiuj laŭtvoĉe invitas kiel proverbaj egiptaj viandopotoj... Ke la kredanto lernu de sia riĉa historio tiom plena de saĝaj lecionoj ! Jes, la kerno de la mesaĝo de predikisto Legio estos la malo de la filozofio de HEIDEGGER : *Sein zum Tode* (Estadi al morto), sed pli ĝuste : Ni vivas leviĝinte el la dormo de la morto.

Kaj ni ?

La vizaĝon de bonaj mesaĝistoj (kaj tia povas esti ĉiu el ni !) karakterizas kompatemo kaj ilia agado estas direktita al senkatenigado kaj sendemonigado de homoj troviĝantaj en la ungegoj de avido kaj perforto, subpremo kaj volupto, kaj multaj aliaj frene-





zaĵoj. Ĉiam denove okazu inter homoj savon alportantaj renkontiĝoj, kiuj preventu aŭ kuracu kiajn ajn formojn de mensa lepro, kondukantaj al elpelado kaj ekzilo. La ĉefa demando estas esence : kies vizaĝon ni, soifantoj, renkontos en niaj ĉiutagaj bezonoj ? Kiu amoplene akceptos nin ? Kiu estos oazo por kiu ? Kiu montriĝos kiel bonfaranta pluvo sur la sekan teron de nia koro ? Kiu pagos, se vi komprenas la bealan metaforon, la salajron al la pramisto por ke iu etendu al ni la manon sur ĉiu ajn imagebla Spinalongo, kiun konas nia vivo ? Kiu fariĝos nia kun-ulo, nia kun-ulino tra la senvivista labirinto de la surtera kun-vivado ? En tio, ĝuste en tio, saviĝo nia kaŝiĝas, la miraklo de nia konvertiĝo, kiam ni nin turnas al la alia, majuskle kaj minuskle skribita.

Cu ni ne miru ?

Mirinde belaj kaj rivelaj estas la lastaj vortoj, kiujn konklude notis nia evangeliisto forte admiranta la savlaboron de Jesuo :

« Kaj ĉiuj miregis. »

Cu ni mem ne miras, ke ni ne kiel anonimaj soifantoj dise vagadas tra mondo maloaza kaj disŝirita, apenaŭ kredante ke ĉeestas Unu Kiu memoras nin kaj forgesas nenies nomon, eĉ ne la nian ?

Jacques TUINDER

IRU DO KAJ LERNU !

« Amu la kreitojn kaj proksimigu ilin al la Torao » (HILLEL).

De tago al tago ĵurnale kaj ekrane sekante la evoluojn en nia ŝajne elĉarniĝinta mondo, ni ne povas ne konkludi, ke niaj tagoj neniel similas al serene kaj pace fluetanta rivero, sed pli ĝuste kompareblas kun sovaĝe kaj blinde galopanta ĉevalo. En nia tempo tiom eventoplana kaj kaosa la homa vivo tre filme kaj fulme okazas kaj ĉio evidente aliĝas en preskaŭ superlativa rapideco.

Bonvenigu unu la alian !

Absorbante la neniam sekigantan torenton da novaĵoj, tiun litanion monotone komponitan el tragedioj, mizeroj kaj katastrofoj, ĉiu el ni devas ofte konstati : « Cu ni nur perforte kaj armile povas solvi konfliktojn ? » Senfinas niaj demandoj ! Kial la malbono en la homo estas tiel obstina, malkonstrua, rafinita, satana ? Kial ni multe pli lupe ol lupoj inter ni kondutas ? Kial ni ne kune kaj komune kreu loĝindan ĉielon el la tero nur

- ▣ PRINCIPIO, TORAO, ETIKO
- ▣ PRINCIPE, TORAH, ÉTHIQUE
- ▣ PRINCIPLE, TORAH, ETHICS
- ▣ PRINZIP, TORAH, ETHIK
- ▣ PRINCIPIO, TORAH, ÉTICA
- ▣ PRINCIPIO, TORAH, ETICA



prunte al ni donita ? Kial ni plendas pri mallumo kaj ne klopodas ekbruligi proverban kandeleton ? Kial ni prefere emas kapti kaj kutime rifuzas simple akcepti unu la alian (Rom 15:7) ? Kial la historio instruas al ni, ke la homaro ne kapablas lerni de siaj pasinteco, spertoj kaj lecionoj ?

En sia letero al la Romanoj S-ta Paŭlo uzas vorton pli nuancitan ol simple „akcepti“. Mi parafraze interpretus lian instruon jene : « Vaste etendu viajn manojn kaj gaste levprenu unu la alian kiel plej karajn gekunulojn. Traktu vin reciproke bonvenige, kompleze, gefrate, humane ! Faru tion laŭ la maniero de Kristo, kiu kiel plej amika Kunulo kaj plej fidela Protektanto levis vin al la nivelo de la Dia Gloro ! » Konkrete : tiele pralandanoj agu kun novlandanoj kaj inverse ! Tiele la diversaj gentoj en la sama lando unu la alian „levu“ tolereme kaj pacience anstataŭ mallevi al detruo kaj morto !

Ho, kia bela iluzio ! Kia ridinda utopio ! Kiu povas kredi ?

Drewermann

Se mi devus trafe karakterizi la modernan homon, mi ne povus ne fari tion paradokse. Ni multege lernas, diverse scias, sed apenaŭ konas. Ni ja alproprigas lerneajn fakojn, studas por profesio aŭ specialismo, sed eble ne lernas vivi. Tial ni estas kaj restas iusence fremduloj. La edukado tro direktiĝas al tio, ĉu ni poste atingos postenon en la

socio, sed tre foras de la plej kerna demando : kiel ni fariĝos feliĉaj homoj kaj kunhomoj, kiuj scias kial ni surteras kaj kiuj konscias pri niaj deveno kaj destino, niaj rolo kaj respondeco. Homoj nia-epokaj ŝajne povas ekzisti senhistorie, sentradicie, senradike... Pri tiu moderna homo liberama Eugen DREWERMANN opinias, ke ŝi/li apenaŭ minimumon atendas flanke de eklezioj instituciigintaj. Por la plimulto la Evangelio ne plu havus la invitantan voĉon de mesaĝo ! Li observis, ke multe da nuntempuloj, konscie aŭ nekonscie, mortige suferas de timigo kaj psika malriĉo. DREWERMANN ade emfazas la bezonon pri kulturo, kiu intime inter si ligas la socion, la naturon kaj la individuon.

Hillel

Supozeble vi konas la profundsencan rakonton pri fremdulo, kiu iam vizitis la domon de Samaj, hebrea saĝulo.

— Instruu al mi la tutan Mosean Instruon, dum mi staras sur unu piedo ! li demandis. Samaj vidis, ke la viro volas moki pri li. Konsekvence li koleriĝis kaj per mezurilo forpelis lin. Poste la nekredanto direktis sin al la domo de Hillel* :

— Pacon al vi!" diris Hillel.

— Saluton!" respondis la fremdulo.

Kaj Hillel demandis :

— Kion vi deziras, sinjoro ?

Kaj la denova respondo estis :

— Mi ŝatas lerni la tutan Mosean Instruon, starante sur unu piedo !

* Tiu nomo estas tre konata inter esperantistoj el la verkaro de D-ro L.L. ZAMENHOF.

Hillel bone ekrimarkis lian mokemon, sed li neniel koleriĝis. Li diris al la fremdulo :
 — Kio estas malagraba al vi mem, tion ankaŭ ne faru al via proksimulo !
 — Ĉu tio estas la kompleta Torao ? demandis la nekredanto.
 — Jes ! estis la respondo. Jen la fundamento, kaj ĉio cetera estas ekspliko, komentario. Iru do kaj lernu ! (Sabbat 31 a).

Por aktualigi : se vi ne ŝatas vidi vian loĝejon, en kiu enestas via kara familio, fajre konsumitan, sekve ne ekbruligu la domon de via najbaro ! Sed aŭdu la fremdulon en nia rakonto, kiu reagis jene :
 — Dankon, Hillel, se ĉi tio estas la fundamento, mi deziras lerni la tutan Toraon !

12-jara knabo

Pensante pri la judmaniera lernado mi vidas antaŭ miaj okuloj 12-jaran knabon kun enviinda kono pri biblio kaj etiko, tradicio kaj historio, vivo kaj morto, ceremonioj kaj festoj. Pri li ni same miras kiel la tiamuloj. Li majstre rolas en la templo, aŭskultante la instruistojn kaj starigante demandojn. Jesuo ne lernis ekskluzive kaj analize (fakmaniere, fragmente, sektore, segmente) sed inkluzive kaj sinteze (unuecige, interdepende, kunlige, cemente). Li okupis sin pri Torao, kio estas multe pli ol ni kutime nomas 'religio'. De sia junaĝo li konis la sanktajn literojn. Nu, la 'ora regulo' de Jesuo estas la Hillela fundamento pozitive formulita :

« ĉio ajn, kion vi deziras, ke la homoj

faru al vi, vi ankaŭ faru al ili. Tio estas la Torao kaj la Profetoj ! » (Mat 7:12).
 Kaj la 'ora dono' (urĝa tasko kun ordonanta karaktero) rimas kun tiu regulo : « Amu vian proksimulon, kiu estas kiel vi », t.e. bezonanta amon, liberiĝon, gracon, kompaton, leviĝon.

La Torao estas unu, unika, universala kono, ampleksanta la ĉielon kaj la teron. Helpe de ĝi Dio kreis la ĉielon kaj la teron. La Torao estas ĉiutempa : ĝi herolde prilumas la hodiaŭon kaj profete apertas la morgaŭon. Ĝi estas kvazaŭ konstitucio, kiu kunligis kaj unuigis la elektitan popolon tra ĝia longa historio. Laŭ jud-tradicia metodo de instruado infanoj kreskadas al la kompreno, ke ĉio kundependas kun ĉio. Scienco kaj tekniko, filozofio kaj ĉiutaga vivo kune estigas, por tiel diri, unu 'fakon', unu 'blokon'. Nenion oni povas senkonsekvence elpreni, izoli, apartigi, abstrahi. Ankaŭ ni homoj estu 'lev-prenotaj' en novan mondordon, kiu integre kaj entute survojas al perfekta harmonio kaj plena unueco...

Kio estas lernado ?

Kiel ĉi tio validas por la lingvo-instruado* mi povas ilustru per talmuda rakonto, temanta pri tio kiel infanoj kutimas lerni la alfabeton. Mi ĉikadre limigu min al kvar literoj.

Gimel (ג) kaj *dalet* (ד) estas la tria kaj kvara literoj de la hebrea alfabeto. Infano demandas :



* Esperantisto, kompreneble, forte interesiĝas pri lingvoj kaj instruado !

** Tio estas : en la direkto de *dalet*.

*** Tio estas : en la direkto de *gimel*.

- Kion signifas *gimel dalet* ? Kaj la respondo estas :
- *Gemol dalim*, t.e. bonfaru al la bezonantoj. Alia infano komentas :
- Kial *gimel* sube havas streketon maldekstren ?**
- Nu, klare, ĉar la bonfaranto akre atentu la bezonantojn !
- Iu demandas :
- Kial la supro de *dalet* iom elstaras dekstren ?***
- Prave ! reagas la instruisto. Tio signifas, ke la bezonanto igu sin trovi de sia bonfaranto ! Alia infano :
- Kaj kial *dalet* turnas sian vizaĝon maldekstren ?
- Tio, fine, estas, por ke la bezonanto ne vidu kiu estas lia bonfaranto !

Du aliaj literoj nomiĝas *kof* (פ) kaj *res* (ר). Infano demandas :

- Kio estas *kof* kaj kio estas *res* ?
- Kaj la instruisto respondas :
- *Kof* estas *kados* (= La Sanktulo) kaj *res* estas *rasa* (= la malpiulo).
- Alia infano :
- Kial *kof* deturniĝas de *res* ?
- Tio estas, ĉar La Sanktulo, La Beninda, parolis : Mi ne povas elfeni la malpiulon. Kaj alia demandas :
- Sed kial la kroneto de *kof* estas turnita al *res* ?
- Jes, pro tio, ĉar La Sanktulo, La Beninda, diras : kiam li konvertiĝos, Mi kronos lin, kiel Mi mem surhavas kronon ! Iu daŭrigas :

- Kaj kial *kof* apertas sube ?
- Nu, respondas la instruisto, tio celas evidenti ke, kiam la malpiulo konvertiĝos, Dio nepre rimarkeble malfermos sin antaŭ li !

Kiel vi vidas, ĉi tiuj kvar literoj kontaktigas nin ne nur kun la hebrea lingvo, sed krome kun ekzegezo, etiko, diakoneco, dogmatiko, evangelistiko, homiletiko, k.t.p. Kaj tio estas pli ol duono de kompleta teologia enciklopedio...

Gardu la urbon

Surpaperigante ĉi tiujn pensojn mi estas informanta la legantaron, ĉar gravas ke ni havu 'formon' de sciantaj kaj konsciantaj homoj. Informanto estas iu, kiu, por tiel esprimi, enverŝas formon en neformitan personon : amorfan, nekristaliĝintan, sed malsate apertan. Same la Kreinto 'en la komenco' donis formon kaj sencon al tero senforma kaj senorda. Ankaŭ la tasko de predikisto estas kerugme (=herolde laŭ κηρυγμα) informi homojn, nome pri urĝa mesaĝo. Kaj tiu mesaĝo, ortodokse komprenita, estas paradoksa, t.e. Dio fariĝis unu el ni, akceptante la formon de servisto, por ke ni lusenice fariĝu diaj.

Por ni, diligenta lernantaro*, Moseo kaj la Profetoj, inter kiuj Jesuo elstaras, estas instruistoj nin profunde formantaj kaj abunde informantaj. Ni ja devas scii, ke la rolo de instruado en la tradicio, el kiu ĉerpis Jesuo, malfacile trotakseblas. La Talmudo diras, ke

* En la germana lingvo oni tiel bele parolas pri *Jünger*, kvazaŭ instruado tenas nin junaj kaj freŝaj !



infanojn lernantajn neniu ĝenu, ĉar la mondo ekzistas dank'al ilia spiro. La instruadon judoj ĉiam konsideris nepra kondiĉo por vivi kaj supervivi, ĉar subiĝas urbo sen lernejoj. Ankaŭ la pereco de Jerusalemo rezultis el la fakto ke lernigi infanojn oni neglektis. Tial la instruistoj estas kromnomataj tiel profunde kaj pensige 'urbogardistoj'.

Nia tempo, kiun oni ĵus baptis la postideologia epoko, bezonas multajn tiajn gardistojn, ĉar la tero, plenplena de homoj vagantaj sur vojoj sen montriloj, ne estas bone konservata, protektata, respektata, levprenata. Do en mondo freneza kaj freneziga, en tempo senhalte aliiĝanta kaj evoluanta nepre multnombro lernejoj benkoj, sur kiuj ni disĉiplo lernu kompreni kaj praktiki la oran regulon. En tiu lernejo ni spertu, kio estas ripozo, vivopaciĝo, libertempo-por-Dio, sabato por koro kaj menso, sopiro al preĝo, studo kaj liturgio. Tie ni aŭdas, ke ĉio skribita estas skribita por nin instrui (2 Tm 3:16). Tie ni ekzercu humilecon, mildecon, toleremon, paciencon, unuecon, pacamon, justecon. Tie ni spertu, kiom la vivanta Dio estas unu kaj unika, kaj kiel la Diaj vortoj vivu kaj vivigu per niaj buŝoj, koroj, kapoj kaj manoj. Tie 'vokitoj en unu espero' (Efe 4:4) lernu, ke Dio en Jesuo jam longe akceptis nin antaŭ ol ni komencis demandi kaj serĉi; ke Li levprenis nin, ne konsiderante nian naciecon aŭ sennaciecon, nian gravecon aŭ anonimecon, nian religian konvinkon aŭ politikan koloron, nian malfortecon aŭ inertecon. Tie, nelaste, ni

lernas preĝi, ekzemple ke Li ambaŭbrake levu nin al kunuleco, por ke ni ne fremdule kaj senilire fordrivu en marĉejon de izolo kaj morto.

IRU DO KAJ LERNU

HILLEL kaj Jesuo kvazaŭ prisme resumis la tutan Biblion kiel etikan ordonon, direkthan al la proksimulo, kiu estas bildo de Dio. La rilato al la najbara homo esprimas, konsekvence, religian dimension. La interligiteco de amo al Dio kaj amo al homo estas afero esenca.

Se la kristanoj, tiuj esperantaj kaj esperigantaj pilgrimantoj tra disige bruleganta mondo, pretas kiel (sendiplomaj) urbogardistoj akcepti la unikan fundamenton laŭ la ora regulo, en iliaj oreloj sonas kaj sonoras la invitantaj vortoj: « Iru do kaj lernu ! » Ni esperu, ke daŭra lernado promesos al la mond' eterne militanta... sanktan harmonion !

Jacques TUINDER

El prediko por la
ekumena Esperanto-
Diservo dum la
Kirchentag 1983 en
München, Germanio.

Jacques TUINDER (*Tuinder*), nederlandano (1933), nun emeritulo, studis filozofion kaj teologion, kaj poste en sociala akademio, laboris kiel klinika social-helpisto. Inicialis Agado-n E₃, kiu fariĝis nune Evidente.

LA DEVO GASTIGI EN JUDISMO

Gastigado estas por judoj ne iu „hobio“ aŭ „libervola agado“, sed iu multe pli profunda afero, kaj ligita al la kerno de judismo.

La Talmudo (la „lernado de la instruo“ ankaŭ nomita la „buŝa Torao“) kiu estas la centra verko, kiu gvidas la vivon de la judoj (pli multe en Jerusalema ol en Tel-Aviv) klarigas, ke gastigado kaj gastamo estas ĉefa ordono (*micva*) kaj alte rekompencita de Dio per ĝiaj fruktoj en ĉi tiu mondo kaj ĝia kerna esenco estos prezervita en la venonta mondo¹.

Unu el la rabenoj de la Talmudo konsideris gastamon al vizitantoj eĉ pli valora ago ol akcepti la *Sefirason* (la Dia Ĉeesto)². Alia talmuda fonto montras al la gastamo de Abraham al vizitantoj, kiel la kialo por kelkaj gravaj mirakloj, kiuj okazis al la izraelidoj dum ilia vagado en la dezerto — la ĉiutaga manao kaj la akvo de la „akvoputo de Miriam“³.

Kio estas la taŭga maniero plenumi ĉi tiun centran ordonon, nome montri gastamon al vizitantoj? Elstara saĝulo de la pasinta

1. Babilona Talmudo, Sabat 127 a.

2. Samloka.

3. Babilona Talmudo, Baba Mecia 86 b.

- ▣ GASTAMO, JUDISMO, ABRAHAM
- ▣ HOSPITALITÉ, JUDAISME, ABRAHAM
- ▣ HOSPITALITY, JUDAISM, ABRAHAM
- ▣ GASTFREUNDSCHAFT, JUDENTUM, ABRAHAM
- ▣ HOSPITALIDAD, JUDAISMO, ABRAHAM
- ▣ OSPITALITA, GIUDAISMO, ABRAHAM.

4. Lia vera nomo estis Rabeno Israel Meir ben Arie Zev Ha-Kohen (1838-1893) sed pli ofte konata per lia karesnomo, kiu devenas el Psalmaro 34:12 « Kiu ajn vi estas, homo, kiu deziras vivon kaj amas multajn kaj bonajn tagojn. »

5. *Complete writings of the Chofetz Haim. The Book of the love of kindness* | CHOFETZ HAIM. - New-York : Abraham Yitzhak Friedman Pub.

6. Genezo 18:1-8,16.

7. Rabeno Slomo ben Ichtaki (= RA-S-I) (1040-1105).

8. Genezo 18:1, la klarigo de RASl.

9. Babilona Talmudo, Baba mecia 86 b.

jarcento, RAfEC RAJIM⁴ detale pritraktas tiun demandon en sia libro *Ahavat Hased* (Amo de bonfaro, ŝato de amo)⁵. El tiu libro oni povas formuli la ĉefajn gvidajn principojn, kiujn RAfEC RAJIM elserĉis, evoluante ilin el profunda analizo de diversaj sanktaj tekstoj, ĉefe kaj unuarange el la rakonto pri Abraham en la 18-a ĉapitro de Genezo, kie li montris sian gastamon kaj zorgemon por la tri gastoj⁶.

Oni trovas, ke ĉefe tri aspektoj de la gastamo de Abraham elstaras :

- 1) lia impeto en serĉado por gastoj,
- 2) la tutampleksa naturo de lia gastamo,
- 3) lia vervo persone zorgi pri la bono de la gastoj.

Ni traktu tiujn tri aspektojn iom pli detale.

Lia impeto en serĉado por gastoj

La klasika bibli-komentariisto RASl⁷ notis, ke Abraham, kvankam ankoraŭ resaniĝonta (estis la tria tago post lia cirkumcido, la plej dolora tago) tamen sidis ĉe la pordo de sia tendo serĉante por eblaj gastoj⁸. La Talmudo rakontas, kiel Eliezer, la servo de Abraham, estis sendita por serĉi gastojn sed trovis neniun. Abraham tiam mem ekserĉis gastojn por inviti ilin kaj vere trovis vojaĝantojn⁹, kiujn li provis konvinki resti ĉe li kiel gastoj¹⁰.

La tutampleksa naturo de lia gastamo

La gastamo de Abraham komencis jam kiam li salutis siajn gastojn, honorante ilin riverence, kaj li daŭrigis donante al ili lokon por sidi kaj ripozi antaŭ la manĝado. Post kiam li regalas ilin ĝis plena satiĝo, Abraham akompanis la gastojn sur ilia vojo¹¹.

Lia vervo persone zorgi pri la bono de la gastoj

Kvankam Abraham havis multajn servantojn kapablajn zorgi por liaj gastoj, li preferis servi ilin persone¹².

* Persono li salutis ilin kurante renkonte al ili.

* Persono li helpis prepari la manĝon.

* Persono li regalas la gastojn starante apude la tutan tempon, dum ili manĝas.

* Persono li akompanis la gastojn survoje, kiam ili daŭrigis sian vojaĝon.

RAfEC RAJIM proponas, ke ni povas lerni de Abraham multajn detalojn pri la ideala konduto kun gastoj. Kaj eĉ se ni ne povas fari ĉion precize kiel Abraham, ni tamen povas provi plenumi kelkajn el tiuj instruoj¹³.

a) Amike kaj kore saluti la gastojn.

b) Tuj regali la gastojn per manĝo ĉar eble ili hontas mem peti pri manĝo.

c) Servi la gastojn kun „ĝoja sinteno”

10. CHOFETZ HAIM, citita verko, p. 82.

11. samloke.

12. samloke.

13. samloke, pp. 82-94.

kaj ne hezite aŭ kolere.

d) Ne lasu viajn proprajn ĉagrenojn kaj timojn influi vian sintenon en la servado de la gastoj.

e) Trakti ĉiun gaston kvazaŭ li estus riĉulo, eĉ se li vere ne havas monon.

f) Ne rakonti pri viaj problemoj kaj ĉagrenoj al la gastoj. Ne ĝenu ilin per tio.

g) Senkulpigi vin ke vi ne havas eblecon servi pli da manĝo aŭ pli bona manĝo.

h) Provizi la plej bonajn litojn en via posedo.

i) Metu vin mem en la ŝuoj de la gastoj! Imagu ke vi estas lia gasto por tiel antaŭvidi ĉion kion li bezonas, ĉu honoro, ĉu manĝo, trinkaĵo aŭ loko por dormi.

j) Akompani vian gaston sur lia vojo.

k) Klare indiki al la gastoj la vojon se ekzistas iu problemo atingi la venontan destinton. Se necese akompanu ilin survoje ĝis ili certas pri la daŭrigo de la vojo.

Konkludoj

Abraham estis la „eterna” modelo kiel gastigi gastojn en la plej bona kaj agrabla maniero. La biblia rakonto pri lia sindonado en tiu rilato lumigas la vojon por pli ol cent generacioj de liaj posteuloj kaj por la vastega disĉiplaro sekvanta liajn instruojn, kiu hodiaŭ ampleksas preskaŭ duono de la homaro (la

abrahamecaj religioj).

En la regiono de Beer-Seva en Israelo, kie Abraham loĝis kaj faris interligon kun la loĝantoj, kreskas arbo, kies hebrea nomo simbolas la gastamon de Abraham, nome *esēl* (*alef, šin kaj lamed*).

Alef: *Afila* = manĝo

Šin: *Štia* = trinkaĵo

Lamed: *Livaja* = akompano

RAFEC RAJIM klarigas por ni kiel ni devas lerni de la konduto de Abraham kaj kiel la ategaj normoj, kiujn li provizis, povas esti aplikataj ankaŭ en la moderna tempo.

Esperantistoj troviĝas pro naturaj kialoj ofte en la rilatoj de „gasto kaj gastiganto”. El la juda tradicio, oni vidas kiel la „bona ekzemplo” de unu homo povas fariĝi la alstrebata idealo por la plimulto. ■

David GILBERG

Jeremi GISHRON

verkita por kaj unue aperinta en *Jerusalem Bulletin*, 12, 1993.

Jeremi GISHRON (*gišron*), israelano, naskiĝinta (1948) en Svedio, migrinta al Israelo en 1972. Studis ekonomion, geografion kaj religion. Doktoriĝis pri *Religiaj trajtoj en Esperanto*. Aktivas en Eldonejo *Sivron*.

CENTESIMUS ANNUS


Ni estas kelkaj geamikoj, kiuj, dum pluraj renkontoj, pristudis la lastan leteron de la Papo Johano Paŭlo la 2-a *Centesimus Annus*, kiu estis verkita okaze de la centjariĝo de la letero de Leono la 13-a pri la socia situacio.

Alterne, sekvante tiun ĉi dokumenton, ni ekstraktis :


- la homan dignon,
- kapitalismon,
- marksismon,
- la dignon de la laboro,
- la signifon de posedo.

Tiel ni pli bone ekvidis la papan kaj eklezian penson pri tiuj temoj. Ni deziras ke, siavice aliaj „malkovru” tiun komprenon legante ĉi tiun papan leteron. Tial ni verkis la ĉi-sekvan resumon, petante indulgon pro forgesoj aŭ tro mallongigitaj punktoj.

Fine de la deknaŭa jarcento, Eŭropo spertas gravajn sociajn ŝanĝiĝojn, la industria erao troviĝas en sia apogeo. Reakcie al troa



- ROMKATOLIKA EKLEZIO, ENCIKLIKO, SOCIA DOKTRINO.
- ÉGLISE CATHOLIQUE ROMAINE, ENCYCLIQUE, DOCTRINE SOCIALE.
- ROMAN CATHOLIC CHURCH, ENCYCLICAL, SOCIAL DOCTRINE.
- RÖMISCH-KATHOLISCHE KIRCHE, ENZYKLIKA, SOZIALLEHRE.
- IGLESIA CATÓLICA ROMANA, ENCÍCLICA, DOCTRINA SOCIAL.
- CHIESA CATTOLICA ROMANA, ENCICLICA, DOTTRINA SOCIALE.



* NDLR : En tiu teksto komprene „la Eklezio“ kiel „la Romkatolika Eklezio“, kvankam ĉi tio certe koncernas ĉiujn ekleziojn.

eksploato de la laborista klaso fare de la kapitalistoj, disvolviĝas socialismo (marksismo), ideologio kies pintaĵon konsistigas la klasbatalo, kaj kie malamo ĉie troviĝas.

La Papo Leono la 13-a, antaŭvidante la negativajn konsekvencojn de socialismo pro suprentaĵo de netoleremo kaj egoismo malprofite al la pli malfavoritaj, publikigas la Enciklikon *Rerum Novarum* (1891), rememorigante la homojn ke la plej grava leĝo, kiun Kristo transsendis al ni estas « Amu vian proksimumon kiel vin mem. » Se persono estas agnoskita kiel kreaĵo de Dio, tiu estas libera. La kapableco ami estas la plej alta formo de persona libereco. Neniu estas aŭtentike libera, nek respektante nek promociante la liberecon de siaj ĉirkaŭuloj. Vivi por libereco kaj vero kunigas nin al Kristo.

Depost tiu alvoko de Leono la 13-a, aliaj enciklikoj pri la socia doktrino de la Eklezio*, kiel *Quadragesimo anno* (Pio la 11-a, 1931), *Populorum Progressio* (Paŭlo la 6-a, 1967), montris al la homoj la vojojn de saĝo, de amo kaj de homa digno.

En 1991, Johano Paŭlo la 2-a, publikigante la enciklikon *Centesimus annus*, okaze de la centjariĝo de *Rerum Novarum*, analizas la lokon de la homo en la nuna socio, ankaŭ insistas pri la homa digno, kaj interesiĝas pri la problemoj, kiujn affrontas nun la homaro.

Johano Paŭlo la 2-a denove kritikas la marksisman ideologion, kies origino estas ateismo, kaj kiu estas fondita sur pragmata

koncepto de la homa kaj socia realeco, tiel provokante spiritan malplenan. Fronte al tiu ideologio, kiu postulas kolektivismen proprieton, li asertas la neforpreneblan rajton je privata propio, en respekto de la principo de la universala destino de posedaĵoj, de la homa digno kaj de libereco. La propio de la produkto-rimedo estas justa kaj prava, kondiĉe ke ĝi ebligu utilan laboron por ĉiu homo ; Tio estas precipa por lia persona kaj familia disvolviĝo.

Proprio ne koncernas nur la materiaj posedaĵoj, kaj povas esti el tre diversaj specoj. Multaj homoj ne povas aliri al la novaj formoj de propio, kiuj estas kono, tekniko kaj scio ; tiel ili marginiĝas ; tiel kreiĝas gravaj maljustaĵoj meze de nia socio. La socia doktrino de la Eklezio substrekas la neceson de la merkata kaj entreprena orientiĝo al la komuna bono.

En la encikliko, la Eklezio denove agnoskas ĉies rajton grupiĝi por defendi siajn interesojn kaj labori al pli bona socia justeco. Ĝi insistas pri la principo de akcesoreco kaj de solidareco, kiel la precipaj vehikloj por la memorganizo de la socio.

La Eklezio favoras la reĝimon de libera ekonomio, kiu agnoskas la fundamentan kaj pozitivan rolon de entrepreno, merkato, de privata propio kaj de la respondeco, kiun ĝi implicas en la produkto-rimedo, de la libera homa kreivo. Tamen, la ŝtato devas garanti la institucian, juran, politikan ekvilibron

kaj tiel protekti la bazajn kondiĉojn de libera ekonomio. Ĝi devas prizorgi, ke ĝiaj intervenoj ne malutilas al la kompetentecojn de la diversaj privataj grupoj aŭ asocioj, ĉiu havante sian parton de respondeco, de iniciato kaj de agado ene de la kolektivo.

La Eklezio radikale kontraŭstaras totalismon, kiu konsideras ke nur kelkaj homoj estas seneraraj kaj povas arogi al si la efektivon de absoluta potenco. Ĝi male aprezas la demokratian sistemon, ĉar ĝi certigas la partoprenon de la civitanoj al la politikaj preferoj kaj garantias al regatoj la eblecon elekti kaj kontroli siajn regantojn aŭ anstataŭigi ilin pace.

La eventoj de 1989 en la orienteŭropaj landoj precipe originas en la senefikeco de la ekonomia sistemo (seneco de iniciato, manko de ekonomiaj proprieto kaj libereco). Tiuj popoloj remalkovris siajn liberecojn, siajn religiajn kaj kulturajn radikojn. La encikliko analizas tiujn eventojn kaj vokas por ne blinde fali en „materialisma” kapitalismo, sed male promocii socian modelon, kies fundamentoj estus fonditaj sur homa digno kaj homaj rajtoj. Estante laŭ figuro de Dio, homo meritas respekton.

La encikliko substrekas, ke solidaran klopodon devas fari la aliaj nacioj por helpi tiujn ĉi landojn en ilia lernado de libereco kaj de malfermiteco al la mondo. Ĝi tamen substrekas ke oni ne devas neglekti la triamondajn landojn, kiuj troviĝas en katas-

trofa situacio, kaj kies evoluo devas efektiviĝi ĉiudirekten, devigante la instancojn (UNO, eklezioj, ktp.) plifortigi sian organizadon por gvidi la ekonomion mem al la komuna bono.


La progreso de la malriĉuloj estas okazo de morala, kultura kaj ekonomia kreskado por la tuta homaro. Siaflanke la Eklezio helpas por konstrui pli bonan estontecon per dialogo kaj solidareco.

La Papo kondamnas la perforton kaj asertas ke la vera paco supozas la forigon de la katizoj de milito kaj la aŭtentikan repaciĝon inter la popoloj per rimedo de dialogo kaj amo.

La encikliko insistas pri multaj aspektoj de vero (vero de homo, de la bono de homo, vero de informado, vero de naturo, vero de familio kaj de infano).

Johano Paŭlo la 2-a proklamas ke ĉiu homo estas respondeca pri sia frato, kia ajn li estas (origino, raso, religio), ĉar li apartenas al la homa familio. Ĉiu devas atenti fronte al la danĝeroj de agnostikismo, pragmatismo, skeptika relativismo, fanatismo kaj fundamentalismo. Cent jaroj post la publikigo de *Rerum Novarum*, la Eklezio ankoraŭ troviĝas antaŭ „novaj aferoj” kaj novaj defioj.

La encikliko *Centesimus Annus* rememorigas ĉiujn kristanojn ke la Eklezio ĉiam zorgis pri la homa destino kaj klopodis montri la vojon, foje malebenan, kiu kondukas al la digno de la vera homo : la serĉo al Dio



La grupo invitas la legantojn de tiu ĉi artikolo sciigi siajn opiniojn, kritikojn, ktp. Roland TIERCE, 8 Chemin des Marguerites, F-95520 Osny

estante la sola vojo al la plenumiĝo de la vera homo.

En la 3-a jarmilo, « la Eklezio fidele daŭrigos alproprigi la vojon de la homo » sciante ke ĝi ne iras tute sola, sed kun Kristo, ĝia Sinjoro. ■

Paroŝa grupo en Pontoise (Francio)

Trad. Roland TIERCE,
membro de tiu ĉi grupo.

ĈU ESPERANTO ESTAS DI-REGNA ?

Kiuj estas la karakterizoj de aferoj, kiuj estas *di-regnaj*, kiuj kondukas al la Regno de Dio ? Kaj ĉu Esperanto kongruas kun tiuj ?

Kiu konatiĝas kun Dio, eĉ se nur treege parte (pli ol parte, kiu povus ?), baldaŭ komprenas, ke en nia mondo troviĝas du tute malsamaj kategorioj de ekzistaĵoj : tiuj, kiuj favoras la iron al Dio, la alvenon de ties Regno, kaj tiuj, kiuj malfavoras ĝin. Kio kondukas al la regno de Dio, tion ni povas nomi „*diregna*”.

Kompreneble, en multaj okazoj, la situacio ne estas simpla. En ĉiu el ni, ekzemple, fortoj *diregnaj* kaj kontraŭ-*diregnaj* batalas inter si, kaj same en la socio, kaj same en multaj sferoj : ekzemple, en la literaturoj, en la tradiciaj manieroj eduki, en tiu aŭ alia politika doktrino, en la Eklezio. Tamen la koncepto pri *diregneco* montriĝas



- VIRTO, KRISTANA VIVO, ESPERANTO, KOMPARO
- VERTU, VIE CHRÉTIENNE, ESPÉRANTO, COMPARAISON
- VIRTUE, CHRISTIAN LIFE, ESPERANTO, COMPARISON
- TUGEND, CHRISTLICHES LEBEN, ESPERANTO, VERGLEICH
- VIRTUD, VIDAD CRISTIANA, ESPERANTO, COMPARACIÓN
- VIRTÙ, VITA CRISTIANA, ESPERANTO, PARAGONE

utila, kaj povas esti interese ĝin apliki al esperanto.

Atentigo pri la kriterioj

Por distingi, ĉu io estas diregna aŭ ne, ekzistas tuta serio da kriterioj. Sed antaŭ ol pritrakti ilin, ni devas noti, ke en io diregna agas fortoj, kiuj radias eksteren, kaj transdonas siajn kvalitojn, formante kvazaŭ reton de konstantaj interŝanĝoj. Rezulte, inter la diregna afero, individuo trafita de ĝi kaj la medio, en kiu ĝi renkontiĝas, troviĝas tiel intima rilato, ke vortoj mankas por esprimi la realon. Ekzemple, la medio, kiu subtenas la diregnaĵon, samtempe estas subtenata de ĝi; simile, la individuoj, kiuj nutras ĝin, kaj sen kiuj ĝi ne ekzistus konkrete sur nia planedo, samtempe estas de ĝi nutrataj. Aperas do konstanta interŝanĝo de energio: multan energion la koncernaj individuoj kaj medioj dediĉas al la diregna afero, sed ili per tiu agado mem mistere ĉerpas el ĝi abundan energion.

Pro tio, la kriterioj, kiujn ni ĉi-sube pritraktos, rilatos jen al la diregna afero mem, jen al la individuoj, kiuj sin donas al ĝi, jen al la medio en kiu ĝi vivas. Okazas fenomeno de harmonio: la diregnaĵo, la individuo kaj la komunumo kunvibras. La dia kvalito en io diregna ne estas difinebla; tial oni ne serĉu ĉi tie ian matematikan aŭ juran precizecon, la vortoj uzotaj ne povas rekte montri, ili nur elvokos kaj sugestos, tiel ke la nedireblaĵon, al kiu ili celas, vi povu intuicie koni. Se via



koro estas malfermita al la transteraj realaĵoj, tio sufiĉos, por ke vi povu firme apliki la kriteriojn. Konsiderante ilin kiel erojn de unu tuto, vi faros al vi bildon ĝustan; vi sentos, ke ĉiuj *kursive* presitaj vortoj estas deirpunktoj de diversaj vojoj, kiuj konstante interkonektiĝas, kaj kondukas al unu sama, sed neesprimebla, Centro.

Amo kaj justeco

Inter tiuj kriterioj, eble la plej evidenta, el kristana vidpunkto, estas *amo*. Sed ne iu amo. Amo poseda, inkлина submeti al si la „amaton“, ne estas amo kristansence. Ni rigardas amo nur aman sintenon, kiu *respektas* la individuecojn, kaj kiu sekve favoras *unuiĝon de diversuloj*, tiamaniere, ke la koncernatoj, kvankam unuiĝintaj, tamen restas diversaj. Tial la modelo de amo estas la Triunuo: tri personaj estaĵoj, kiuj amas unu la aliajn tiel tute, ke ili kunplektiĝas en unu personan(*) estaĵon, kiun ni nomas Dio.

Amo postulas ne nur respekton, sed ankaŭ *deziron koni kaj kompreni* la alian en ties vera esenco, kiel eble plej profunde. Ĝi do ne povus ekzisti sen dialogo inter kunparolantoj, al kiuj *egala digneco* estas agnoskita.

Krome, se la amo estas aŭtenta, ni deziras, ke la aliulo plene disvolviĝu laŭ propra naturo, ne laŭ nia ideo pri li aŭ ŝi. Tiu principo, kiu radikas en respekto, kondukas al *justeco*: neniam manku al iu tio, kion li rajtas

(*) Teologoj dirus: « unusenca » (noto de la redakcio de *Espero Katolika*)

havi, kaj neniam unu havu tro rilate al la „maltruo” de alia. Ĉirilate, kristanismo emfazas, kiel facile la etuloj, nekapablaj sin defendi, riskas esti preterlasitaj ; tial ĝi instigas al *speciala atento al senpotenculoj*, etuloj, kripluloj, viktimoj de diskriminacio, ĉiuj estaĵoj malestimataj kaj socie malfavoritaj.

Kiel ni ĵus vidis, amo enhavas la deziron, ke la amata persono aŭ estaĵo — la samo ja validas pri planto aŭ besto — kresku, disfloru, *disvolviĝu* en feliĉo, kaj produktu bonon, fruktojn, feliĉportajn. Tiu emo helpi ke la latentia fruktodoneco de la amata disvolviĝu, montras, ke diregneo inkluzivas ankaŭ *fekundecon*. Kie troviĝas harmonio kun la dia regno, tie ĝenerale ankaŭ arta kreemo renkontiĝas : la Spirito estas fekunda kaj la amo, kiun Ĝi stimulas, nepre bezonas esprimiĝi per belo.

Kie do la Spirito inspiras — kio estas alia maniero priskribi tion, kion ni nomas „diregna” — tie ankaŭ viglas *vivo*. Se ni vidas sklerozon, rigidiĝon, tie ni ne frontas al io diregna. Tiu vivo pulsas multaspekte, jen pli interne, per profundiĝo de la propraj valoroj, aŭ per persista elteno dum la ĉirkaŭaj cirkonstancoj estas malfavoraj, jen pli ekstere per disvastiĝo, fondo de novaj celoj, kiuj mem kreas novajn kaj tiel transdonas plu tiun spirite riĉigan specon de vivo.

Se oni troviĝas en diregna medio, oni tuj sentas tiun vivon en la ĉiea vicleco, kaj rido tie abundas, dum maloftas deprimiĝo.

Tial alia kriterio de io diregna estas, ke ĝi favoras *ĝojon* ; ĝi per si mem, emas disradii etoson de gajejo.

Aŭtenta ĝojo neniam estas egoisma. Eĉ en siaj plej primitivaj, infanecaj formoj, ĝi serĉas *komunikiĝon*, transdonon. Per tio, ĝi rilatas ankaŭ al amo, kiu estas, finfine, feliĉkonstrua rilato. Tiu bezono krei feliĉon ĉirkaŭ si, kune kun la deziro kompreni, kunnaskas *kompatemon*, t. e. konsenton pri sufero.

Iom paradokse, ĝojo kunordiĝas kun *kapablo suferi*. La ĝojo disfloras ene de la diregna medio. Sed ĉar la ekstera mondo tiun ofte ne komprenas, sed forĵetas, ĵaluzas aŭ timas, la kontakto kun la ekstero multfoje alprenas la formon de kolizio, kaj tiuokazaj batoj kaj streĉiĝoj estigas suferadon en tiuj, kiuj volas resti *fidelaj* al la diregna trezoraĵo. Io simila okazas, en individuo aŭ grupo, kiam konfliktas diregnaj kaj kontraŭ-diregnaj fortoj. Nur prenante la suferon sur sin akcepteme oni povas superi la konflikton. Kiu suferon antaŭakceptas, tiu vekas en si *kuraĝon*. Kio ja baras la vojon al kuraĝa ago, se ne la timo suferi ?

Cu havi aŭ esti ? Cu grandioza aŭ plej simpla ?

Al amo, al akcepto de sufero kaj al la emo transdoni ĝojon ligiĝas la volo *servi*, ĉefe al malgranduloj, ne serĉante profiton por si. Unu el la karakterizoj de io diregna sekve estas, ke ĝi estas *donema*. Fakte, homo



kerne trafita de la direгнаjo sin donas al ĝi kaj ni povas aldoni al niaj kriterioj ankaŭ *sindediĉon*.

La kapablo doni postulas, ke oni ne estu katenita al posedaĵoj. Efektive, io direгна estas *neligita al materio*, ĝi estas spirita, ĝi rilatas pli al la sfero de esto ol al tiu de havo. Mono, sekve, neniam povas esti celo de iu dediĉita al ĝi.

Kiu strebas havi pli ol esti iĝas kaptita de la emo posedi kaj ĝenerale bazos sian vivon sur la propra riĉiĝo: li metas la centron de sia aktiveco en si mem. Tiu memcentro, neakordigebla kun direгна agado, povas prezentiĝi subforme de orgojlo. Fakte, ĉi-lasta estas la origina kulpo, kiel klare montras la vortoj de l' serpento praĝardeno. Rezulte, ni povas atendi, ke inter la kriterioj helpantaj juĝi, ĉu io estas direгна aŭ ne, troviĝas *humileco*, *modestececo*. Sub ofte mizera, ridinde negrandioza ŝajno — ni pensu pri la naskiĝo de Jesuo aŭ pri la elekto de azeno por eniri Jerusalemon — kaŝiĝas io ege valora. Ĉu la Regno de Dio mem ne estis komparita al kaŝita trezoro? Sed por atingi tiun trezoron, necesas iĝi pli pura, seniĝi je multo kruda kaj balasta, rafiniĝi, forlasi la altajn komplikaĵojn de snobeco por fariĝi infanete *simpla*, kun malriĉo pli riĉ-enhava ol riĉeco, ofte ŝargita per superflujaj ornamaĵoj. En io direгна ĝenerale troviĝas la kristaleca, pura kvalito. Ĝi estas *travidebla* kiel la ĉielo mem.

Materio estas ligita al spaco kaj tempo. Io direгна ne. Tial unu el la signoj, ke homa strebado harmonias kun la dia regno estas la ĉeesto en ĝi de *pacienco* kun ties kunulo *persistemo*. Ni ja konas la ĉielan paciencon. La pedagogio de Dio rigardas jarcentojn horoj, kaj ne fortasas sian celon pro tio, ke ĝi renkontas fortegajn kontraŭstarojn. Malligita disde tempo kaj spaco, direгнаjo sekvas la ritmon de historio, ne de unu homa vivo aŭ de modo forflugonta, kaj ĝi strebas al spaco tutvasta, t. e. al *universaleco*.

Venki paco

Ami, respekti, pacienci, kompreni alies suferon kaj rezigni la orgojlan tenton montri sin pli forta, ĉiuj ĉi trajtoj kune naskas unu planon: la *refuzon al perforto*. Io direгна, laŭ la kristaj instruoj, ne neniigas siajn malamikojn en grandioza triumfa batalo. Ĝi venkas per kaj pro si mem, pro la propraj internaj kvalitoj, per la disradiado de propra ena bono. Fakte, ĝi ĉiam agas diskrete, kiel apenaŭ spurebla fermento, kaj ĝi venkas per la *vero*.

Trompo uziĝas por submeti, sed vero liberigas. Kaj kiu respektas la aliulon, tiu lasas lin libera. Ni do enmetu *liberecon* en niajn kriteriojn, memorante pri la „libereco de la infanoj de Dio“. Tamen ni rimarku, ke ne temas pri iu ajn libereco, certe ne pri tiu libereco kiu, manke de konsidero al la aliuloj aŭ de intelekta rigoro, kondukas al detruo kaj ĥaoso.



Ne estas facile tuj kompreni, ke libereco postulas rigoron. Sed por liberigi sin de infekto, necesas, rezigninte la eraran opinion de tiuj, laŭ kiuj liberi estus povi fari ion ajn, severe *obe* la regulojn de higieno. Kaj kiel la homoj sukcesis liberigi sin de fiksiteco al Tero por atingi Lunon? Ĉu ne rigore studante la leĝojn de la universo (fizika, ĥemia, astronomia) kaj rigore obeante ilin?

Tiu harmoniigo de du aspektoj unuavide kontraŭdiraj — ĉi-kaze *libereco kaj rigoro* — estas tipa pri multaj diregnaj aferoj. Simila kunordigado retroviĝas inter ĝojo kaj sufero, simpleco kaj riĉeco (vera, interna riĉeco), *saĝo kaj frenezo* (saĝi laŭ eternaj normoj estas frenezi laŭ ĉi-mondaj), *racio kaj sentoj*, *grandeco kaj eteco* (ni pensu pri la grandeco de Dio, kreanto de ĉiuj ekzistaĵoj, enkarnigita en „fiaskinta” surkruca malfortulo aŭ en bebo en-manguja).

La nomitaj paradoksoj fakte rilatas al strebado solvi la konfliktojn per malkovro de pli alta vidpunkto. Al la diregna sfero tute certe apartenas la volo meti *paconte*, kie ĉiu el la kontraŭuloj volas trudi sin aŭ siajn ideojn. Feliĉaj la pacigantoj!

De kalumnio al espero

Eble ĉar diregnaĵo malhavas la evidentajn allogojn, brilon kaj potencon aspekton de tio, kio fascinas ĉi-monde, ĝi ofte estas malestimata kaj miskomprenata de la modokreantoj kaj de la amasoj, kiuj ilin sekvas, ĉar



seki gvidanton estas pli facile kaj sekure ol mem kritike rezoni. Al la klarvidantoj, diregnaĵo montras la profundan superecon de la modesta super supra brilo kaj delogantaj pseudosolvoj. Ĝia apero sekve kaŭzas, en granda parto de la publiko, malkomfortan dubon pri la praveco de ties ĝistima pensmaniero. Sed al homoj ĝenerale ne plaĉas pensi, ke lo eta kaj ŝajne malforta fakte povas, laŭ vera valoro, stari super la plej brilaj modaloj, al kiuj ĝis tiam iris ilia admiro. La plimulto do preferas malagnoski la altan valoron de la diregnaĵo. Pro tio, ofte, oni *mokas, ridindigas, eĉ kalumnias kaj persekutas* ĝin. Pro la propra esenco, ĝi ja ne povas konformiĝi al la postuloj de ĉi-mondo, ĉar tio estus nei sin mem; ĝi do rezistas, kaj tiu rezisto al konformiĝado vekas koleron kontraŭ ĝi en multaj ĉi-monduloj. Io diregna sekve troviĝas malkomforte rilate al la sintenoj de la ĉirkaŭa mondo: sin deviginte respekti la veron kaj neniam perforte agi, ĝi malfacile povos defendi sin kontraŭ tiuj kiuj juĝas supraj kaj preferas uzi mensogon kaj la tutan premon de sia ĉi-monda famo, potenco aŭ pozicio, ol fronti al la simpla, nuda vero.

Male al la eksteruloj, tiuj kiuj spertis la diregnaĵon, sentis ĝian valoron tiagrade, ke naskiĝis en ili plena *fido* al ĝi; cetero, ĝi ne seniluziigis ilin: kiom ajn modesta kaj mokata ĝi aperas, ĉe elprovo ĝi fakte montriĝas *fidinda* kaj fortika. Nutrataj ĉe la sama fonto, la aliĝintoj emas fidi ankaŭ la sam-diregnaĵ-

ulojn pli ol iun, kiu ne konas ĝin, ne partoprenas en ĝia vivo, ne ĝuis ĝian sekretan — t. e. rezervitan al spertantoj — plezurdonon. En tiu komuna kaj reciproka fido kuŝas la radikoj de *solidareco*.

Rezigninte je trompo kaj perforta sintudo, la diregna afero devas ĉerpi sian energion el io alia, nek memcentra, nek agresiva. Kiel amo, la ĵus priparolitaj fido kaj solidareco estas du el tiuj gravaj energifontoj. Alia nomiĝas *espero*. Espero estas kompleksa, tre matura sento, ĉar ĝi postulas samtempe, ke oni firme koncentru la rigardon al la celo, kaj ke oni tamen sciu, ke eble oni ne atingos ĝin. Se la celon oni neeviteble atingos, oni ne plu diras: « Mi esperas », sed « Mi estas certa ». Tamen, esperi estas tre efika sinteno. Malespero kondukas morten, dum obstina espero savas.

Konkludaj rimarkoj pri la kriterioj

Noti ĉiun apartan kriterion certe estus neeble, sed la ĉefaj verŝajne estis ĉi-supre menciitaj. Gravas atenti, ke delikata ekvilibro necesas inter la diversaj aspektoj de diregna afero, el kiuj ĉiu nuancas kaj korektas la aliajn.

Ekzemple, se mankas humileco kaj ankaŭ respekto al la alulo tia, kia li estas — t. e. alia, do malsama — tiaj elementoj kiel sindediĉo, akcepto de kalumnio kaj persekutoj, fido, solidareco kaj persistemo povas naski sintenon fanatikan. Simila sekta kvalito

ne troviĝas en io aŭtente diregna. Se mankas humileco kaj respekto, mankas io esenca, kio signifas, ke la esenco de la afero fariĝis alia ol diregna. Sekve, por juĝi pri diregneco, oni kontrolu, ĉu la diversaj kriterioj harmonie kunordiĝas inter si.

Tio ne signifas, ke necesas trovi ĉiujn kriteriojn kune, por ke io estu difinebla kiel diregna — ne ĉiu kriterio ja estas aplikebla al ĉiu kazo — sed ke neniuj trajtoj de la prijuĝata afero, agado, estaĵo aŭ kolektivo kontraŭu unu el la kriterioj. Fanatikeco povas esti klasita kiel ne-diregna, ĉar ĝi kontraŭas la kriteriojn „respekto”, „humileco” kaj „rezigno je perforto” (perforto kompreneble inkluzivas ankaŭ psikologian perforton).

Ni plue rimarku, ke verŝajne nenio surtera povas esti cent-procente diregna. Kiel ni vidis komence, ĝenerale fortoj diregnaj kaj kontraŭ-diregnaj troviĝas samtempe en la sama loko, kolizie aŭ disŝire. Estas do saĝe relativece rezoni: ĉu en afero *x* diregnaj fortoj estas alte superaj al la kontraŭ-diregnaj? ĉu afero *x* estas pli diregna ol afero *y*?

Oni povas vortigi la situacion jene. La kriterioj, ĉi-supre revultaj, kune signas iun ĝeneralan etoson. La demando sekve estos: ĉu la etoso de la koncerna afero, homo, grupo, politiko, konduto, ktp, havas ĝeneralan harmonion kun la etoso signita de la nomitaj kriterioj? Ekzemple, movado, kiu stimulas malamon, ne povas esti diregna, eĉ se ĝi





respondus al multaj el la aliaj kriterioj, ĉar instigo al malamo kreas etoson, kiu absolute ne povas akordi kun la diregna etoso, kia ĝi estis ĉi-supre prezentita.

Kie situas Esperanto ?

Cu Esperanto estas diregna ? Al tiu demando mi ne respondos. Mi lasos al vi, kara leganto, la plezuron respondi al ĝi per via propra meditado. Meditu unue pri ĉio ĉi-supre dirita. La kriterioj estas signifitaj per vortoj presitaj *kursive*. Pensu pri la aferoj, kiujn vi konas kiel venantajn de Dio kaj kondukantajn al Li, laŭ viaj propraj religiaj spertoj kaj laŭ tio, kion vi trovis plene kredinda en via religia instruigo. Pensu ankaŭ pri la aferoj, kiuj klare kontraŭas la Regnon de Dio.

Se vi trovos, ke la kriterioj ĉi tie listigitaj estas pravaj, apliku ilin al la Internacia Lingvo, memorante la principon, ke oni juĝu arbon laŭ la fruktoj. De Esperanto vi povas konsideri tri aspektojn : (1) la lingvon mem, ekzemple el struktura vidpunkto ; (2) ĝiajn devenon, komencan estiĝon kaj historion (kiuj estis la motivoj de ZAMENHOF, la cirkonstancoj de la naskiĝo de la lingvo, la obstakloj, kiujn ĝi renkontis kaj kiel ĝi reagis al ili... ?) ; (3) la esperantistaron, kiel kolektivon portanton de io laŭ ĝi tre valora, kion ĝi sentas sin respondeca transdoni al la homoj.

Cu, kaj kiel mi, vi trovos kelkajn el la nomitaj trajtoj en la lingvo mem ? Por mi,

ekzemple, Esperanto enhavas ion puran, travideblan, kion oni malofte renkontas en homaj lingvoj (travideblas la analizo de la frazo, travideblas la signifo de multaj vortoj, kiel ekzemple „ne-re-san-ig-ebl-a“, kaj ĉu, kompare kun la aliaj, Esperanto ne estas lingvo multlalte senbalasta ?). Simile, mi retrovas la kriterion „respekti“ en la maniero, laŭ kiu Esperanto traktas la vortelementojn : neniam radiko estas detruata, misformata, perforata por adaptiĝi al la postuloj de kompleksa signifo aŭ sia rolo en frazo ; la lingvo konstante respektas ĝian integrecon.

Cu vi retrovos la kriteriojn de diregneo ankaŭ en la estiĝo de nia lingvo ? Cu ankaŭ en nia kolektivo, en la etoso de niaj renkontiĝoj, en la motivoj, kiuj allogas la plimulton el ni, ne ĉiam klare kaj konscie, al tiu por eksteruloj stranga sindediĉo ? Cu iuj Esperanto-medioj respondas al tiuj kriterioj, sed aliaj tute ne ? Meditu, leganto, mia frato. Mian konkludon vi probable divenis. Interesus min scii, ĉu la via similas al ĝi.

Claude PIRON

P.S. : La ĉi-supra artikolo estis jam verkita, kiam mi rimarkis interesajn aspektojn de nia lingvo, pro kiuj mi fojfoje min demandas, ĉu ĝi ne estis inspirita de pli alte ol ni ĝenerale imagas. Konsideru ekzemple la vorton **amen** : en Esperanto, ĝi signifas ankaŭ „direkte al amo“, „iranta en amon“. Simile, la vorto **dialogo**, kiel aŭdata, povas kompreniĝi kiel **dia logo**, t. e. „allogo de

Dio", „logo al Dio". Cu estas tro fantazie pensi, ke Esperanto celas ebligi dialogon en reciproke respektaj kondiĉoj ne troveblaj ekster ĝi, interpopole, kaj ke tia dialogo nin logas al Dio ? Okulfrapas ankaŭ la nomo de la lingvo, ofte malŝatata, eĉ de parto de la esperantistaro, ĉar kontraŭa al la ĉi-mondaj modoj : ĝi estas la nomo de sento, kiu fakte estas unu el la tri grandaĵoj cititaj de Paŭlo (1 Kor 13:13) : fido, **espero**, amo. Neniu lingvo en la mondo, ĉu etna, ĉu proponita kiel internacia, inkluzivas en sia nomo ion tiel diregnecan. ■

Artikolo jam aperinta en *Espero Katolika*, 756/757, julio-aŭgusto 1984, pp. 117-125. La aŭtoro faris kelkajn korektojn.

Claude PIRON (1931), svizo, laboris kiel tradukisto por diversaj internaciaj organizoj (UNO, MOS), poste fariĝis psikologo ; fame konata Esperantista verkisto kaj prelegisto, ankaŭ sub la nomo de Johan' VALANO.

ESPERANTO KAJ „MOLAJ" DIKTATUROJ

Esperanto, idealo kaj ideologio

Esperanto estas esence **demokratia** fenomeno. Tial **principe** la ideala socia medio por Esperanto estas demokratio. Por diktaturoj ĝi estas io fremda, eĉ danĝera. Tamen, dum la lastaj kvar jardekoj en la „molaj" diktaturoj de Orienta Eŭropo la Esperanto-movado atingis ŝatindajn rezultojn. Tiujn sukcesojn oni ofte atribuas al tio, ke en tiuj landoj dum la intermilita periodo funkciis forta maldekstrula Esperanto-movado, kaj multaj de ties aktivuloj postmilito atingis altajn postenojn en la diktaturaj reĝimoj. Sed tio estas kaŭzo nur duagrada, dum esencan rolon ludis la cirkonstancoj de la mola

- ▣ ESPERANTO-MOVADO, REGIMO, CENTRA EŬROPO, 1945-1990
- ▣ MOUVEMENT ESPÉRANTISTE, RÉGIME POLITIQUE, EUROPE CENTRALE, 1945-1990
- ▣ ESPERANTO MOVEMENT, REGIME, CENTRAL EUROPE, 1945-1990
- ▣ ESPERANTO-BEWEGUNG, REGIERUNGSFORM, MITTELEUROPA, 1945-1990
- ▣ MOVIMIENTO ESPERANTISTA, RÉGIMEN, EUROPA CENTRAL, 1945-1990
- ▣ MOVIMENTO ESPERANTISTO, REGIME POLITICO, EUROPA CENTRALE, 1945-1990

diktaturo (Pripensu ekzemple, ke en Aŭstrio, malgraŭ eĉ prezidento Franz JONAS, la Esperanto-movado atingis konsiderinde malpli ol en Orienta Eŭropo).

La avantaĝoj de la sistemo

Do jen kelkaj aspektoj de la molaj diktaturoj, kiuj ebligis la prosperon de la Esperanto-movado :

1. En diktaturo decidoj naskiĝas arbitre, ilin faras nur malmultaj homoj, do por atingi decidon favoran al Esperanto, sufiĉis gajni la simpatian nur de malmultaj.

2. Pri publikaj monoj same decidis malmultaj homoj, sen efika socia kontrolo ! Tiel do pli facile akireblis mono por movadaj celoj.

3. Ĉia ideologia diktaturo, kaj la komunisma precipe, inklinas al mesiismo. Ĝi pretas provi feliĉigi la homojn kontraŭ ties volo. Entute, ĝi inklinas al utopioj. Oni povas diri, ke la konceptoj „la fina venko de komunismo” kaj „la fina venko de Esperanto” interparenas. Do, la klara mesiismo de la Esperanto-movado estis trajto nepre simpatia por komunista pensmaniero.

4. La Orient-Eŭropaj diktaturoj daŭre havis legitimecajn problemojn internajn kaj eksterajn. Por ili eĉ la limigitaj eksterlandaj propagandebloj, kiujn prezentis Esperanto, estis ne neglektindaj. El tio fontas la relative vasta ŝtata aplikado de Esperanto.



5. La socie bunta Esperanto-movado dum mallonga tempo trovis en si la homojn, kiuj pli-malpli akcepteblis por la diktaturo, kaj tiel kreiĝis relativa harmonio inter la Esperanto-movado kaj la diktaturo. Tiun fenomenon oni povas interpreti kiel pruvon de la vivkapablo de la Esperanto-movado, sed certe ankaŭ kiel ĝian prostituigon. Dependas de la vidpunkto.

6. La diktaturo ne toleris grupiĝojn de civitanoj, kiuj ne integriĝis en la specifan hierarkion de la sistemo. Tio tamen ankaŭ signifis, ke organizaĵoj, kiuj iel gajnis la rajton por ekzisto, fariĝis iasence oficialaj, kvazaŭ „ŝtataj”. Tiu trajto helpis detruiri la verdan Izoliĝemon, sektemon, kaj ampleksigis la sociajn rilatojn de la Esperantaj organizaĵoj. Paradokse la diktaturo signife modernigis kaj profesiigis la Esperantistan agadon.

7. La Esperanto-movado tamen restis certagrade fremda elemento en la diktatura sistemo. Tamen „ne tre danĝera”. Kiel tia, ĝi estis prezentita ankaŭ kiel pruvo de la demokratieco de tiuj sistemoj.

8. En la diktatura sistemo valoraj homaj energioj ne rajtis disvolviĝi libere, kaj estis neuzitaj, se ili ne volis kvazaŭ-agadi en la kvazaŭ-politiko. Por tiuj estis sufiĉe alloga tereno la Esperanto-movado, kiu estis malpli intense kontrolata, kaj tial la agado tie estis pli libera ol sur pli signifaj kaj centraj terenoj de la socio. Tial la Esperanto-movado arigis pli da kapablaj homoj ol ĝi sukcesis en demo-



kratiaj socioj.

9. La elcentre direktita gazetaro simpligis ankaŭ la metodojn de informado pri Esperanto.

Kion profitis la Esperanto-organizaĵoj ?

1. Ili estis ŝtate rekonataj, kio donis devon (subtenadon de/al sistemo) kaj rajtojn (efike disvastigi Esperanton). Ili ricevis subvencion, kies sumo tre variis laŭ landoj, kiu sufiĉis por baza agado : dungado de 1-2 oficistoj, luado de taŭga ejo, eldonado de revuo, ktp.

2. Ili ĝuis ankaŭ kromajn ekonomiajn privilegiojn.

3. Kiel „oficialaj“ instancoj, ili ĝuis certajn privilegiojn (ekzemple eksterlandajn vojaĝojn), kiujn ili povis peri al la membroj, kaj tio altigis ilian altirforton.

4. Ili ricevis relative prestiĝan pozicion, kio plu levis la socian reputacion de Esperanto.

5. Ili daŭre povis ĉerpi el la homaj energioj kondamnitaj al inerteco.

Kion alportos la estonteco ?

Ĝi ne ŝajnas esti bela. Demokratio estas pragmatismaj, kaj el pragmatisma vidpunkto Esperanto en la nuna momento ne multe ofertas. Kaj pri ideologiaj argumentoj la eksdiktaturaj socioj estas plensataj.

Homoj en Orienta Eŭropo deĉutimiĝis de memstara agado, kaj daŭre atendas paŝojn desupre. Sed tiajn paŝojn ne faros la movadaj gvidantoj, kiuj eĉ imagon ne havas, kiel adaptiĝi al la novaj cirkonstancoj.

La Esperanto-organizaĵoj perdas siajn subvenciojn, kaj la ceteraj privilegioj perdas sian signifon. La merkata ekonomio kaj la eblo de libera politika agado forlogos aron da kapabluloj. La ekonomia krizo malebligos al multaj aĉeti Esperanto-librojn, kaj gazetojn. Kaj la financaj kaj politikaj perturboj detruos la tradiciajn kontaktojn, la merkaton bazan de la Esperanto-kulturvaroj produktitaj en Hungario, ekzemple.

Cu ĉi tiu artikolo volas esti apologio de la molaj diktaturoj ? Tute ne. Ĝi volis nur iom disblovi la nebulkurtenon de la eŭforio, kiu kovras la nudan realon, kun la espero, ke sobra alfrontado de la ĵus finiĝanta pasinteco helpas trovi adekvatan strategion por la futuro.

BENCZIK Vilmos

Mallongigita versio aperinta en Norvega Esperantisto, de artikolo aperinta unue en Hungara Vivo, 3-4, 1990, kun permeso.

ĈU MILITO ESTAS PRAVIGEBLA ?


Jam antaŭ ol eksplodis la terura milito en la mez-orientaj landoj¹, mi elektis ĉi tiun temon, kiu havas rilaton kun **etiko**, la ĉeftemo de ĉi tiu *Evangelia Kajero*.

L. NDLR : Temas pri la milito pri Kuvajto.

Mi havas grandan respekton por tiuj homoj, kiuj el humana aŭ etika vidpunkto aŭ el idealismo aŭ el kompato por la homa raso, aŭ pro sentimentaleco aŭ intelektaj konsideroj, respondas : « **Ne, neniam estas milito pravigebla.** »

Sed en ĉi tiu artikolo mi precipe volas respondi al ĉi tiu demando pro mia kredo en Jesuo Kristo, kune kun gefratoj kiuj havas la saman opinion pri la sekvado de nia Savanto en la vivo kiel mi. Kaj ankaŭ ni el la profundo de niaj koroj respondas : « **Nepre ne, neniam milito estas pravigebla !** »

Pro ĉi tiu vivsinteno, ĝuste pro nia kredo en la ĉion-entenantan amo de Dio, oni ofte primokas nin ; mi bedaŭras diri : eble eĉ pli en kristanaj rondoj ol ekster la ekleziaj muroj kaj limoj. Tamen, ni estas forte konvin-



- ▣ MILITO, KRISTANA FIDO
- ▣ GUERRE, FOI CHRÉTIENNE
- ▣ WAR, CHRISTIAN FAITH
- ▣ KRIEG, CHRISTLICHER GLAUBE
- ▣ GUERRA, FE CRISTIANA
- ▣ GUERRA, FEDE CRISTIANA

kitaj ke oni neniam povas pravigi la ekziston de militoj. En ĉi tiuj tagoj de la nova, eble plej kruela milito kaj eble denove tutmonda milito, ni tamen rimarkas ke la samopiniantoj el kiu ajn lando, estas multe pli grandnombraj ol ni povis imagi. Mi hontas ke inter tiuj „protestantoj“ troviĝas pli da nekredantoj ol da kredantoj, almenaŭ se oni havus rajton juĝi pri homoj rilate ilian kredon aŭ mankon de tio. Kiajn ajn motivojn la homoj havas kiuj protestas, mi promesis nur paroli pri mia kristana kredo.

Cu ni kristanoj eble forgesis la vortojn de Jesuo Kristo, kiam Li parolis pri perforto, malamo, detruemo de ĉia vivo, se oni ne plaĉas al ni. Li Instruis al ni ami unu la alian kaj akcepti ĉiujn kiel kreitaĵojn de Dio. Ĉe uzo de perforto ja neniu estos la venkanto, sed ĉiuj fariĝos viktimoj, suferantoj, venkintoj. Post la uzo de perforto okazos perfortego, neniam tiu spiralo de perforto kaj malbono haltos. Homoj, bestoj, la tuta medio, la interrilatoj, ĉio detruigos. La historio pravigas tiun tezon.


Certe kelkaj el vi samopiniis kun mi, sed eble ankaŭ multaj havas kritikaĵojn kaj diversajn demandojn. Mi povas eĉ diveni kiujn. Cu mi vortigos ilin ?

1. Kial vi pensas ke la kristana kredo kaj milito estas nerepaciĝeblaj kontrastoj ?

La obeemo al nia Savanto, Jesuo Kristo, estas la profunda motivo. Rilate al milito, ni devas diri : Mi ne rajtas tion fari kaj

partopreni en ĝi, ĉar la Sinjoro ne volas tion. Kristanoj estas vokitaj starigi signojn de la venonta Regno de Dio. Kristanoj estas liberigitaj el la malnovaj defendkapabloj kaj ili estas vokitaj kaj fortigitaj kaj instruitaj por manipuli novajn kapablojn kiel vivi en amo kun aliaj homoj, labori por la paco, forigi maljustecon kaj kreskigi justecon, vivi sindone servante unu la alian.

Pri aliaj aferoj, kiel ekzemple sklaveco aŭ prostituado aŭ aliaj senhonorigoj de homoj aŭ manipulado de homoj kaj bestaj genoj, ni kristanoj tuj diras : tiuj aferoj estas en nepardonebla kontraŭo al la Evangelio, kaj pro tio malpermesataj. Sed tion oni ne aŭdas en rilato al la milito. Sed en la unuaj ekzemploj ni samopiniis ke la homa raso degeneras, sed kio okazos pro militfaroj ? Tiam nia tuta mondo difektiĝas je financa, ekonomia, ekologia, politika, morala, spirita terenoj, sennombraj homoj kaj aliaj vivaĵoj mortas. Tial pastra kaj profeta servo al la homaro estas kiam la eklezioj kaj ĝiaj membroj konfesas unuanime : Jesuo Kristo malpermesas militon. En la Diserva proklamado kaj en la persona kristana vivo estas la Evangelio de Gvidado kaj Pardonado, de repaĉigo kaj Savo, de Estonteco kaj Promeso same grava kiel la ordonoj de Dio kaj obeemo al la kredo. Pro tio estas la kontraŭstaro de la milito memkomprenebla parto ! Ĉiuj kristanoj devus partopreni al tiu obeemo de la kredo.




2. Tio estas vera aroganta diro ! Pro tio montriĝas via volo por esti ne-solidara kun nia popolo en la peko.

Kompreneble ni volas esti solidaraj kun nia popolo. Sed nenie Kristo postulas de ni esti solidaraj en la pekaj faroj. Ekzemple : mi povas senti min same granda pekulo kiel ekzemple murdisto pro aliaj pekoj, sed neniu povas al mi riproĉi : vi ne plu estas solidara kun tiu murdisto, ĉar vi ne faris ankaŭ murdon. La solidareco kun la Korpo de Kristo, kiun ni spertas en la ekumeno dum la Eŭkaristio aŭ Sankta Manĝo, superas nian solidarecon kun nia popolo. La korpo de Kristo estas disŝirita pro ĉio kio vere okazas en milito. Nepre ne estas eble vundigi aŭ mortigi alian homon kaj samtempe konfesi ke vi amas lin kiel kristano. Vi ne pensu ke kristano, kiu malakceptas la ilojn por militi kontraŭ la malamiko (ĉu vere li estas via malamiko ? vi ja neniam renkontis lin) sentas sin senkulpa. Ni ĉiuj havas kulpon pro niaj vivintenoj, pro la maljusteco en niaj sistemoj, pro la malemo dividi niajn akiraĵojn kun aliaj, kiuj ne estas tiel profitfavaj.

3. Ĉu uzo de militperforto ne estas unu el la multaj kompromisoj kiujn ankaŭ kristanoj en ĉi tiu mondo devas fari ?

Ne, milito ne estas kompromiso inter la postuloj de la tera realeco kaj la ordono de Dio ; milito estas la plena malvenko de la Evangelio, la plena eliminado de Dio. Milito estas milito kontraŭ Dio mem, kontraŭ Lia



kreitaĵo, kontraŭ Lia potenca amo kaj graco.

4. Ĉu vi ne kalkulas kun la terura fakto de la pekoj ? Ni ja vivas en rompita mondo !

Ho, jes, ĝuste mi enkalkulas la pekojn. Sed ni vidis en la antaŭaj militoj, ke ni iris de peko al alia peko. Ke la homaro nuntempe apenaŭ frostotremas, kiam ĝi aŭdas la nomon Hiroŝima, estas signo de kutimiĝado al la plej teruraj krimoj. Eĉ pastoro diris : « Dank'al tiu bombo, ni vivas ! » kaj « Feliĉe, ke tiu bombo falis, nun ni povas denove trankvile vivi ! » Kaj li ŝokiĝis pro nia konsterniĝo ! Kiam ni konstatas ke ni ja vivas en rompita mondo, tiam ni facile povas mortpremi ĉiujn kristanajn virtojn.

5. Ĉu vi ne akceptas la Biblion kiel normon por viaj faroj ? Certe, tial mi estas kontraŭ militado. Jesuo estas la centro de la Biblio. Al li montras la Malnova Testamento, pri li atestas la Nova Testamento.

6. Sed kion vi opinias pri la Malnov-testamentaj militoj ? Ili estis de Dio ordonitaj !

Eblas diversaj respondoj. Persone mi kredas ke ni devas diri rilate tiujn militojn : ĉio en kaj ĉio ekster la Biblio staras sub la kritiko de Jesuo Kristo. Tiujn militojn ekzemple de Josuo kaj de la Juĝistoj mi rifuzas kiel ne-direktindikilojn por miaj agoj. Per Kristo leviĝis la plena Lumo super la mondo kaj ĝiaj enloĝantoj, kaj tial mi kredas ke pro li ne estas al mi permesate fari tion, kion Josuo kaj

la Juĝistoj faris, malgraŭ ke ili eble pensis obei al la ordono de Dio. Oni en tiuj tempoj ja pensis ke ĉio venis de Dio.

Ni ne forgesu la krucmilitojn kaj ĝiajn terurajn sekvojn. Ankaŭ ne ke la kredo en sorĉistinoj, ofte tre talentaj kuracistinoj, kaj la mortigo de tiom da tiaj virinoj estis biblie fondita ! La plej grandaj teruraĵoj okazis tiam al tiuj homoj, kiuj ofte vidis viziojn.

7. La sesa ordono de Dio « vi ne mortigu » tute ne rilatas militaferojn.

Eble vi pravas. Sed, kiam ni vidas tiun sesan ordonon en la Lumo de Kristo, tiam ni bone scias, ke al ni kristanoj estas malpermesate militi. « La litero mortigas, la Spirito vivigas ! »

8. Sed Dio ja mem detruis Sodomon kaj Gomoron !

Povas esti pruvo de la limigita scio de la rakontistoj. Oni ĉiam atribuis ĉion rekte al Dio. Eĉ en la nuna tempo oni aŭdas ofte : « Kial Dio permesas ĉi tiun militon ? Kial Li ne malebligas ĝin ? » Kaj tion oni aŭdas de homoj, kiuj mem tute ne kredas ke ekzistas la Dio ! Tuj oni donas al tiu laŭ ili ne ekzistanta „supera potenco” la kulpojn de ĉiuj abomenaĵoj !

Pro la Evangelio almenaŭ ni tre bone scias kion Dio volas de ni : ne ekstermi la proksimumon kaj ne frakasi la malamikon. Tio estas nia afero. Nekomprenaĵoj en la Biblio estas la afero de Dio.

9. Jesuo ankaŭ uzis perforton ĉe la purigado de la Templo !

Ĉu ni vere povas kompari la „vipon el ŝnuro” kun la atombombo jetita sur Hiroŝima ?


10. Jesuo mem diris ke li ne venis por alporti pacon, sed la glavon.

Certe. Sed se vi komparas Mat 10:34 kun Luko 12:51, vi povas rimarki, ke la glavo signifas ĉi tie „disiĝon”, „dividecon”. Ekzemple se oni alprenas la vivostilon de Jesuo, t. e. servi aliulojn, havi atenton por ili, rigardi ĉu ili havas tion kion ili vere bezonas por vivteni sin, kaj se ne, tiam mem doni tion se vi povas, tiam tia vivo incitas aliajn, kiuj ne volas malhavi luksaĵojn kaj celas pli kaj pli da enspezoj, kaj tio donas disiĝon inter familiaĵoj kaj geamikoj, kaj alpreni la kredon en Jesuo donas ofte dividecon, certe inter diversaj religioj.

11. Tamen Jesuo mem konsilis al siaj sekvantoj aĉeti glavon ! (Luko 22)

Jes, vi pravas. Sed li kalkulis kun surprizatakoj de krimuloj, en tiuj tagoj vere ne imagaj. Mi pensas ke ni devas tiun konsilon kompari kun nia polikaro. Sen mortigi krimulojn, ni tamen devas defendi kontraŭ la malbono inter ni. Kiam liaj disĉiploj informis Jesuon, ke ili aĉetis du glavojn, Jesuo parolis el ĉagrena ironio : « Sufiĉas. »

Mi legis ke Tertuliano (ĉ. 155-222) diris : Kiam Jesuo senarmiligis Petron, kiam



la soldatoj volis aresti Jesuon, tiam li senarmiligis ĉiujn soldatojn.

12. Ĉu ne estas arogantece se oni estas kontraŭ milito ? Jesuo ja mem diris ke lia Regno ne estas de ĉi tiu mondo ? La mondo kuŝas en la malbono kaj tio certe restas.


Jes, Jesuo vere diris ke lia Regno ne estas de ĉi tiu mondo, sed tio ne signifas ke lia Regno ne estas por ĉi tiu mondo.

13. Jesuo mem diris ke « oni aŭdos pri militoj kaj famoj de militoj » (Mat 24:6).

Ho, jes, sed nenie Jesuo diris ke ni devas partopreni en ili. Kontraŭe, li ĝuste vokas nin en la servo de sia Regno. Krom tio, ni legas en la 7-a versiklo : pri ĝenerala nutraj-manko, sed tio ja ne signifas ke ni ne devas klopodi forigi tiujn malsategojn kaj ĝuste klopodi per agraraj ŝanĝoj, ke ili ne plu okazu en la estonteco.

14. Vi forgesas ke Jesuo ordonis obei niajn registarojn. Ni devas doni « al Cezaro la proprajn de Cezaro. »

Certe, sed li samtempe diris : « kaj doni al Dio la proprajn de Dio. » Jam la unuaj kristanoj atentis ĉi tiun aldonon. Ili komprenis kie kuŝis la limo de obeemo. Kiam la registaro ordonis farojn de obeo al ili, kiuj estis kontraŭ la obeo al Kristo, ili rifuzis tiujn ordonojn, malgraŭ ĉiuj ofte teruraj sekvoj. La „imperiestro“ ne havas rajton je nia konscienco. En la moderna milito ni oferas nian



konsciencon.

15. Sed kion vi pensas pri Romanoj 13 ? Tie Paŭlo diras klare, ke ni devas nin submeti al la aŭtoritatoj.

Sed Paŭlo mem ne faris tion ; li ofte troviĝis en malliberejoj ! La sama romia registaro estis komparita en Apokalipso 13 kun « besto, supreniranta el la maro, havanta dek kornojn kaj sep kapojn, ktp. » Romanoj 13 protektas nin kontraŭ anarkiismo ; la nomita glavo de la polico estas ilo por ŝirmi la subulojn de la registaro kontraŭ krimoj. Sed neniam kristanoj devas en ĉiuj okazoj submeti sin al aŭtoritatoj, kaj ankaŭ ne rajtas pravigi per tiu diro de Paŭlo totalisman militisman perforton.

Kontraŭe, per Romanoj 13:8, ni ĉiuj estas vokitaj konkrete ami unu la alian.

Nu, sufiĉas. En mi sonas ankoraŭ multaj aliaj demandoj, sed mi ne povas daŭrigi senfine ĉi tiun imagatan demand- kaj respond-„ludon“. Kiel mi estis povinta tiel esprimi eventualajn demandojn ? Nu, pro miaj spertoj rilate la temo „milito“ kaj la sekvantaj diskutoj.

Ankoraŭ kelkaj praktikaj pripensoj, kiuj estas ankaŭ aktualaj. Ekzemple, oni elspezas tage po unu milionon da dolaroj por armado, sed mortas tage po 40 000 infanoj pro malsato.

Nuntempe unu Patriot-armilo kostas unu milionon da guldenoj. Neniam estas

sufiĉe da mono por la senhavuloj, sed oni forĵetas monon en militoj. Kaj oni tute ne kalkulas la vunditojn kaj la mortintojn. Krome, en Afriko la tuta enloĝantaro mortas pro manko de ĉio. Tamen, la tielnomataj bibliofideluloj, kiel nomas sin granda grupo da kristanoj en Nederlando, tamen pledis kaj konsilis, ke nia landa registaro aĉetu pli da satanaj armiloj !

Ni ofte pensas ankoraŭ en malnovaj, tradiciaj pensoj pri Dio. Oni diras ĉi tie : kiom da kapoj, tiom da ideoj. Varie mi povas diri : kiom da kredantoj, tiom da imagoj pri Dio. Kaj ĉiu preĝas al „sia“ Dio kaj konigas al Li siajn dezirojn.

En la tempo kiam Jesuo estis sur la tero kaj instruadis la homojn, li jam ŝanĝis la teruran tezon : « okulon pro okulo » kaj « denton pro dento » en « Amu viajn malamikojn. »

Aŭ, mi povus ankoraŭ multe pli diri pri la temo « Ĉu milito estas pravigebla ? » Sed mi volas fini per iu rakonto :

Temas pri iu maljuna, sed tre saĝa viro, al kiu diversaj homoj kelkfoje iris por peti lian konsilon en ia problemo. Iun tagon venis junulo al li. Sed tiu venis kun maldecaj pensoj por turmenti la saĝulon. Kiam denove ariĝis homoj ĉirkaŭ la saĝulo, la malsimpatulo vokis :

— Sinjoro, mi volas peti ion al vi. Rigardu, en mia pugno troviĝas eta birdeto ; diru al mi ĉu la birdo vivas aŭ ĉu ĝi mortis.

Li pensis en si mem : Se la maljunulo respondos : « La birdeto vivas, » tiam mi mortpinĉos ĝin kaj se li diros : « la birdo en via pugno mortis, » mi malfermos mian manon por ke ĝi povu forflugi.


Ĉiuj ĉeestantoj senspire atendis la respondon. Tiam sonis la vortoj de la saĝa viro :

— Mia knabo, tiu birdeto estas en via mano.

Mi memoris ĉi tiun rakonton, kiam ekkomenciĝis la abomena milito. Kvazaŭ sonis la vortoj de Dio mem : « Mia kreitaĵo kun ĉiuj vivantoj estas en viaj homaj manoj. »

Dio prenis grandan riskon krei la homan naturon. Li prenis ankoraŭ pli grandan riskon meti ĉion en niajn manojn. Dio ofte bedaŭris tion ! Kion ni faros kun tiu grandega respondeco ? Ni povas forigi la limojn inter la landoj kaj la homoj kaj kune labori por la bono de la homaro. Ni povas honeste dividi la mondan abundan havaĵon inter ĉiuj, ni povas fermi la landajn limojn por rifuĝintoj kaj ne zorgi por la malsatuloj en la mondo, ni povas malfermi niajn manojn kaj meti ilin en la manojn de niaj kontraŭuloj kaj ni povas pinĉi niajn manojn ĝis ili fariĝas pugnoj per kiuj ni terenbatas la kontraŭ-starulojn. Dio vere metis ĉion en niajn manojn. La volo por komenci ĉi tiun militon ĉeestis (malgraŭ ke ne ĉiuj kolpodoj por malebligi ĝin estis jam elĉerplitaj). Sed ĉu la volo por fini ĝin ekzistas ? ■

Jelly T. KOOPMANS-SCHOTANUS. (1891)



Jelly KOOPMANS-SCHOTANUS, 75-jara, nederlandano, edzino de Wim KOOPMANS, konata porpaca laboranto kaj esperantisto. Si estis laika reformita pastoro. Si verkis *Preĝo por ĉiu tago*, tradukita germanen *Bete mit mir*.

LA LEGO KAJ LA PROFETOJ

« Ne pensu, ke mi venis por detrui la leĝon aŭ la profetojn ; mi venis, ne por detrui, sed por plenumi » (Mat 5:17).

Jen estas la certigo de nia Sinjoro mem, ke li reportos la leĝon al ĝia originala alteco ; ĉar la Levida leĝo estis pli malalta, ol tiu, kiu estis en la komenco. La leĝo de Dio ne ŝanĝiĝis, sed la homa kompreno de ĝi mirinde lumiĝis, de kiam venis Kristo la Savanto.

La Skribistoj studis la leĝon ; la Fariseoj estis skrupule atentemaj pri ĝia kono kaj observo. Tamen Kristo diras :

« Se via justeco ne superos la justecon de la Skribistoj kaj Fariseoj, vi tute ne eniros la reĝnon de la ĉielo » (v. 20).

Kelkaj personoj citas la militojn de la Malnova Testamento kiel pravigon de milito. Sed ni memoru, ke nur sub la Levida leĝo Dio ordonis militon. La Levida leĝo daŭris nur mallongan parton de la Malnovtestamenta epoko. Parolante pri ĉi tiu, oni ofte aludas

- ▣ MILITO, INTERNACIAJ RILATOJ, ETIKO.
- ▣ GUERRE, RELATIONS INTERNATIONALES, ÉTHIQUE.
- ▣ WAR, INTERNATIONAL RELATIONS, ETHICS.
- ▣ KRIEG, INTERNATIONALE BEZIEHUNGEN, ETHIK.
- ▣ GUERRA, RELACIONES INTERNACIONALES, ÉTICA.
- ▣ GUERRA, RELAZIONE INTERNAZIONALE, ETICO.

sole al la periodo de la Levida leĝo, la malpli alta, donita post la rompiĝo de la Dek Ordonoj, ĝis venos Kristo.

Ni tamen esploru ĉi tiun Levidan leĝon. La hodiaŭa militistaro apenaŭ ĝin aprobus. Troviĝas en ĝi nenia Dia institucio de profesia militistaro, nenia milita disciplino, aŭ amasigo de bataliloj. La makzelo de azeno sufiĉis por Ŝimŝon ; bova bastono por Samgar ; malplenaj kruĉoj kaj torĉoj por Gideon. Amasegoj ne estis necesaj : al Gideon estis dirite : « *la popolo, kiu estas kun vi, estas tro grandnombra.* » Hodiaŭ oni ĉiam postulas pli : pli da ŝipoj, pli da homoj. Sed laŭ la Levida leĝo, kiam oni frontis la malamikon, la oficiroj devis ordoni al la novedziĝintoj : — Reiru hejmen ; kaj al tiu, kiu nove aĉetis domon, — Iru reterne, kiu estas timema — Iru reterne. En la okazo de Gideon du trionoj iris hejmen, tamen ankoraŭ la popolo estis „tro grandnombra“.

Dum la lasta milito, kiom ĝojus multaj kompatinduloj, pro permeso reiri hejmen !

Kiam oni provas pravigi modernan militon per la sistemo de la Malnova Testamento, tio montras, kiel senzorge oni ĝin studas ; kaj kiom malmulte oni komprenas la tiamajn kondiĉojn de la juda vivo.

Sed Kristo diras : « *Se via justeco ne superos ... vi tute ne eniros la regnon de la ĉielo.* » tio estas, la Kristan reĝejon. Ni devas preĝi : « Venu via regno » en niajn vivojn, en nia medion, tiel larĝen kiel etendiĝas nia

influo. Sed ĉu ni povas tion fari, se ni subtenas la militan sistemon ? Ĉu tio estas la justeco laŭ kristo ?

Ni aŭskultu tion, laŭ priskribo de STANLEY, la eltrovinto de LIVINGSTONE, kio la milito efektive estas. Kiam junulo, STANLEY partoprenis en la civila milito inter Norda kaj Suda Ameriko. Li diras :

NDLR : fakte Nordo (Usono) kaj Sudo (ribelaj ŝtatoj)

« La ĝenerala nereligieco, la malatento al la religia praktiko, la malĉastaj emoj de la soldatoj, la senzorga kaj sovaĝa detruo de vivo, la avida dezirego al mortigo, la ruĵoj kaj artifikoj de la milito, la ĉiusemajna prediko por ĝia defendo, la ekzemplo de miaj pliaĝuloj kaj superuloj, la entuziasmo de belaj virinoj — fine, ĉio, kio en mia propra naturo estis malforta, vana kaj malfirma ; ĉio ĉi tio kuncelis por min fari tiel indiferenta, kiel miaj kamaradoj, al ĉiu sankta devo. Oni instruis al mi, ke tio kio estas kontraŭleĝa por la civilulo estas laŭleĝa por la militisto. La « Ne faru » de la Diordonoj nun tradukiĝis per « Faru. » Mortigu ; mensogu ; ŝtelu ; blasfemu ; avidu ; malamu ; ĉar per kia ajn bela nomo oni maskas ĉi tiujn fiagojn, ĉiu ilin praktikas, de la Prezidanto ĝis la simpla soldato. »

La nenecesa milito

La milito estas nenecesa, kaj ne povas esti humanigita. Kelkaj konfesas, ke ĝi ne akordas kun la instruo de Jesuo, sed diras, ke

tamen ĝi estas necesa. Ĝi ne estas necesa. Ekzistas pli bonaj rimedoj.

Antaŭ ne longe estis danĝera kverelo inter Francujo kaj Germanujo ; granda incitiĝo pri la afero de Casa Blanka. Sed la francoj proponis meti la demandon antaŭ la Hagan Tribunalon. Tion oni faris : kun la sekvo, ke ambaŭ nacioj faris bedaŭresprimojn, kaj ke ambaŭ nacioj poste sentis inter si pli da afableco ol antaŭe.

En la daŭro de pli ol cent jaroj ekzistis disputo inter ni kaj Usono pri la fiŝejoj de Novlando ; disputo sufiĉe akra por iam ajn flamigi la militan spiriton. Sed en la nuna jaro oni konsentis submeti la aferon al la juĝo de la Haga Tribunalo. Post ses semajnoj ellaboriĝis aranĝo kontentiga por ambaŭ partioj.

Jen aferoj, kiuj okazis dum la lastaj kelkaj monatoj. Kial mortigi centojn kaj milojn da viroj, kiam oni povas aranĝi ĉion pli bone per juĝo kaj justo ?

Kial okazu militoj ?

Per la beno de Dio la pacmovado rapide kreskis. Ekzemple sur la Amerika Kontinento, la nordaj, sudaj kaj centraj ŝtatoj interkonsentis submeti siajn disputojn al Tribunalulo starigita en Washington — kaj disputo ĵus estas solvita de tiu tribunalo.

La ordinara prudento diras al ni, ke ne estas racie batali, kiam la aferoj povas esti multe pli bone aranĝitaj ĉe senpartia juĝis-



taro.

La interpartamenta unio

Kiu nun konsistas el 3000 parlamentanoj, estas grava pacilo. La lastan someron 400 parlamentanoj el 21 landoj renkontiĝis en Bruselo. Tio estas signifa montro pri la progreso, kiun faras la pacpolitiko. Ĝi instigas la registarojn ne nur decidi disputojn per arbitracio, sed ankaŭ pripensi aliajn pacrimedojn.

Neŭtraligo

Ĉar aliaj rimedoj ja ekzistas. Jen unu.

Troviĝas mondpartoj, kie nenia milito rajtas okazi : marpartoj, kie nenia militŝipo rajtas batali, kaj marbordoj, kie neniu rajtas konstrui fortikaĵon. La Magelana markolo kaj la Sueza kanalo estas neŭtraligitaj ; kiel ankaŭ Belgujo, Svisujo, kaj Luksemburgo ; kaj oni nun agitas por neŭtraligo de la Panama kanalo.

Ju pli da mondpartoj neŭtraliĝos, des pli bone.

Dum la Dua Haga Konferenco oni proponis rezolucion, kiu kondamnis la kaperon de privata propraĵo sur la maro dum la militado. Multaj nacioj estis pretaj konsenti al tio ; sed Britujo aparte ne konsentis permesi, ke komercaj ŝipoj vojaĝu libere. Tamen, pli ol lu ajn alia nacio, ni estas dependaj de niaj ŝipoj por nia nutraĵo. Se oni forcedus la



supozitan rajton de kapero, ĉu povus esti, ke la nacioj ĉesus konstrui Drednaŭtojn, kies ĉefa celo, laŭdire, estas protekti la komercon ? Ni esperas, ke ĉe la venonta Haga konferenco oni faros progreson pri tiu konsento.

Federigo

En Svisujo tri diversaj nacioj, malsamaj laŭ lingvo, leĝoj, kaj religio, jam de longe unuiĝis per federigo. Ekzemplo simila sed pli grandskala estas tiu de Usono, kies federaj ŝtatoj — kelkaj pli grandaj ol la Eŭropaj regnoj — havas ĉiu siajn proprajn leĝojn, morojn, kaj organizon ; sed tamen unuiĝis per la ligilo de komuna intereso.

Per la beno de Dio tiaj aferoj kreskos — novaj energioj naskiĝas. La Sendependa Labora Partio energie klopodas prepari internacian pacon, kaj okazigas kunvenojn porpacajn. Ĝi opinias, ke grandskala armiĝo estas danĝero, kaj kaŭzas maltrankvilecon, suspekton, kaj rivalecon. Se unu lando pligrandigas sian militŝiparon, la aliaj krias : « Ni devas fari same. »

Iu diris : « Neniam ekzistis malbona paco, aŭ bona milito. »

Kelkaj el niaj batalantoj por la paco estas fortaj homoj. Por stari aparte de la amaso, oni bezonas pli da heroeco, pli da kuraĝo, ol por ĝin sekvi kaj aliĝi.

Troviĝis multaj tiaj herooj por la Paco

dum la jarcentoj : — de Jeremia, kiu je la risko de sia vivo predikis kapitulacion, ĝis John BRIGHT, kiu staris preskaŭ sola en la parlamento por denunci la Krimean militon. Nen nur homoj tiaj, sed ankaŭ individuoj en la privata vivo — eĉ virinoj — havas grandan influon por la bono aŭ malbono.

Ekzemple : la reĝino Louise, nomita „la bona,” tamen instruis al siaj filoj, ke ili venĝu al Francujo la vundojn, kiujn ĝi faris al Germanujo.


La imperiestrino Eugénie nomis la Franc-germanan militon „mia milito” kaj instigis la imperiestron batali — kaj li perdis sian kronon.

Nuntempe la militaristoj provas enkonduki leĝon pri deviga milita servo por la defendo de la lando. Ni efektive kantas la himnon :

*« Sufiĉas sole via brak'
Por defendi nin. »*

Tamen ni konfidas al brako homa !

Ce la ĵusa Universala Packongreso en Stockholm, montriĝis ŝanco levi la standardon de protesto kontraŭ ĉia milito. Kelkaj provis pravigi, kaj proklami permesinda, inter certaj limoj, la militon defendan. La delegitoj britaj, tamen, kun kelkaj aliaj, eldonis firman, klaran, kaj dolĉaniman konstataĵon, ke laŭ ilia kredo nenio milito estas permesinda, ĉar kvankam ekzistas multaj permesindaj manieroj certigi pacon kaj sendanĝerecon, la



militado estas kontraŭ la leĝo de Dio. Cetere, la rolo de la Kongreso ne estas reguligi militon, sed kontraŭstari ĝin.

Cu ne estas necese, ke niaj agoj estu pli konformaj al nia konfeso de fido ? Alie, ĉu la Majstro ne diros : « *Kial vi min vokas : Sinjoro, Sinjoro ; kaj ne faras tion, kion mi diras ?* » « *Kiu malobservos unu el ĉi tiuj plej malgrandaj ordonoj kaj tiel instruos homojn, tiu estos nomata la plej malgranda en la regno de la ĉielo.* » ■

*El parolado farita en
Walpole, 1910*

*Repraso el Kristana
Revuo, t. 4, februaro 1928,
pp. 58-55*

P. H. PECKOVER

« NI PARDONAS AL VI KAJ PETAS VIAN PARDONON »

**Katholikentag en Karlsruhe, 17-21/06/
1992.**

Tiu estis jam la 91-a kaj eble la plej impona. Organizis ĝin, nome de la Germana Eklezio, la „Centra Komitato de Katolikoj Germanaj“ (CKKN). La temo estis : *Ekstas nova urbo. Ni konstruas Eŭropon en unu mondo.* La solenaĵo havis religian kaj politikan karakteron... Inter la organizantoj mi trovis, krom la katolikoj, protestantojn, nekristanojn, eĉ senekleziulojn. Ĉiu okupiĝis laŭ propra emo kaj ebleco. La Katholikentag montriĝis honoro por ĉiu loĝanto en Karlsruhe.



Al la plej elstaraj prelegoj mi kalkulas predikon de episkopo Karl LEHMAN pri la celoj de la kongreso, kaj la finan de ĉefministro de Baden-Württemberg, Erwin TEUFEL pri la nunaj problemoj de katolikismo. Tiun duan mi speciale memoros kun dankema emocio.

- ▣ MILIT-KRIMO, PARDONO, GERMANIO, POLLANDO.
- ▣ CRIME DE GUERRE, PARDON, ALLEMAGNE, POLOGNE.
- ▣ WAR CRIME, FORGIVENESS, GERMANY, POLAND.
- ▣ KRIEGSVERBRECHEN, VERZEIHUNG, DEUTSCHLAND, POLEN.
- ▣ CRIMEN DE GUERRA, PERDÓN, ALEMANIA, POLONIA.
- ▣ DELITTO DI GUERRA, PERDONO, GERMANIA, POLONIA.



Flanke de la Diservoj svarmis malgrandaj sed ŝoke vestitaj grupetoj, kiuj kontestis kontraŭ la Papo kaj la Eklezio.

El la politika flanko mi volus rimarki, ke la germanoj invitis multajn eksterlandanojn, ankaŭ Polojn : junularon kaj soldatojn, kiuj en polaj uniformoj ĉie estis videblaj. Sur Johanes-apoteko mi vidis afiŝon : « *Achtung! Die Pollen kommen.* » Verŝajne tamen ĝi estis nur medicinanonco (?). Surstrate oni povis enkonti subkulturon, kie oni malafable rilatis, aŭ blasfemis per pola nomo. Ne malofte oni povis renkonti kun batalemaj naziistoj, kiel laste en Rostock, kiuj kriis : « *Ausländer raus !* » sed tion oni ne povas ĝeneralligi. La normalaj germanoj serioze volas kaj strebas recipi kun poloj. Tio estis videbla ĉie.

La helpemo kaj gastemo estis kortuŝa. En ĉiuj pli grandaj Diservoj estis iu pola akcento : teksto aŭ kanto. La manojn ili eliris al ni. Do ankaŭ ni devas recipi per la samo, bremsante nian subkulturon, kiu ankaŭ provokas la malamon trans la limo. Ĉiu nacio havas siajn virtojn kaj malvirtojn. Ni estu objektivaj.

La Kongreso havis ankaŭ esperantistan flankon. En la ĉefa kongresejo Stadthalle estis bone ekipita esperantista stando, kiun modele priservis germana junularo, informante la gastojn pri la Esperanto-movado. La stando estis daŭre ĉirkaŭita de homoj. Krome estis ekumena Diservo en Daxlanden, kvar-talo de Karlsruhe, kaj Esperanto-kunveno en

teatro. Fine ni ankaŭ havis esperantistan kunvenon en la kongrescentro, kiu havis la celon pridiskuti niajn politikajn rilatojn. Jen sekvas la ĉefa prelego dum tiu ĉi kunveno.

Pola pastro sin prezentas

Estis revo de mia vivo eksidi iam kune kun germanaj gefratoj kiel en unu familio. Tion ne faros la politikaj interrilatoj, eĉ ne la preĝejaj ceremonioj oficaĵ. Oni devas sin mem eltrovi per kora amo, ne per la racia leĝo. Alimaniere mi dirus, ke oni devas elflegi novan homon, kiu ne estus ŝarĝita per iu malagrabla travivaĵo. Pri tio mi volas paroli, prezentante propran eksenton. Do mi strebos laŭeble plej subjektive alpaŝi al la afero, por ne krei sciencan disertacion, kiun oni povas trovi en multaj libroj kaj artikoloj.

Unue, mi volas prezenti min. Mi estas polo kaj katolika pastro. Ofice, el decido de la pola episkoparo, mi estas landa animzorganto de esperantistoj. Mia junaĝo daŭris dum la 2-a mondmilito. Pli ĝuste, mi ne havis junecon, sed tuj, en la infanaĝo, mi eniris en la homan inferon, kie mi fariĝis batalanto, por pretervivi la sorton.

Mi naskiĝis en vilaĝo apud Nowy Sacz, kiu estis dividita je du partoj : la pola kaj la germana. La germanoj ekloĝis tie post dispartigo de nia lando en la 19-a jarcento, kiam Aŭstrujo enkondukis tien siajn koloniojn. Do pli precize, ne estis tie la germanoj sed la aŭstroj, tamen ni pri tio ĉi ne scias. Ili parolis

la saman, la germanan lingvon, portadis la hitleranajn insignojn, laŭdis la Führer-on, do por ni ili estis nur germanoj. Ili eĉ tiel sin nomis. Krome, ili estis protestantoj, ni katolikoj; ili la liberaj, ni la sklavoj. Ĉio nin disigis; eĉ alia lernejo kaj preĝejo. Ambaŭ nacioj, la najbaraj, kiuj antaŭe vivis konkorde, nune malamis sin ĉiuforte kaj timis, esperante ĉion la plej malbonan. Kaj ne senkiale. Nur el mia familio estis forkondukitaj al Germanio por sklave labori miaj frato kaj fratino. Ĉar ni poloj estis tiam ekster la leĝo, nin regis teruro, foje eĉ angoro. En tia etoso mi elkreskis, aŭ haltis en la kreskado, kaj malgraŭ longa kaj tre ŝanĝita tempo, ĝis nun mi ne sukcesis liberigi min de tiu ĉi subkonscio. Mia racio ne sukcesis venki la senton.

Post foriro de la germanoj alvenis la soveta reĝimo, ne pli bona ol la antaŭa. Ĉar ĝi daŭris 45 jarojn, ĝi postlasis eĉ pli grandajn psikajn malsanojn. Ni vere estas malsanaj je sklaveco. Nia registaro rezidanta en Anglujo estis tute senpova kaj en Warszawa (Varsovio) eksidis fremda perforto. La nacio dividiĝis, senmoraligis kaj grandparte perdis sian naciosenton, patriotismon. Anstataŭ lerni historion, ni estis nutritaj per malamo al la tuta Okcidento, ĉefe al Germanio. Ni estis instruitaj precipe per negativaĵojn el niaj interrilatoj.

La pola historio, teruro kaj sklaveco

Ni scias, ke niaj prapatroj, la slavo, loĝis okcidente ĝis Elbo, de kie ili estis

forpelitaj aŭ ekstermitaj. Brandenburgio, iam Brenna, estis slava princejo, kiun invadis Henriko I, la Birdulo (927-928). Tiam komen-ciĝis nia nacia tragedio sub devizo „*Drang nach Osten*“, kiu terurigas nin ĝis la lastaj jaroj. Kiel skribis germana kronikisto monaĥo Widukind, la „Birdulo“ ordonis murdi ĉiujn plenkreskajn Slavojn. Sekve en la jaro 936 grafo Gero kunvokis slavajn princojn je la „repaciga festeno“ kaj tiam venenis 30-on da ili. Tiel eksplodis la senbrida malamo inter niaj nacioj. Post la 13-a invado Brenna estis venkoprenita de germanoj kaj ekstermita en 1157... Ni scias, ke Berlin, iam Kopanica, nune kvartalo Köpenick, kie heroo Jakso sin defendis kontraŭ la invadintoj ĝis 1230, kun apudaj terenoj estis tiam decide venkoprenitaj de germanoj kaj fizike ekstermitaj. Tie jam ne plu vivas slavo. Kial?... Saviĝis nur parte slava gento Łużyce, kiu tamen estas senigita de sia kulturo tre malnova.




La 13-a jarcento estis terura por la poloj, ĉar la okcidentaj invadintoj atingadis la centron de la lando: Poznań-on, Gdansk-on kaj Silezion. En postaj tempoj niaj rilatoj pliboniĝis, eĉ fariĝis amikaj, sed la 19-a kaj 20-a jarcentoj denove ili terurigas nin per la „*Drang nach Osten*“. Tion tamen ni pli bone konas, ĉar multaj aŭtoroj de tiu infero ankorau vivas. Milionoj da homoj estis dispartitaj aŭ bruligitaj en koncentrejoj.

Kompreneble, en milito la kugloj iras en du direktojn. Atako vekas reziston kaj venĝon. Por venki la kontraŭulon oni devas

eluzi pli da forto kaj ruzo. Suferas ambaŭ flankoj, sed ĉiam pli tiuj, kiuj malvenkas. La lasta mondmilito preparis apokalipsan ankaŭ por la germana popolo. Vivas ankoraŭ tiuj, kiuj el Silezio kaj Pomeranio estis forpelitaj de ekstermanta soveta forto. Mi scias, en kiaj kondiĉoj fuĝadis tiuj, kiuj ankoraŭ restis. Multaj ne pretervivis tion.

Sed ĉi tie mi volas dike substreki la fakton, ke tiam ankoraŭ la sendependa Pollando ne ekzistis. Kun la sovetoj iris iliaj servantoj, la konstruantoj de la monda komunismo, kiuj same estis kruelaj por la germanoj kaj por la poloj. Multaj miaj samlandanoj ne revenis el Siberio kaj aliaj koncentrejoj. La mallibera Pollando estis transŝovita okcidenten sen demando de la polaj ĉu registaro ĉu nacio. Pri tio decidis ne ni Poloj, sed la venkaj imperioj. La homo iam ne estis kalkulata, eĉ la nacio havis tiam nenion por diri. Gravis nur la imperialismo de la venkintoj. Kaj tio ĉi ofte estas erare kaj maljuste aljuĝata al poloj, kiuj vivis en sklaveco. Pro tio mi volas rememorigi al vi, karaj gefratoj, ke la libera Pollando, la 3-a Respubliko Pola, komencis sian ekziston, renaskiĝis, la 22-an de decembro 1990, Pollando kiun vi rajtas juĝi. La 22-an de decembro 1990 la pola prezidento rezidanta en Okcidentio, Ryszard KACZOROWSKI transdonis la ŝtatajn insignojn kaj stampilojn kune kun sia povo al la nova, la enlanda prezidento Lech WAŁESA. De tiu tempo ni komencas esti mastroj en la propra lando. Dum la antaŭaj jaroj aliaj decidis anstataŭ ni.



En la teruraj tempoj de nia sklaveco, en la jaro 1964 tiamaj polaj episkopoj, sub gvido de glora memoro, Kardinalo Stefano WYSZYŃSKI, alpaŝis al la germanoj kun repaciga letero. Fama estis la frazo: *« Ni pardonas al vi kaj petas vian pardonon. »* Tiam intenco de la pola episkoparo ne estis bone komprenita en Okcidentio. La fakto kaŭzis teruran persekutadon de la Eklezio en Pollando flanke de la soveta reĝimo. Multaj pastroj kaj episkopoj suferis. Ankaŭ laikaj kredantoj estis ekstreme humiligataj. Videble ankoraŭ ne alvenis la tempo por la repaciĝo. La semo jetita tamen iom post iom ĝermis kaj fine donis ĝustan frukton. Ĉu vere? Kelkaj ankoraŭ dubas. Ni tamen devas flegi la malfortan kreskaĵon de la komuna amo.

Nune ni havas liberan Pollandon, sed ne liberigitan de la fremda kulturo. Ni ja grandparte estis edukitaj en malkorvena al ni moralo, izolitaj de Okcidentio. Ni eĉ ne havis la okazon lerni la liberon kaj demokration, kio ŝajnas al ni io tro nova, eĉ fremda. Dum la mallibero, ekde la 1939 ĝis 1990 ni ne povis krei propran kulturon... Nune montriĝas, ke pli rapide unuiĝas subtera krimaro ĉe ambaŭ flankoj de nia komuna landlimo, ol la veraj nacioj. Tiuj malbonuloj ŝtelas, komercas (kontrabandas), malbone kondutas kaj kreas falsan opinion pri niaj nacioj. Same faras tion la niaj kaj la viaj nov-naziistoj. Sufiĉas menciigi la disbatitajn trajnojn kaj aŭtojn ĉe nia komuna landlimo. El pli drastaj krimaĵoj mi rememorigas al vi akcidenton en Berlino, kie la

20-an de januaro, de la nuna jaro (1992), germana junularo detranĉis langon de pola knabo (18-jaraĝa) nur pro tio, ke li parolis pole. Krimaĵoj eblas ĉe ambaŭ flankoj de nia landlimo. Do mi petas pri objektiveco en la publikajoj. Mi scias, ke en la sklavigita Pollando, kiel ankaŭ en tiel nomita Demokrazia Germanio (GDR) ne estis kondiĉoj por reciproka repaciĝo. Niaj nacioj estis edukataj al batalo. Filozofo diras, ke ni sovetiĝis. Ni tion agnosku kaj tiam estos al ni pli facile pardoni, ol kondamni la aliajn. Oni devas eduki tute novan generacion al libereco kaj paco.



Plej supera kulturo : pardono, paco kaj justeco

Karegaj gefratoj ! Ni ne tro postulu de la historio. Ne por ĉiuj kaj ne ciam ĝi estas bonkvalita instruisto. Ni ne seniluziĝu. Eĉ se niaj nacioj atingos la plej superan kulturon en niaj interrilatoj, restos ankoraŭ sufiĉe vasta margeno de la malbono. La subtera krimaro donos sian vivosignon. Ĝi estas mistera agado de Satano, kiu neniam silentos. Estos ĉiam malbono kaj maljusto : homoj daŭre havos la okazon pardoni. Kaj la pardono superas la juston, estas kordonaco sen tera rekompenco, havas transcendan valoron, kiun juĝos kaj rekompencos nur Dio.

Ĉi tie, en la katolikaj tagoj, regas la kristana etoso. Jesuo Kristo estas la ĉefa instruisto. La Evangelio estu do nia leĝo. Mi esperas, ke tiu grandega kaj komuna here-

daĵo estas jam sufiĉa bazo, por ke niaj nacioj repaciĝu. Pri la ŝtataj leĝoj parolu politikistoj, sed ni pri la religiaj : ili pri la justo, ni pri la reciporoka amo. La celo estas la sama, ne nur repaciĝo, sed eĉ unuiĝo.

Komenco estos en repaciĝo, en ĉeso de batalemo, sekvos pardono de la reciprokaj ŝuldoj kaj eble ni ankoraŭ ĝisvivos unuiĝon, la vere kristanan amon.. Nune tamen ni estas ĉe la komenco. Ni aŭskultu Jesuon Kriston :

« Se do vi alportas oferaĵon al la altaro, kaj tie rememorigos al vi, ke via frato havas on kontraŭ vi, lasu la oferaĵon ĉe la altaro kaj pli frue repaciĝu kun la frato. Nur poste revenu por oferi la donon » (Mat 5:23-24).

Se ankoraŭ estos al vi facile pardoni, mi rememorigas al vi la Preĝon de la Sinjoro :

« Kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj.. Se vi ne pardonos al la homoj iliajn kulpojn, same la Patro ne pardonos al vi » (Mt 6:12-15).

« Vi ne juĝu kaj vi ne estos juĝataj; ne kondamnu, kaj vi ne estos kondamnitaj ; pardonu, kaj oni pardonos al vi. Donadu, kaj oni al vi donos : bonan mezuron, premilan, kunskultan oni emversos en vian sakon. Ĉar per kia mezuro vi mezuras, per tia oni remezuros al vi » (Luko 6:37-38) diras Jesuo Kristo.

« La suno ne subiru super via kolero »

(Efe 4:26) aldonas sankta Paŭlo Apostolo.

El tio ni povas konkludi, ke nia savo dependas de nia pardonemo. Ne sufiĉas nur la repaciĝo, ĉeso de la batalo, kiu povas esti nur strategia. En la pardono estas forigo de la batakaŭzo. Nur sur tiu ĉi fundamento, sur la repaciga pardono ni povas konstrui la novan vivon, la unuiĝon.

Kia praktike estas la efekto de la rezonado ? En 1939 ni Poloj havis pacon kun la germanoj kaj rusoj ; eĉ la pactkontraktojn pri neagreso. Tio tamen ne malhelpis, ke HITLER kune kun STALIN perfide nin atakis. La antaŭaj pactkontraktoj estis nur strategiaj, por sapumi okulojn de la najbaroj. Tio ne multe valoras.

Ne sufiĉas ankaŭ unuflanka akcepto de pardonpeto. En tio kaŝiĝas grandega fiero de la akceptanto kaj malhonorigo de la pardonpetanto. Se ambaŭ pekis, tia konduto prezentas eĉ maljuston. Ambaŭ devas humiliĝi sin kaj peti pardonon.

Ne sufiĉas eĉ al la bruliginto de ies hejmo elteni la manon kaj prezenti sian amon al la bruligito, aŭ forgesigi tion per iu donaco. Por la repaciĝo oni devas proporcie humiliĝi sin, peti pardonon kaj prezenti bonan volon laŭeble kompensi : fizike kaj morale. La unuiĝo povas estiĝi nur ĉe ambaŭflanke bona volo. « Amu la proksimumon kiel vin mem » (Mt 22,29), diris Jesuo Kristo. Ne ekzistas alia ebleco por unuiĝo. Guste tian mi

deziras, al tia mi sopiras kaj havas la esperon ĝin atingi.

Tarnów-a ekzemplo : Roman Brandstaetter

Por ke la afero estu pli klara, mi rakontos al vi eventon el mia urbo ; nome la vivon de Roman BRANDSTAETTER. Li naskiĝis en Tarnów, en familio de fama tiama rabeno. En 1939 li soldatservis kiel radiotelegrafisto kaj estis liberigita de sovetoj. Tra Siberio, Irano kaj Palestino, kie li kisis spurojn de Jesuo Kristo, tra Afriko kaj Italujo li iris al la malproksima Pollando. Fino de la milito kaptis lin en Assisi (Asizo), kie en 1945 li baptiĝis kaj poste li revenis Tarnów-on kiel katoliko. Bedaŭrinde, en sia urbo li renkontis neniun familianon ; nek parencojn nek konatulojn. Ĉiuj estis dispartitaj de germanoj en sinagogo, aŭ bruligitaj en Oswiecim (Auschwitz-Birkenau). Restis eĉ ne unu. Ne povante elteni la suferon, forveturis al Poznano, kie oferis reston de sia vivo por skribi librojn pri Jesuo kaj Maria. Liaj verkoj apartenas al la plej bela pola literaturo katolika. Sentante jam proksiman morton, li decidis iziti Germanujon, por repaciĝi kun siaj persekutintoj. Li tiam estis en Hamburgo, kaj tion li jene rakontis post la reveno :

« En malhela tago mi sidas en hotelo subpremita de pezega malfido kvazaŭ muso en sia kaptito, kaj silentas. Sajnas al mi, ke mi fariĝis brulanta stoko, en kiun blovegas kun bruo de sirenoj



mara vento. Tiu pelas al la ĉielo volvaĵon da fajreroj. Iru ili kvazaŭ bruloferaĵo antaŭ la Dia trono. Mi forbruliĝu ĝisfunde. Mi havas multajn rememoraĵojn, kiujn mi devas forsendi... Rememoron de la patrino rideto, kiun oni sufokis, mi oferas al Dio. La oran lumskribilon de mia patro bruligita en koncentro mi oferas al la ĉielaj anĝeloj. Rememoraĵojn de ĝisfunde mia bruligita hejmo kaj sanktejo mi oferas al mia kara patrujo Pollando. Ĉiujn martingitajn judojn mi oferas al nia patriarko Abraham.

En tiu hamburga tago, en la mara aero mi vagadas tra la urbo: en kafejoj, vendejoj, teatroj kaj pardonas. Al tiu griza sinjoro sidanta kun mi ĉe la sama tablo kaj trinkanta senĝene kafon, mi pardonas morton de miaj gepatroj... Al unu mastro de cigaredvendejo, de kiu mi aĉetis pipon, mi pardonas morton de miaj geamikoj... Al iu teatra pordisto, kiu vendis al mi programon, mi pardonas ruinojn de mia hejmo kaj Patrujo...

El mia fajrujo eksplodis vulkano da fajreroj, kiuj volis bruligi la tutan teron, disskuant ĉien la fajron. Mi koncentriĝis...

Se tamen ne vi mortigis miajn gepatrojn kaj geamikojn; se ne vi ruinigis domojn de mia Patrujo, pardonu al mi la malfidon. Pardonu al mi, vi griza sinjoro el la kafejo, pardonu al mi

posedanto de la tabakvendejo, pardonu al mi teatra pordisto !...

*La pezaĵo de miaj rememoroj platingis min ĝis la tero... Kaj tamen povas esti, ke ĝuste vi martingis miajn gepatrojn, ke vi dispartis miajn geamikojn, ke vi bruligis miajn sanktejojn kaj Patrujon... La vento estas sufoka, sed el sub tiuj rememoraĵoj mi krias : La sango de miaj proksimuloj ne falu sur la germanojn, la ruinoj de mia domo-patrujo ne subpremu la aliajn. Neniu suferu la reciprokon, ĉar mi pardonas. Al ĉiuj mi pardonas same, kiel ankaŭ mi bezonas pardonon ! **

Mi tiel venis al vi

Karegaj Gefratoj ! Tio, kion mi rakontis al Vi, ne estas ia fabelo. Estas historia fakto, pri kiu mi estas la atestanto. Mi ĝin rakontis al vi propravorte pro tio, ke kun tia pardonemo mi venis al vi... Ĉi tie mi speciale volas danki al pastro EICKORN, kiu bonvolis min inviti kaj tion proponi.

Ce la fino mi tamen havas demandon al vi : Ĉu ankaŭ vi volas kaj povas tiele pardoni al mi ? Mi eltenas al vi miajn manojn fratecajn. Ĉu vi pretas same akcepti ilin ? Mi petas vin pri tio en la nomo de Jesuo Kristo : *« Kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj. »* ■

Jozef ZIELONKA

J ó z e f
ZIELONKA, polo,
katolika pastro,
loĝas en Tarnów.
Li estas oficiale la
animzorganto de
la polaj katolikaj
geesperantistoj,
kaj organizas por
ili spiritajn ekzercojn.
La publikigas
la *Letron de la
animzorganto*.
Antaŭ kelkaj jaroj,
li publikigis en
pitoreskaj cirkons-
tancoj la libreton
*Ni vivu laŭeble
plej bele*.

LISTO DE LA KONTRIBUINTOJ

William AULD, GB
 Karol BAKLARZ, PL
 BALOG Dezső, H
 BEDEGI Győző, H
 BENCZIK Vilmos, H
 Pierre BERTHOUD, F
 Gerrit BERVELING, NL
 BESSENYEI Tibor, H
 Louis BOURDON, F
 Adolf BURKHARDT, D
 Battista CADEI, I
 Marcel COLLEU, F
 Philippe COUSSON, F
 Jacques ELLUL†, F
 David FEATHERSTONE, GB
 Raymond FUNG, HK
 Otto GESSNER, D
 David GILBERG, IL
 René GIRAULT, F
 Jeremi GISHRON, IL
 Franco GRILLI, I
 Kathleen HALL, GB
 Edwin C. HARLER, US
 Peter HAYWARD, GB
 Cyril HORAK†, CZ
 Rudolf HORSKY†, CZ
 Mervyn C. JACKSON, GB
 Olavi KANTELE, FIN
 Albert V. KING†, GB
 KNAVER Zoltán, H
 KÓBOR Lajos, H
 Jelly KOOPMANS-SCHOTANUS, NL
 Joannis KOTITSAS, GR
 David J. LAMB, GB

Kazimierz LEJA, PL
 Jacques LEMAIRE, B
 LUKATS, József, H
 MA Young-Tae, ROK
 Alain G. MARTIN, F
 Hugh MARTIN, GB
 Cornelius MCKOWN, US
 Jeremi MILGROM, IL
 Maire MULLARNEY, IRL
 Thomas NEIL, GB
 Dan NICHOLAS, US
 Leif NORDENSTORM, S
 Godwin I. OBOH, WAN
 Vinko OSLAK, A
 Evaldo PAULI, BR
 P. H. PECKOVER†, GB
 Claude PIRON, CH
 Heinz PLATZER, A
 Doug PORTMANN, US
 Theotima ROTTHAUS, D
 Valerijus RUDZINSKAS, LT
 Vladimir SIBIRCEV, RUS
 Giorgio SILFER, I
 Cvetan SIRMANOV, BG
 Vladimír STAROSTIN, KAZ
 Gustav STENHOLM†, S
 Jan SZURMAN, PL
 Antoni Paweł TABACKI, PL
 Th. Wilhelm TEICH, D
 Roland TIERCE, F
 Jacques TUINDER, NL
 John F. TWILLEY†, GB
 Ernst VENTER†, ZA
 ZHAO Zhilian†, CN
 József ZIELONKA, PL

Koregajn dankojn al ĉiuj kontribuintoj de la 9 unuaj numeroj.

Philippe COUSSON, la redaktoro

LA BAZOJ DE LA SOCIA ETIKO

Ekzistas du difinoj de la etiko : la etiko kiel scienco, kaj la etiko kiel sfero de konscio.

Etiko, scienco, moralo

Historie komence aperas ĝissciencia etiko kiel sistemo de moralaj konceptoj, normoj kaj principoj pri konduto de homoj kaj iliaj unuiĝoj rilate unu al la alia kaj al pli ampleksaj, inkluzive kosmaj. Etiko kiel scienco estas filozofia doktrino pri moralo, pri leĝoj de ĝis disvolvo kaj pri rolo en la socia vivo. Samtempe moralaj konceptoj kreskas ĝis etikaj kategorioj.

Moraloj de diversaj popoloj, religioj, socioj k.t.p. unuiĝas en unu homara moralo, kiu estonte unuiĝos kun moraloj de aliaj civilizacioj en la universo, kun moralo de universa konscio. Kiel malmorale necesas agnoski nur tiun okazon, kiam iu parto de homoj celas perforte altrudi sian moralon al ĉiuj aliaj.



- ▣ ETIKO, VALORO, RACIO, SOCIO, JUSTECO, FELIĈO
- ▣ ÉTHIQUE, VALEUR, RAISON, SOCIÉTÉ, JUSTICE, BONHEUR
- ▣ ETHICS, VALUE, REASON, SOCIETY, JUSTICE, HAPPINESS
- ▣ ETHIK, WERT, VERNUNFT, GESELLSCHAFT, GERECHTICHKEIT, GLÜCK
- ▣ ÉTICA, VALOR, RAZÓN, SOCIEDAD, JUSTICIA, FELICIDAD
- ▣ ETICA, VALORE, RAGIONE, SOCIETÀ, GIUSTIZIA, FELICITÀ



Materio, racio kaj universo

Komencante priskribi la bazojn de etiko kaj mian vidpunkton pri kelkaj ĝiaj problemoj, necesas ke mi konfesu ke mi estas materialisto. En kiu senco ? Nur en tiu, ke mi opinias, ke neviva materio estas fundamento, kiu nutras vivan materion, flauŝon kaj faŭnon. Siavice la viva materio estas fundamento por la pensanta materio. Laste, en la persono de, interalie, homo, estas materia portanto de l' racio. Pli mallonge : materio estas la fundamento de la racio. La racio, la menso, intelekto estas la plej alta formo de l' materio.

Tamen en skalo de la senfina Universo la materio tiel delonge naskis la racion, ke eblas diri, ke la materio kaj la racio ekzistis kaj ekzistos eterne. En diversaj lokoj de la universo en certa tempo aperadas nur novaj taĉmentoj de raciaj, mensaj estaĵoj, kiuj disvolvante ĝis la plej superaj niveloj, servas kiel ingrediencoj de la universa racio, nutrante la lastan kaj estante kiel ĝiaj iloj. La universa racio (ĝin eblas nomi Dio) povas en certaj partoj de la kosma spaco krei aŭ koncentrigi materion, krei kondiĉojn por apero de vivo kaj novaj portantoj de l' racio. Do mi opinias, ke materialismo kaj idealismo ambaŭ estas ĝustaj... nur en sia duono de vero.

Bono, malbono kaj limoj

Post tiu deklaro estos komprenebla

mia respondo al unu el la plej malfacilaj demandoj de la socia etiko : kio estas bono kaj malbono ? Oni scias, ke la kategoriojn ne eblas determini en absoluta formo, ĉar tio, kio por unu homo estas bono, por dua povas esti malbono. Bedaŭrinde tio restas ĝusta, eĉ se pristudi bonon kaj malbonon el la vidpunkto de la Universa racio.

Eblas diri, ke bono estas tio, kio helpas, kontribuas al ekzisto, disvolvo kaj plifortigo de la Universa racio kaj al ĝiaj portantoj. Malbono estas tio, kio kontraŭagas, baras, malhelpas al ili.

Konforme, la fortoj de bono estas la fortoj de racio. Sed senfina kreskado de racio povus transformi la tutan nevivan materion en la vivajn kaj en la materiajn portantojn de la racio, tio, kio senigus ilin de la fundamento por ekzistado. El vidpunkto de la Universa racio (povas esti pli ĝuste el vidpunkto de inform-programa centro de la Universo) senlima kreskado de ĝiaj periferiaj partoj ne estas laŭcela. Amplekso de periferiaj partoj devas esti tia, kia necesas por satigi per informo kaj energio la Centran racion. Senlima disvolvo de iuj partoj de Universa racio povus pereigi ĝin mem.

Sekve la Universa racio aŭ la fortoj de bono ebligas la ekziston kaj agadon de malbono, sed en certaj limoj. La fortoj de bono ne permesas al la fortoj de malbono kreski superlime, ĉar, unue, la fortoj de l' racio kaj la bono estas pli fortaj ol la fortoj de



malbono. Due, la fortoj de malbono estas nur ilo, per kiu la Universa racio ne permesas al la fortoj de racio kaj bono pereigi la fundamenton de ilia propra ekzistado.

Sekuraj proporcioj kaj peko

Do, en la Universo necesas havi certajn proporciojn, unue, inter la neviva kaj la viva materioj kaj, due, inter la nepensanta materio kaj la materiaj portantoj de racio. Se la homaro kaj ĉiuj portantoj de racio sciis pri la objekte necesaj proporcioj, tiukaze konscienca subteno de ili estus bona afero. Tiukaze subteni la proporciojn eblus sen helpo de l' fortoj malbonaj kaj tiuj devus malaperi. En ĉiuj lokoj de la Universo tiukondiĉe regus nur la bono. Por tiu celo la homaro kaj ĉiuj portantoj de la racio devas eltrovi la proporciojn inter la neviva, la viva kaj la pensanta materioj.

Ĝis kiam la supremenciitaj proporcioj estas ne sciataj, ĝis kiam ne estas firma certeco pri tio, ke alvenis la momento, kiam plia vastiĝo de l' portantoj de la racio subfosas la fundamenton de ilia ekzistado en la Universo aŭ kiam la disvolvo, la plia vastiĝo de iu parto minacas nuligi la tuton. Lukto de iuj portantoj de la racio kontraŭ la aliaj estas malbono kaj peko. Iam Sokrato (Σωκράτης) opiniis, ke peki signifas ne scii. Ne scii la supremenciitan kaj spite al tio agi kontraŭ portantoj de la racio, estas la plej granda el ĉiuj pekoj kaj malbono en ĝia absoluta formo. Kompreneble, ke ĝi fariĝas



absoluta kaj tiukaze, kiam la fortoj de malbono tiel pligrandiĝas, ke komencas absolute malgrandigi la ampleksojn de racio kaj bono, pligrandigante super necesaj limoj ampleksojn de neviva kaj neracia materioj. Ĉiukaze lukto kontraŭ malbono, kontraŭ la fortoj, celantaj pereigi ĉion vivan kaj racian estas la morala devo de ĉiu intelekta vivulo.

La universa racio kaj la materia portanto

Do, laŭ mia opinio, Universa racio ne povas ekzisti laŭ si mem, sen la materia portanto. La racio en absoluta vakuo (se ĝi ekzistus) estas senenhava racio, estas nulo, nenio. Por reala ekzisto de la racio necesas almenaŭ kampa (en la fizika senco) formo de materio. Sed ĉu necesas la racio por la materio? Verŝajne, jes. Se opinii, ke la tuta materio ekzistas eterne kaj senfine, tiukaze (se ne senfina, sed almenaŭ eterna) devas esti ĉiu ĝia parto, ĉiu parto de la materio kvazaŭ celas, aspiras sineternigi. Sed tio, kio estas ebla por la tuta materio, fizike ne eblas por ĝiaj partoj pro ilia konstanta movo, ŝanĝiĝo, disvolvo. Tial la fizikan neebulon restas realigebla almenaŭ informe: tio signifas, fiksebla en la memoro de la informportantoj. Nur tiamaniere al ĉiu materia objekto, estaĵo, eblas ekzisti eterne; tiom eterne, kiom estas eterna la Universa racio kaj ĝia interna parto, la informportantoj.

La plej perfektaj naturaj portantoj de informo estas *Homo Sapiens* kaj intelektaj estaĵoj en la kosma spaco, kiuj povas krei



aliajn, verŝajne pli perfektajn informportantojn. Ĉiu vivulo, homo, aŭ deziras aŭ ne deziras esti portanto de informo kaj ekzisti informe. En la lasta okazo ĝi similas nur al viva materio ; en la unua okazo ĝi leviĝas ĝis la racia materio. Emocie, psikologie, tiu deziro aperas kiel simpla aspiro al gloro, famo, kiujn oni povas konsideri kiel la plej altan gradon de ekkonscio por eroj de senfina materio, de tiu aspiro ekzisti eterne almenaŭ en la memoro de raciportantoj. El la vidpunkto de la deziro de gloro, ĝi estas plene etika, precipe se ĝi estas la deziro de bona gloro.

La homo antaŭ ĉio estas estaĵo biologia : ĝi manĝas, ripozas, kreskas, k.t.p. Ĉi tio signifas, ke ĝi plenumas nur la funkciojn, kiujn plenumas ĉiujn animaloj kaj kreskaĵoj. La homo kiel persono fariĝas tiam, kiam ĝi ekkonas la veron, celas enmeti kaj aldonas la enmeton en agadon de la Universa racio. Senespere malsamaj homoj, invalidoj, korpe kaj mense malfortaj estas la difekto — genetica, socia kaj alia — de la socio. Tio estas signalo, ke la socio mem estas malsana, kaj ĝi devas sin kuraci kaj ankaŭ serĉi la rimedojn por kuraci la malsanajn homojn. Car pri la sanstato kulpas socio mem, etikaj estas nur kompato kaj bonfaro rilate al la homoj.

Valoro, stimuloj kaj principoj

La plej alta valoro estas la homo racia. Pri la grado de la valoro eblas prijuĝi laŭ



grado de ĝia racio kaj laŭ kapablo fari bonon. Kiel montras sperto al la kriterio povas konformi ankaŭ malsanuloj kaj invalidoj. Krom la racio por tio al ili necesas nur deziro kaj stimuloj.

Konduto de la homo povas formiĝi aŭ per materialaj, aŭ per moralaj stimuloj kaj motivoj, aŭ per unuaj kaj duaj je certa proporcio. Ĉerte, ekzistas okazoj, kiam atingo de la materiala bonstato ne kontraŭdiras al la morala bonstato. Ĉi-okaze problemo mankas. La problemo aperas tiam, kiam la morala bonstato estas atingata per rezigno de la materiala kaj, male, la materiala bonstato estas atingata per malmoralaj agoj.

Kio povas igi la homon esti influata antaŭ ĉio de moralaj principoj kaj normoj malprofite al materiala bonstato ? Kompreneble, ke kiel unua kondiĉo por tio estas scio de la principoj kaj normoj. El tio sekvas, ke ĉiun homon necesas instrui kaj eduki al etiko same kiel al gepatra lingvo. Des pli ke nescio estas peko.

Kiam la homo jam scias, kiel necesas sin konduti morale, tiam sekvi al principoj kaj normoj de moralo ilin povas devigi diversajn stimulojn. Se la homo kredas al Dio kaj al postmorta vivo de la animo, tiam sin konduti morale ĝin devigas scion pri tio, ke pro minutoj de ĝuado, atingitaj per malmoralaj rimedoj, ĝi estos punita per eternaj turmentoj en infero. Kiel skribis sovetia filozofo V. S. BIBLER, de momento de mortema vivo



dependas la enhavo de eterno. Tio ĉi estas fortega stimulo al la morala konduto kaj al pliboniĝo de la homo. La stimulo estas grandega merito de ĉiuj religioj kaj aparte kristanismo.

Sociaj normoj kaj homa memoro

Tamen eĉ religio dank' al ideo pri elsufero de la pekoj kaj pri senpekigo ne plene forigas malmoralajn agojn. Sed kio devigas homojn agi morale, se ili ne kredas Dion kaj ne timas eternan suferon en infero ?

Morale, kiel oni scias, aperis dank' al neceseco akordigi agojn de certa homo kun interesoj de la aliaj homoj. Se la homo deziras ricevi subtenon de iu socio aŭ de la tuta homaro, ĝi devas akcepti iliajn moralajn postulojn kaj ankaŭ socian kontrolon. Se iuj homoj sekvas al la principoj kaj normoj de moralo, tiam la socio garantias al ili subtenon kaj aprobon. Se ili ne sekvas al la moralaj normoj, produktas malbonon, tiam ili suferas de sociaj mallaŭdoj, de moralaj, juraj kaj ekonomiaj punoj kaj sankcioj. Tio, unue, estas ne indiferenta kaj por religiaj homoj, kaj por ateistoj.

Due, multaj ateistoj, same kiel religiaj homoj, deziras post ilia morto resti en homa memoro, en memoro de la Universa racio kaj tiamaniere vivi post la morto. Certe tia vivo diferenciĝas de vivo antaŭ morto. Efektive la viva homo vivas ne nur en la animoj de la aliaj homoj, sed ankaŭ mem. Li agas mem kaj

stimulas agi aliajn. La mortinteco povas en la plej bona okazo stimuli por la agoj la aliajn, homojn vivantajn post li : per verkoj, projektoj, inventoj, per paroloj, restintaj en la memoro de parencoj kaj konatuloj. Tamen simila vivo en dankema memoro de la posteuloj povas esti alloga por multaj homoj kaj stimuli ilin al bonaj, moralaj agoj.

Konscienco, justeco kaj justa distribuo

Kiel tria stimulo de moralaj agoj kaj konduto estas konscienco, kiu estas, laŭ difino de I. KANT, interna juĝejo en homo. Latvia filozofo A. A. MILTS skribis : « *Malsana konscienco estas pli terura ol puno.* » Problemo konsistas el tio, kiel edukl konsciencan, honteman homon. Kaj konklude : estus la plej bone, se al moralaj konduto kaj agoj stimulus ĉiuj supremenciitaj kaj aliaj stimuloj kaj motivoj.

Konscienca homo plejofte aspiras al justeco. Justeco, se ĝin difini, estas konformeco inter gradoj de postulo kaj gradoj de rekompenco al la persono kaj ankaŭ konformeco inter karaktero de agoj de la persono kaj ĝia socia pritakso.

Mi konsentas kun la opinio de D. ROULS (J. RAWLS), ke justeco estas ĉefa digno de sociaj institucioj. Ne hazarde en la historio de socia penso abundas serĉadoj de la plej justa socia sistemo. El ĉiuj problemoj de socia justeco mi dezirus ektuŝi ĉi tie nur unu : la problemon pri justa distribuo de produktoj



de laboro en la socio.

Justa, laŭ mia vidpunkto, eblas opinii nur tiun distribuon, per kiu ĉiu laborkapabla homo dum sia vivo ricevas de ĉiuj aliaj tiom da varoj kaj komplezoj, tiom da uzvaloro, kiom li produktas mem por ili. Dube eblas agnoski kiel justeco tiun distribuon, rezulte al kiu la individuo, produktanta tre malmulte, ricevas de la aliaj tre malmulte. Aliflanke, apenaŭ eblas agnoski justeca tiun socion, en kiu for de multaj socianoj estas forprenata „leona” parto de liaj enspezoj kaj tial ili vivas malriĉe, sed la forprenitan parton ricevas malgranda parto da individuoj, kiuj vivas tre riĉe, ne kreskante tamen proprajn organizajn, sciencajn, artajn kaj aliajn kreajn kapablojn.

Alivorte justeca mi opinias nur la distribuon, ne laŭ amplekso de produktataj varoj (valoro kaŭzas nur prezojn), sed la distribuon laŭ grandeco de uzvaloro. Nur la uzvaloro de produktitaj varoj fare de personoj aŭ firmaoj. Vvaroj aŭ komplezoj devas fiksi dimension de ilia salajro, enspezo kaj bonstato. Nuntempe la justa distribuo plej bone realiĝas helpe de merkato. Estonte, — kiam sistemo de komputeroj kaj ekonomik-matematikaj metodoj atingos multe pli altan nivelon de disvolvo ol nuntempe — pli justeca, ol permerkata, distribuo efektivigos laŭplane.

Feliĉo, ordinara, supera kaj grupa

Kaj la plej lasta etika kategorio, kiun mi volus pririgardi, estas feliĉo. Kio estas



feliĉo ? Ŝajne, necesas diferencigi ordinaran kaj superan feliĉon, feliĉon de homo kiel konsumanto kaj feliĉon de homo kiel kreanto, produktanto de bono, varoj, komplezoj, ideoj, k.t.p.

Ordinara feliĉo de la homo kiel konsumanto estas konformeco inter bezonoj de la homoj kaj liaj ideoj, unuflanke, kaj la konsumobjektoj kaj kondiĉoj ekzistantaj por la kontentigo, duaflanke. Ĉar bezonoj kaj uzvaloro de konsumobjektoj (kontraste kun ideoj kaj kondiĉoj) eblas — per promesita de mi metodo — mezuri, aperas ebleco elkalkuli gradon de feliĉo. Ĝi estas interrilato inter disponeblaj konsumobjektoj kaj ĉiuj diversaj personaj bezonoj de la homo. La interrilaton kaj la gradon ĉiu persono pritraktas emocie. Tial oni povas diri, ke feliĉo estas emocia pritakso de la interrilato inter la personoj kaj la grado de kontentigo de liaj bezonoj.

Tiel definitiva la ordinara feliĉo preskaŭ koincidas kun la difino de feliĉstato far Jean-Jacques ROUSSEAU (*ruso*). Laŭ ROUSSEAU stato de feliĉo estas plena kontenteco de animo per ekzistanta estado aŭ kontenteco per tio, ke ni bonfartas. Plenan feliĉon la homo ĝuas tiam, kiam la bonstato estas atingita ne per malmoralaj, sed per justaj rimedoj.

Lastan aferon eblas diri ankaŭ pri supera feliĉo, pri la feliĉo de la homokreanto. La feliĉon eblas difini kiel grado de konformeco inter realaj kaj necesaj eblecoj





de la persono por plivastigi la limojn de racio kaj bono. La persono ne estas feliĉa, kiam realaj eblecoj estas pli malgrandaj ol necesaj, kaj kiam la realaj eblecoj estas tiel malgrandaj, ke ili ne sufiĉas por plenumi iun tre dezirindan bonan aferon.

Same ni povas difini ankaŭ grupan feliĉon: kolektivan, nacian, profesian, de societaj kaj religiaj movadoj, k.t.p. Se iu grupo, asocio atingas konformecon necesan por feliĉo, inter realaj kaj necesaj eblecoj, tiam ĉiu grupano, societano povas ĝui feliĉon eĉ en tiu okazo, se kondiĉoj por individua feliĉo ne ekzistas. Tial ĉiu homo aspiras aliĝi al iu certa societo aŭ socio. ■

Vladimir SIBIRCEV

MORALO KAJ LITERATURO

La rilato inter moralo kaj literaturo koncernas diversajn demandojn lige al la rolo de verkisto kaj al la enhavo de liaj verkoj.

Unua koncepto estas tiu de aŭtonomio kaj heteronomio de arto. Se la verkiston kondiĉas iu idealo, ĉu filozofia ĉu religia ĉu ideologia, li aŭtomate limigas sian liberecon. La verkisto obeanta la rolon kiun LENIN antaŭvidis por la artistoj, je la servo de la popolo kaj de la partio, evidente rezignas pri estetika aŭtonomio. La samo direblas por la artisto kristana, ankrita al pure edlaj kaj hagiografiaj perspektivoj. Venkas la enhavo super la formo, la mesaĝo super la maniero.

Sed ni scias (jen dua koncepto) ke ne de la enhavo dependas la arta valoro de verko. Temo tre banala kaj eĉ vulgara povas esti traktata plej bele. Male, temo altnivela kaj etike forta povas rezulti malbele. Madono pentrita de Leonardo estas artaĵo, ne ĉar Maria, sed ĉar Leonardo. Bildo vota en kapelo povas esti groteska naŭaĵo, ne ĉar malsufiĉe pia, sed ĉar mallerte pentrita.

- LITERATURO, ETIKO
- LITTÉRATURE, ÉTHIQUE
- LITERATURE, ETHICS
- LITERATUR, ETHIK
- LITERATURA, ÉTICA
- LETTERATURA, ETICA

Aliflanke (tria koncepto) la artisto ne estas sensala homo : kiel ajn skeptika, li havas propran mondpercepton, kiu influas ankaŭ lian esprimivon. Li devas ankaŭ konsideri la mondpercepton de la samtempuloj, la moralon ne en etika senco, sed kiel kutimaron. Markizo de SADE situis ekster la kristana etiko, sed ankaŭ aliaj liberpensuloj kaj voluptemuloj de la 18-a jarcento ne agis kristane : la sekse moralo estis ja alia ol postulus la kristana etiko. Tamen ĝuste lin oni enkarcerigis : ĉar liaj verkoj priskribis transgresian erotikon, kiun la tiama socio (kaj ankaŭ la postaj) ne trovis kongrua al sia voluptamo mem.

En la originala Esperanto-literaturo mankas tiaj transgresiaj verkoj. ne nur sekso, cetere, gravas en morala kampo, sed ĝi estas la plej ofta tabuo en la socioj kies kulturon nutris kristanismo. La plej blasfemaj partoj de *La dekdu noktoj de Satano*, kie Dio estas priskribita kiel samseksema, ne efikas pli ol kelkaj partoj de la Malnova Testamento ; la posteuma verko de KALOCSAY fakte estas nur la historio de Sodom en tintaj rimoj : indigno ne eblas ĉe inteligenta pastro. Per tio fakte KALOCSAY plene respektis la moralon de sia epoko (kaj des pli la nuntempan) ; kial tiom da prudento do, ĉe li ? Verŝajne ĉar, kvankam en tre milda formo, unu transgresia elemento montriĝas ankaŭ tie : la ŝatata incesto. Incesto estas parto de la biblia rakonto, same kiel anuskoito ; sed la moketoj pri ĉi-lasta ne ekzistas pri incesto, traktata de

Tiu libro de Emiano IMBY / Kalman KALOCSAY, *la dekdu noktoj de Satano*, estis eldonita de Kooperativo de Literatura Foiro.

KALOCSAY multe pli pozitive kaj komplice.

Eĉ minimuma ekzemplo kiel *La dekdu noktoj de Satano* montras kiel plektita estas la rilato inter moralo kaj literaturo. Neniu verkisto malkonscias pri la limoj en kies kadro ankaŭ morale profilis sian verkon : li povas simple ignori ilin, aŭ serĉi komprenon. La absoluta sendependeco estas tamen malprobable : se ne la timo de Dio (aŭ de la Diablo), nome se ne iu metafizika timo, almenaŭ la neceso pri sociaj rilatoj influas efike. em

Giorgio SILFER

Giorgio SILFER, italo, konata Esperanto-verkisto, laboras en *Literatura Foiro*, por Esperanto Pen-klubo.

LEGI ESPERANTE, BONE !

LEGI SAMTEMPE KRISTANE, EĈ PLI BONE !

Vi nun posedas, aŭ prunteprenis unu ekzempleron de la revuo *Evangeliaj Kajeroj*.

Kristana revuo, kiel *Evangeliaj Kajeroj*, ne oftas, eĉ tiu ĉi estas la unika samspeca.

Ĝi estas kristana, biblia, internacia kaj interkonfesia. Ĝi celas homojn, kiuj volas pripensi sian fidon (aŭ sian vivfilozofion), kaj akceptas aŭskulti la alian. Ĝia nivelo estas kaj sufiĉe simpla kaj sufiĉe altnivela, t.e. nek bagatela, nek pedanta. Ĝi do bone taŭgas por vi.

Revuo tia bezonas minimuman nombron da fidelaj abonantoj. Sed ne ĉiuj el vi (r)estas abonantoj. Jes, vi bone komprenis. Per tiu pago mi celas re-abonojn, subtenojn.

Krome, eblas kompletigi la kolekton per aĉeto de aperintaj numeroj :

- | | |
|----------------------|-----------|
| 1. La Biblio | 30 FRF |
| 2. Ekologio | 30 FRF |
| 3. La spirita vivo | 35 FRF |
| 4. Komunikado | 35 FRF |
| 5. La Regno de Dio | 35 FRF |
| 6. Unuaco | 35 FRF |
| 7. Paco, justeco | 35 FRF |
| 8. La Sankta Spirito | 38,50 FRF |
| 9/10. Etiko | 77 FRF |

La planita venonta numero estos : 11. La savo.

DEMANDOJ AL LA ETIKISTOJ

Intervjuo sen intervjuito por montri kien serĉi, por instigi al serioza priluktado de kelkaj problemoj.

Nia nuna civilizo, perdante multajn siajn mejloŝtonojn, alvokas al diversaj „spiritaj“ homoj etikajn konsilojn, gvidilojn. Ankaŭ al la kristanoj kaj al la eklezioj. El tiu ampleksa demando kaj problemaro, mi tiris kelkajn demandojn, kiujn vi povas mem pristudi, aŭ transdoni al etikisto amiko via.

Etiko, etiko

1. Ĉu eblas starigi etikon, kiel tensio inter bono kaj malbono, aŭ inter la alia kaj mi mem ?

2. BONHOEFFER skribis, se mi bone memoras, ke la kristanoj ne devas paroli pri valoroj. Ĉu tio validas hodiaŭ ?

3. Ĉu la etika esploro estas ĉiam serĉo pri valoroj ?

4. Kiel sistema povas esti la kazostuda metodo, kiu laŭ difino respondas al unuopaj



- ▣ ETIKO, VALORO, VIVO
- ▣ ETHIQUE, VALEUR, VIE
- ▣ ETHICS, VALUE, LIFE
- ▣ ETHIK, WERT, LEBEN
- ▣ ETICA, VALOR, VIDAD
- ▣ ETICA, VALORE, VITA

specifaj kazoj ?

5. Multaj parolas pri valoroj : filozofoj, kuracistoj, politikistoj. Kion valoras tiuj ĉi diversaj valoroj ?

Etiko, valoro, agado

6. Ĉu sistemo de valoroj, taŭga por ĉiuj tempoj kaj ĉiuj lokoj, estas kredebla ? ebla ? esperenda ?

7. Kiel komplete kontraŭdiraj agadoj povas esti ĝi pro la samaj valoroj ?

8. Kiuj estus la kondiĉoj por ke deklaro de homaj rajtoj povus esti vere universala ?

9. Kiel la etika esploro enprenas la senton pri senpotenco antaŭ la malfeliĉoj de la mondo ?

10. Kiel defendi kaj ilustri demokration antaŭ tiuj, kiuj ricevis pri ĝi nur karikaturon, post tiom longa sopiro ?

11. Pro gepatra malplenumo, la lernejo frontas devon, neceson eduki, fakte etike eduki. Ĉu oni instruis tion al ĝi ? Kiu helpas ?

12. La kontestantoj, poste la „bof“-generacio, la „yuppies“, la junaj senlaboruloj : kion diri al ili ? Kiel kristanoj ?

kontestantoj : sekve de la ondo de 1968-a jaro, gejunuloj kiuj kontestas iun ajn aŭtoritaton.

„bof“-generacio : jardekon poste, la gejunuloj, kiuj engaĝiĝis en nenio, interesiĝis en kvazaŭ nenio.

„yuppies“ : junaj respondeculoj kun bela jako kaj kravato kaj valizeto, kiuj ludas kun grandegaj sumoj en borsoj.

Valoroj, kiuj valoroj ? Ĉu kristanaj ?

13. Kiel eblas diri ke valoroj povas fariĝi idoloj ?

14. En kio valoroj povas esti kvalifikitaj kiel kristanaj ?

15. Kiel la eklezioj povas havi kuraĝan kaj perkutan parolon, ne pretendante enteni la solajn validajn valorojn, por ĉiuj ?

16. Certaj aŭtoroj fondis siajn esplorojn sur la valoroj de povovolo, de deziro, de feliĉo, de ĝojo, tiel forigante ĉian eksterhoman referencon. Tiuj ĉi principoj kondukas la vivo de multaj inter niaj samtempuloj. Kia povus esti kristana parolo ĉirilate ?

17. Etiko aspektas la privilegia loko de interreligia dialogo ? Ĉu vere ?

18. Ĉu tiuj, kiuj laboras pri kristana etiko devus alveni al samaj respondoj ?

19. Ĉu oni povas paroli pri sanktiĝo etike ?

20. Kiel la kristanoj interligas etikon kun peko, kaj kun la prapeko ?

21. Se la kristano estas fremdulo kaj vojaĝanto sur la tero, kial etika zorgo ?

22. Kaj Satano ?

Etiko kaj vivo

23. Eblus apogi eŭtanazion per la valoro de feliĉo, de vivo vivinda. Kiujn



valorojn, ekzemple, povus defendi la kompletan liberecon pri aborto ?

24. Kiel reagas la etikisto, kiam li aŭdas la biokemiistojn diri, ke la sentoj, kaj konsekvence la agoj, estas rezultatoj de kemiaj reakcioj ?

25. Kiun lokon doni en la etika esploro al la instinktoj, kiel la instinkto por pretervivo ?

26. Timo estas granda motoro de homaj agadoj. Ĉu ekzistas trankviliga etiko ?

Kaj fine

27. Ĉu la intelektula etiko sekvas aŭ antaŭas la ĉiutagan vivon ?

Jen do multe da laboro. Se vi legis aŭ aŭdis pri jama respondo al unu aŭ pluraj el tiuj demandoj, vi povus informi la revuon.

Kelkaj elementoj troviĝas en la paĝoj de ĉi tiu kajero. Mi esperas ke via pripenso estos nutrita kaj incitita post ĝia legado. ■

Philippe COUSSON



ABONOJ

Abono por du numeroj : 77 FRF (Tiu ĉi numero estas duobla). Vi nepre indiku ekde kiu numero.

al *Philippe Cousson, 26 Rue de Pré Ventenot, 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio.*

per poŝta konto, Philippe Cousson, 244 45 X, Limoges, Francio, aŭ per internacia poŝta mandato en FRF, aŭ per 16 internaciaj respondkuponoj.

aŭ al :

Aŭstrio, *Heinz Platzer, Erdbergstr. 72/4/19, 1030 Wien*

ÖPSK-konto 3675.724, Heinz Platzer

Britio, *Thomas Neil, 37 Soutar Crescent, Perth, Skot, PH1 1QB*

national giro, FBCE, 65247 0006

Germanio, *Sr Theotima Rotthaus, 7794 Wald*

Sparkasse Meßkirch K-tonummer 9434, BLZ 693 520 60

Irlando, *Maire Mullamsey, Mill H., Whitechurch Rd, Rathfarnham, Dublin 14*

Israelo, *Esperanto Centro, P.O. Box 23 180, 91231 Jerusalem*

Italio, *Centra Oficejo de IKUE, v. di Porta Fabbrica 15, 00165 Roma*

CCP, Centra Oficejo de IKUE, 23290000

Nederlando, *Leen Hordijk, v. Hogendorplaan 4, 3135 CD Vlaardingen*

post giro, KELI, 5506132

Svedio, *Karl-Erik Eriksson, Bygdegatan 423, 583 21 Linköping*

poŝtgirkonto, Kristliga Esperantoförbundet, 9 14 39-0

Svislando, *Elsbeth Walder, Aebletenweg 30, 8706 Meilen*

poŝta ĉekkonto, KELI svisa sekcio (Z en), 80-52203-8 Zürich

Usono, *Cornelius McKown, 460 Orlando Ave., State College, Pa 16803*

aŭ per la retoj de KELI aŭ IKUE,

aŭ al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015

BJ Rotterdam, Nederlando, pere de la konto *evka-e*.

(vidu en la jarlibro de UEA 1995, ĉe la paĝo 35)

Ni daŭre serĉas perantojn en aliaj landoj.

Vi kompreneble povas donace aboni iun alian, kiu cetere havus problemon por sin aboni.

Frontartikolo		1
Volo kaj vojo	Gustav STENHOLM† (S)	9
La leĝoj de la eterna vivo	Vladimir STAROSTIN (KAZ)	17
En la centro de la bildo	Albert V. KING† (GB)	21
La fonto de etiko	Joannis KOTITSAS (GR)	31
Cu (kiel) eblas kristana etiko ?	KÖBOR Lajos (H)	37
Rajtoj, libero kaj amo	Vinko OSLAK (A)	43
Disiĝo pliriĉiga	Adolf BURKHARDT (D)	49
Frukto perfekta aŭ malpermesita		
	Jacques TUINDER (NL)	55
Esti oazo en mondo malsana kaj freneziga...		
	Jacques TUINDER (NL)	63
Iru do kaj lernu !	Jacques TUINDER (NL)	73
La devo gastigi en judismo	David GILBERG (IL)	
	Jeremi GISHRON (IL)	83
<i>Centesimus Annus</i>	Roland TIERCE (F)	89
Cu Esperanto estas Di-regna ?	Claude PIRON (CH)	95
Esperanto kaj „molaj“ diktaturoj	BENCZIK Vilmos (H)	109
Cu milito estas pravigebla ?	Jelly T. KOOPMANS-SCHOTANUS (NL)	115
La leĝo kaj la profetoj	P. H. PECKOVERT† (GB)	127
« Ni pardonas al vi kaj petas vian pardonon »		
	Józef ZIELONKA (PL)	135
La bazoj de la socia etiko	Vladimir SIBIRCEV (RUS)	149
Moralo kaj literaturo	Giorgio SILFER (I)	161
Demandoj al la etikistoj	Philippe COUSSON (F)	165

prezo : 77 FRF